

ADVENTA KANTO

Lied im Advent

Ĉiam kandelo pli en kron', plektita kaj bela,
ke ĝi lumu por ni tra la tempo malhela.

Du kaj tri, poste kvar! Lumas sur l'kron' la brileto!
Lumas ankaŭ homar'... Lumas nia ĉambreto!

Kaj eĉ lumas la ter', festas la sanktnoktan venon.
Vi, en la koro esper', sentas la benon.

AL LA ĜOJO

*An die Freude *** L. van Beethoven: La 9a Sinfonio*

Ĝojo! Vi fajrero dia, d'Elize' filino vi!
En sankteĵ' benita via arde vin omaĝas ni.
Sorĉe ligas vi beate, se disigis malraci'.
Hom' al hom' estiĝas frate, kie milde regas vi.

Kiu de amik' fidela nomas sin amik' de li,
kiu kun edzin' anĝela vivas, jubiladu pli,
eĉ, se nur al unu koro ie ligas lin inklin'.
Sed aliaj ja kun ploro el la lig' forŝtelu sin.

Ĝojo estas la risorto en eterna la natur'.
Ĝojo jen per sia forto movas l'universon nur.
Florojn el burĝonoj logas, sunojn, astrojn puŝas ĝi.
Sferojn forajn ĝi apogas en senfina galaksi'.

AL NI KNABINOJ DECAS

*Wir armen, armen Mädchen *** A. Lortzing: La armilforĝisto*

Al ni knabinoj decas ne eta eĉ dezir'.
Se mi nur povus ŝanĝi, mi volus esti vir'.
Reputacio, aĥ, perdiĝas baldaŭ ĝi,
kaj suferiga jam fariĝas viv' por ni.
Al vir' nur ĵetu mi rigardon etan pli,
suspektas ili min - lin kapti volas mi.
Ĉu virojn kreis Di' por ni nur pro ĉagren',
malpermesata eĉ afabla ridmien'?

La vir' laŭplaĉe agu, jam silentas la malica fam'.
Sed nin kritikis ĝi, sed nin kritikis ĝi.

Kaj kiam la dimanĉon kun purinfana pi'
en festa robo iras al la preĝejo mi,
kaj sur la bluz' videblas ruband' de bela spec',
aŭdiĝas hipokrite: "Ŝi ŝvelas pro vantec'."
Kunvenas tuj onkloroj kaj same la kuzinoj,
kriaĉas laŭ komando pro tiu belrubando:
"Ne iras ŝi por preĝi, sed pelas ŝin aspiroj
diboĉe, pave, vante nur plaĉi al la viroj.
Jen, jen, malĉastulin', ŝi fleksas korpon, lulas sin,
jen, jen afektulin', okulkoketas ŝi sen fin'."

AMAS VIN NENIU KIEL MI*Niemand liebt dich so, wie ich *** F. Lehár: Paganini*

Diru, kiujn dolĉajn ruĝajn lipojn iam kisis vi?
 Se scius mi, ne dirus mi.
 Ĉu vi jen akiris korinklinon jam de ĉiu in'?
 Ja oni eĉ turmentas sin.
 Kara, kvankam estas vi pekul', mi forgesos tion
 kaj malfermos brakojn nun por nova ĝufortun'.
 Ja estos mi por via tuta viv' la sola kron'!
 Pretiĝos nun por vi pardon'.

Diru, kial tuj pro belulino ardas via vang'?
 Troviĝas en la vira sang'.
 Lasu ĉiun belan inon, se turniĝas ŝia kap'!
 Ne eviteblas plu la gap'.
 Viro, kiu amas en sincer', restas en fidelo
 ĉe la lin amanta kor' anstataŭ vanta hor'.
 Ja, kiam logas belulin', perdiĝas la raci',
 volonte ŝin postkuras li.

Amas vin neniu kiel mi, kaj vivas mi ja nur por vi.
 Tiuj lipoj kaj okuloj logas vin,
 ho, venu nun kaj prenu min.
 Malfermiĝas la ĉiel', vin sekvos mi en amfidel'.
 Mian vivon, mian amon, prenu ĝin,
 S: sklavin' de vi kaj korreĝin'!
 T: de l' sklav' de vi, ho korreĝin'!

AMIKOJ ESTU NI*Wir wollen Freunde sein *** W. Meisel: Reĝino de unu nokto*

Amikoj estu ni por l'tuta vivo!
 Belega estus la viv' por ni.
 Amikoj estu ni en belaj horoj,
 sed dum ĉagreno multe pli, ja pli.
 Aĥ! Aĥ! ja estos bela ĝi, senfina harmoni'.
 Amikoj estu ni por l'tuta vivo!
 Belega estus ja la viv' por ni, la viv' por ni.

Ni estas junaj, amo kaptis nin,
 jen en la mond' plej dolĉa son'.
 Amo ne mankas ja al ni,
 sed multe mankas mon'.
 Tio ne gravas. Antaŭen nur plu!
 Vivo ne ĉiam estas hel'.
 Iru man' en mano ni ĝis nia cel'!

Bela domet', kie loĝas la am',
 eĉ, se malgranda estus ĝi.
 Tio sufiĉus, por ke estu jam feliĉaj ni.
 Eta ĝardeno kun rozoj en ĝi,
 ho, se ĝi estus por ni ver'!
 Multajn fabeletojn donas tiu ter'.

AMMEMOR'*Yesterday *** J. Lennon J./P. McCartney*

Ammemor', miaj zorgoj ŝajnis esti for,
 sed nun kaptis min animangor',
 ho, dronas mi en ammemor'.
 Sen avert' min dolore premas korinert',
 malgajigas ombre trista spert',
 ke am' perdiĝis sen avert'.
 Kial ŝi forlasis min? Ŝi iris for,
 stulte agis mi, nun turmentas ammemor'.
 Ammemor', amoplenu estis ĉiu hor',
 sed nun emas mi kaŝiĝi for,
 ho, dronas mi en ammemor'.

AMO, DIA AMO*Láska, Bože, láska *** popolkanto slovaká*

Amo, dia amo, kie vi troveblas?
 Nek sur montoj kreskas, nek en kamp' semeblas.
 Belan aminklinon ofte mi ja ĝuis.
 Ne plu mi ĝin trovas, tute ĝi forfluis.
 Se la amo kreskus alte sur la rokoj,
 multaj virgulinaj serĉus en ĉi lokoj.
 Ne sur rokoj kreskas amo por knabino,
 restas ŝi sen amo, serĉos ĝin sen fino.

AMO VI ĈIELA*Liebe, du Himmel auf Erden *** F. Lehár: Paganini*

En koro mi triste ĉagrenas, ho, kia kruela hor'!
 L'amanton nun ili forprenas, al li min ligas la kor'.
 Feliĉon mi tenos, kaprica ĝi,
 en mano firmprenos la sorton mi.
 Eĉ kontraŭ la mond' apartenu li nur al mi, nur al mi.

Amo vi ĉiela, ho daŭru en eternec'.
 Amo, vi rev', estu ĉiam nur realec'.
 Vi ĉirkaŭ mi estu, ĉe mi sorĉe restu,
 de l'viv' la sencon vi donas al ni.

Amo vi ĉiela, ho daŭru en eternec'.
 Amo, vi rev', estu ĉiam nur realec'.
 Estas vi mistero, fuĝas for sufero,
 el vi fontas amor' al ĉiu kor'.

ARBAR-ADORO*Waldandacht *** F. Abt*

Matene, kiam krias kok' kaj ne varmiĝas jam aer',
eĉ antaŭ la koturna vok' nur eĥas korn' tra la eter',
tra la eter'.

Kviete Dio, laŭ emo sia Kar-Dio iras tra l'arbar',
Kar-Dio iras tra l'arbar'.

Lin aŭdas veni plaŭda font' kaj ĉesas tuj murmuri ĝi.
Estime lin l'arbara mond' omaĝas en sincera pi'.
La arboj revas, la arboj revas: nun ni mallevas,
nun ni mallevas la branĉojn antaŭ nia Di'.

Vekiĝas la floretoj nun, ja sentas tuj, jen la Sinjor'.
Kaj ili, antaŭ venos sun', l'okulojn viŝas kun fervor'.
Kaj flustras gloire al li adore: Kar-Dio iras tra l'arbar'.

ATENT'! JEN MI*Schaut her! Ich bin's *** R. Leoncavallo: Bajazzo - prologo*

Atent'! Jen mi, kaj tute serioze, gesinjoroj, aŭskultu:
rakontos mi gravan prologon nun.

La gajajn maskojn vidos vi kun miro dum lud' sincera
kaj volas la kutim',

ke mi al vi klarigu la celojn de la poeto.

Validas ne por ni la fraz':

"Falsaj la larmoj de l'scenej' kaj tromp',
falsaj la ĝemoj nur, la dolor', ruza pomp',
ne traktu ludon grave!"

Ne, ne, sen tim' la poeto

nun el la vivo teruran veron elĉerpas,

ja ne fabeloj nur estas la cel' de l'art'.

Kion li vidas, prezentu l'poeto,

jam lin tuŝas favor' de l'hom'.

Memoro pri travivaĵo premis la koron, aĥ, de la aŭtoro,

lin iam ĝi funde skuis,

ankoraŭ fluas larmoj, ja kvankam estas nura kant'.

Aŭdu! Tuŝu vin en la ludo

la sort' de l'amantoj, simila al via.

Malam' furiozas, envio rodas, ĝis la kulp' atingos pinton

kaj l'infer' postulos kun raŭka rid' kompenson nun.

Ho, kedu: la kor' de la komediant' batas ja samkiel ĉe vi.

Ankaŭ lin konsolas mildaj larmoj, turmentas lin dolor'.

Ni ĉiuj sur tero iras en sama lum',

ĝis ĉe l'celo la riĉajn kaj mizerajn ne kompatos mort'.

Tiel mia poeto vidis la mondon - jen lia verk'!

Atent'! Komencu la ludon!

AŬDU, KARA

*Komm, mein Söhnchen *** B. Smetana: La vendita fianĉino*

Aŭdu, kara, venis hor', gravan al vi diri.
 Lasu min, mi devas for al la kampoj iri.
 Ho, ĉu vi ne konas min?
 Jes, mi jam eksciis ĝin, ĉu mi povas servi vin?
 Ho, estas ja lerta vi, sendube ankaŭ saĝa.
 Al knabino, scias mi, estas vi tre plaĉa.
 Kaj ĉu vi havas monon?
 Estas superflua far',
 ĉar Dio donas benon al amoplena par',
 al amoplena par'.
 Stulte. Sen la ĝusta ag' ne daŭros la feliĉ'.
 Nur la mon', nur la mon', nur la mon' estas kondiĉ'.
 Ke necesas ŝparoj, spertis mi laŭ faroj
 antaŭ multaj jaroj.
 Oportun' estus nun scii, se ne ĝenas, kie vi devenas.
 Fora land', ĉarma strand', fora land',
 de la Moldaŭ-bordo gvidis min la sorto.
 Tie vi edzinon prenos, fremdlandino vin ĉagrenos
 multe nur, kredu min, kredu min.
 Kion donis fremda land', estas mia diamant'!
 Jes, anĝelon trovis mi, ĉiel-anĝelon, edzin' mia estu ŝi.
 Ama frenezec' taksas pro stultec' inon anĝelo,
 kredas pro pasi', estas ĝuste ŝi rara modelo.
 Ofte virineto estas flatkateto, kaj velure vin karesas ŝi.
 Sed terure poste sentas ja ĝisoste tigroungojn vi.
 Celo ĝis la fin' estas bela in'.
 Se li havas ŝin, ridas lia kor'.
 Baldaŭ plendos li, se nur estus ŝi,
 ho, vi granda Di', estus ŝi nur for.
 Sekve saĝa vir' restas solul',
 ĉar ĝis lasta spir' estos liberul'.
 Ĝenas lin nenio, ĉar jam antaŭ ĉio
 por kaj kontraŭ pesis saĝe li.
 Lia altvaloro ne nur en la koro,
 en saket' troviĝas ankaŭ ĝi.
 Restas ja, restas ja nur blamo, sed ne ĝu', gaja viv',
 gaja viv' kaj amo, ho, ne plu,
 gajec' kaj amo, ho, ne plu.
 Mi pro tio al vi danku?
 Kun aliaj ŝercu vi!
 Vin nenio manku, jen oferton havas mi.
 Inon mi konas, havas dukatojn, ja, dukatojn.
 Inon li konas, havas dukatojn, ja, dukatojn.
 Ŝin konkeri ja plenumas ĉiujn postulatojn.
 Cent valorajojn krome posedas, ŝi posedas:
 eĉ superas la imagojn, oni ĝin ne kredas.
 Dom' kaj ĝardeno, arboj jen floras,
 laktobovinoj homojn favoras,
 porkoj kaj kokoj en la stalo, eĉ tritiko kaj sekalo,
 kuvoj, kruĉoj kaj vazaro, belaj ŝuoj kaj vestaro.
 Kaj sen mank' eĉ tute nova ŝrank'.
 Princo ne longe penus, aŭdu!
 sed senhezite venus. Aŭdu!
 Kaj tian inon prenos, estus kontenta certe ja pri ŝi.

Alloga ŝi, sed neas mi.
Inon mi konas, ŝi havas dukatojn,
kaŭzas ŝi ja bonajn nur konstatojn.
Li kontentos certe ja pri ŝi,
ha, li kontentos certe ja pro ŝi, kontentos li.

AŬDU MIN*Hör mein Flehen *** W. A. Mozart: La nupto de Figaro*

Aŭdu min, ho, amo-dio, mian edzon redonu al mi.
 Venas el mizer' la krio: tiel mi ne vivos pli.
 Aŭdu min, ho, amo-dio, ho, redonu lin al mi.
 Venas el mizer' la krio, tiel mi ne vivos pli.

Sankta fonto de l'pura amo, kie estas de l'edz' la kor'?
 Min forbrulas arda flamo, mortas mi jam pro dolor'.
 Di', bezonas mi balzamon, ĉar suferas mia kor',
 arde sentas mi la flamon, mortas mi jam pro dolor'.

AVELUJ', NUKSOARB'*Limbora, limbora *** popolkanto slovak*

Aveluj', nuksoarb', ho, verda nuksarbet';
 falas etaj nuksoj de l'karul' al kortet'.

Falas del' aveluj' malgrandaj nuksetoj;
 kiu prenos vin, ja, povraj knabinoj?

BALDAŬ SOPIRATA TAG'*Lasst uns froh und munter sein *** kanto kristnaska germana*

Baldaŭ sopirata tag', Nikola' kun sia ag'.
 Ĝoju, ĝoju, traleralera,
 baldaŭ venos Nikola', baldaŭ venos Nikola'.

Ŝuon mi pretigos ja, ĝin plenigos Nikola'.
 Ĝoju, ĝoju, traleralera,
 baldaŭ venos Nikola', baldaŭ venos Nikola'.

Ofte sonĝas nokte mi, kion eble donos li.
 Ĝoju, ĝoju, traleralera,
 baldaŭ venos Nikola', baldaŭ venos Nikola'.

Frue mi rigardos, ĉu estos io en la ŝu'.
 Ĝoju, ĝoju, traleralera,
 baldaŭ venos Nikola', baldaŭ venos Nikola'.

Nikola' mi dankas vin, ĉar vi tre ĝojigis min.
 Ĝoju, ĝoju, traleralera,
 nun jam venis Nikola', nun jam venis Nikola'.

BELA TAG'*Ein schöner Tag *** laŭ Young: Amazing grace*

Belegan tagon ĝuis ni, ho, kia rara grac'!
 Nur ĝojon puran donis ĝi, senzorga amdonac'.

Kun jubilado de l'alaŭd' vekigis la maten'.
 Orumis poste ĝin la sun', la tagon en seren'.

Belega tag' en harmoni' pli lumas ol juvel'.
 Radias, vokas: tiu tag' vin gvidu al ĉiel'!

Kaj kia sorto trafos vin, se venus zorg' kaj plag',
 por ĉiam restos la memor' je nia bela tag'.

Sed krom memoro tiu tag' ja estas multe pli:
 Ĉar helpu ĝia varma am' dum ĉiu temp' al vi.

BIBLIAJ KANTOJ nr-oj 4 kaj 6*Biblische Lieder *** A. Dvořák*N-ro 4

Di-sinjur' paŝtist' por mi, neniam io al mi mankos.

Sur herbej' Lia man' gvidas min,

al trankvilaj lagoj min.

Kaj l'animon nutras Li.

Kaj Li gvidas min sur la vera vojo pro Sia nom'.

Kaj se mi devas eĉ migri tra l'valo de l'morto-ombroj,

mi ne timas la malbonon, estas Vi ja ĉe mi,

Viaj ŝirm' kaj baston' donas trankvilecon.

N-ro 6

Aŭdu, Di', la preĝon, petegon mian, Di'!

Ĉar forte fidas mi nur Vin, ŝirm' kontraŭ malamikoj.

En Via tendo mi eterne loĝos, gardita sub protekto Via.

Di', sola sinjur' por mi! Vin mi matene serĉas,

ho, Vin soifas la animo,

Vin sopiras mi jen en tiu lando seka kaj senakva.

Mi kantas Vian gloron

kaj levas miajn manojn por adori Vin,

kaj vokas Vian sanktan nomon.

BLANKAJ ROZOJ EL ATEN'*Weiße Rosen aus Athen *** Bradke: modkanto*

Jen nova tag', la suno, ĝi revenas,
denove venos adiaŭo nun por ni.
Kaj via ŝip' foriros sur la ondoj,
sed ĝi kunportos florsalutojn el patri'.

Blankaj rozoj el Aten' diras vin: revenu baldaŭ!
Dolĉe vokas ĝis reven' blankaj rozoj el Aten'.
Blankaj rozoj sur la ŝip' malproksime rave floras,
nur por vi odoras jen blankaj rozoj el Aten'.

En fora land' neniu vin atendas,
kaj ĉiu stelo brilas kiel diamant'.
En tiu mond' vi sentas vin soleca,
sed estas floroj ja kun vi el hejma land'.

BLANKA ROZ', RUĜA ROZ'*Rose weiß, Rose rot *** E. Licht*

Blanka roz', ruĝa roz' kun dolĉridanta buŝ',
ruĝa roz', blanka roz', vi logas min al tuŝ'.
Dum tag' kaj nokt' mi serĉas vin,
ĉar via buŝ' alridis min, la ruĝa buŝ'.

Birdeto kantis sur tili', ho, kia dolĉa hor'!
Blanka roz', ruĝa roz', saltetis mia kor'.
Ja pro ĝojo saltis ĝi,
min en kant' alridis vi - feliĉa hor'.

Blanka roz', ruĝa roz', ho, kien iris vi?
Sentas mi, via kor' ne estas plu ĉe mi.
Trompis vi per amridet',
false kantis la birdet' pri mi kaj vi.

BLUA LA AM'*L'amour est bleu*

Dolĉa, ho, dolĉa am', dolĉa la viv' en via la brak'.
Dolĉa, ho, dolĉa am', dolĉa la viv' dum nokto kaj tag'.
Blua, ho, blua am', estu lulilo por mia kor',
blua, ho, blua am', blua nun estas ĉiu la hor'.

Akvojn tiras la mar' al si, mian koron altiras nur vi.

Griza, ho, griza am', ploras l'anim' de kiam vi for.
Griza, ho, griza am', falas la pluv', ho, akra dolor'.
Ĝemas la vent', la vent', ploras la vent', ĉar iris vi for,
plendas la vent', la vent', ploras la kor',
ĉar estas vi for.

Akvojn tiras la mar' al si, mian koron altiras nur vi.

Blua, ho, blua am', blua ĉiel', revenis ja vi.
Blua, ho, blua am', prenos nun vi la manon de mi.
Freneza nia am', freneza kiel vi kaj mi!
Blua, ho, blua am', ĉar nun mi restos daŭre ĉe vi.

BRILAS STEL'*Vysoko zornička *** popolkanto slovaka*

Brilas stel' de maten', bona nokt' al Helen';
 kaj deziru nun Di' bonan nokton al vi.

Bona nokt', bona nokt' - jen dezir' nur al ŝi,
 nur al ŝi, kie dum la nokt' restadis mi.

Bona nokt', bona nokt' - jen dezir' nur al li,
 donis li multe da kisoj ja nur al mi.

Bona nokt', bona nokt', bona nokt', bona nokt'.

BRULAS KISOJ DUM NOKTO KAJ TAG'*Meine Lippen, sie küssen so heiß *** F. Lehár: Giuditta*

Mi ne komprenas ĝin, ke ĉiam sekvas aminklin',
 se proksimiĝas vir' al mi,
 rigardas min kaj kisas miajn manojn li.
 Kaj oni diras pli, ke sorĉon elradias mi.
 Al tiu sorĉmagi' neniuj vir' rezisti havas forton li.
 Sed kiam ardas ruĝa lum' je noktomeza hor',
 min spektas ĉiuj viroj, dum mi sentas en la kor':

Brulas kisoj dum nokto kaj tag',
 mola, blanka, fleksema la brak'.
 En la steloj mi legas instruon:
 donu kisojn, amoĝuon!
 Ja en danc' skuas min emoci',
 per okul' virojn logas al mi.
 En ekstaz' gvidas min la imag':
 brulas kisoj dum nokto kaj tag'.

Ja trafluadas min sovaĝa sang' de dancistin'.
 Patrino mia jar' post jar'
 reĝin' de danco estis ŝi en Alcazar.
 Ŝi estis bela in', en song' mi ofte vidis ŝin.
 Je frap' de tamburin' kaj dancsovaĝ'
 l'okuloj ja avidis ŝin.
 En mi denove vivas ŝi, mi ludas per amor'.
 je noktomezo dancas mi kaj sentas en la kor':

Brulas kisoj dum nokto kaj tag', ...

BRULIS TILIO*Horela lipka *** popolkanto slovaka*

Brulis tilio, brulis ĝi, sube knabino, sidis ŝi.

Falis fajreroj, trafis ŝin. Ploris junuloj pro inklin'.

Unu sen larmoj restis nur, ĉar lia amo falsa ĵur'.

BUCVIRET'

Jen dancas Bi-Ba-Bucviret' en nia cirklo ĝi-di-del-di!
Balancas kaj sin skuas pli, trans ŝultron ĵetas sakon ĝi.

* Butzemann

BUNTAJ JAM L' ARBAROJ

*Bunt sind schon die Wälder *** popolkanto germana*

Buntaj jam l'arbaroj, flavaj la kamparoj, venas la aŭtun'!
Ruĝfolioj palas, griznebulas falas, vent' malvarmas nun.

Peza vinberaro el la foliaro brilas en purpur'.
Sur spalir' ruĝbriloj de persikaj miloj, mola haŭtvelur'.

Rikoltiĝas vinoj, kantas la knabinoj dum la kolektad'.
Ĉie en la landoj flirtas ĉaprubandoj, gaja jubilad'.

Dolĉaj violonoj kaj de l'flutoj sonoj ĉe la luna hel'.
La knabinoj vokas kaj al danco logas sub la noktĉiel'.

BUŜ' SEN TONOJ

*Lippen schweigen *** F. Lehár: La gaja vidvino*

Buŝ' sen tonoj, violonoj: amu min!
Dancaŝetoj estas petoj: amu min!

Ĉiu prem' de l'manoj ja sentigas ĝin,
diras ĝi al mi, al mi: vi amas min.

Dum valsomelodi' l'anim' kundancas ĝi,
kaj vokas nun la kor': ho amu min dum ĉiu hor'.
Ja la buŝ' sen iu vort', sed sonas la interna kord':
mi kore amas vin, mi amas vin.

Ĉiu prem' de l'manoj ja sentigas ĝin:
diras ĝi al mi, al mi: vi amas min.

ĈAMPANO – ARIO

*Champagner-Arie *** W. A. Mozart: Don Giovanni*

Ek, nun ni festu, gajaj ni estu, ĝis ĉiuj kapoj ardos pro vin',
Venus knabino al la ĝardeno, kun ni dancadi tuj voku ŝin.
Kun ni dancadi tuj voku ŝin, tuj voku ŝin, tuj voku ŝin.
Dancu freneze ni ĉiu laŭplaĉe, jen menueton, jen viglan valson,
jen alemandon ludu por ni,
jen menueton ludu por ni, jen viglan valson ludu por ni,
jen alemandon ludu por ni.
Sed mi kviete kaj tre diskrete la amatinon gvidos kun mi,
ja gvidos kun mi, ja gvidos kun mi.
Notos facile kaj tre trankvile en mian liston mi unu pli.
En mian liston morgaŭ mi notos tuj unu pli.
Venus knabino al la ĝardeno, kun ni dancadi tuj voku ŝin.
Notos facile kaj tre trankvile en mian liston mi unu pli.
Dancu freneze ni, ĉiu laŭplaĉe, jen menueton,
jen viglan valson, jen alemandon ludu por ni.
Notos facile kaj tre trankvile en mian liston mi unu pli,
en mian liston mi unu pli, en mian liston mi unu pli,
ja unu pli, ja unu pli, notos ja unu pli.

ĈARMULINO, TIU ETA REGISTRO

*Schöne Donna, dies genau Registe *** W. A. Mozart: Don Giovanni*

Belulino! Jen por vi katalogo
pri l'amoroj de Don Giovanni.
La aŭtoro de ĝi estas mi mem.
Se vi volas, aŭskultu min nun,
se vi volas, aŭskultu min nun.
En Italio jam sescent-kvardeko,
ducent kaj tridek en Germanio,
cent en Franci', en Turki' naŭdek-unu. Sed Hispanio,
en Hispanio jam milo kaj tri, milo kaj tri, milo kaj tri.

El vilaĝo jen knabino, jen el urbo belulino, servistinoj,
baroninoj, markizinoj aŭ princinoj, do, virinoj ĉiuspecaj,
tutegala la statur', se virinoj estas nur.
En Italio jam sescent-kvardeko,
ducent-tridek ja en Germanio,
cent en Franci', en Turki' naŭdek-unu.
Sed, sed en Hispanio,
ho, Hispanio, jam mil' kaj tri, jam mil' kaj tri,
jam mil' kaj tri.

El vilaĝo jen knabino, jen el urbo belulino,
servistinoj, baroninoj, markizinoj aŭ princinoj,
do, virinoj ĉiuspecaj, tutegala la statur',
se virinoj estas nur, se virinoj estas nur.

Ĉe blondulinoj logas dececo,
plaĉa ĉarmo kaj kizdeziro,
ĉe la brunaj la fidelo, ĉe la blankaj amsopiro.
Vintre serĉas dikulinojn, por somero sveltajn inojn.
Grandaj havu bonstaturon, elegantan belfiguron.
Sed la etaj... sed la etaj estu graciaj, ja, tre graciaj,
ja, tre graciaj.

Eĉ konkeras kun persisto maljunulinojn por tiu listo.
Sed plej junajn per pasio celas li kun ambicio.
Do, ĉu ili tre riĉecaj, ĉu belegaj, ĉu maldecaj,
ja principe gravas nur, ke temas pri virinoj ĉiuspecaj.
Kaj konata la rezult', kaj konata la rezult',
virinetoj ĉiuspecaj, kaj konata la rezult'.

ĈE L'KRONMASTRO

*Beim Kronenwirt *** laŭ danckanteto badenia*

Ĉe l'Kronmastro estas jubila dancad',
de bela Katrinjo edziĝa festad'.
Kaj sonas muziko, ĝojkria ridad',
la buloj vaporas por ĉies malsat'.

Kristjano nun sidas ja ĉe la pastor',
papavruĝe ardas ŝi, lia trezor'.
La kvara nur estas, konstatas nun li,
kaj daŭros ĝis sepa la fest' tie ĉi.

Subite trankvilo, muzika fanfar',
sekrete forfuĝis la junedza par'.
Knabinoj konfuzaj parolas ne plu,
dancsvingas nun ilin la knaboj kun ĝu'.

Kvieta la nokto, arĝenta la lun',
lastfoje la festgastoj ronddancas nun.
Kaj ili finfine ripozas ja, dum
ĉe l'Kronmastro nun estingiĝas la lum'.

ĈE L'PUT' ANTAŬ PORDEGO

*Am Brunnen vor dem Tore *** popolkanto germana*

Ĉe l' put' antaŭ pordego jen staras la tili'.
En ĝia ombro dolĉe ja ofte revis mi.
Mi tranĉis karajn vortojn en ĝia kruda ŝel'.
En ĝojo kaj doloro ĝi restis mia cel'.

Mi devis pretermigri dum nokta obskurec'.
Mi fermis la okulojn en nigra malhelec'.
Kaj kvazaŭ min vokante la branĉoj muĝas jen:
"Ĉi tien vi nur venu kun via korĉagren'."

Malvarma vento blovis dolore kontraŭ mi.
De l'kap' ĉapel' forflugis, ne turnis mi al ĝi.
Nun malproksima estas mi for de la tili',
sed vokas ĝi: "Nur venu, trankvilon trovos vi."

ĈE MIA PATRA DOM'*Vor meinem Vaterhaus *** R. Stolz*

Ĉe mia patra dom' tili' majestas,
 ĉe mia patra dom' benk' sur dekliv'.
 Kaj kiam tie mi reestas, mi restos por la tuta viv'.
 Ĝojigos min tili' susure per ĝia foliara ĥor',
 ĝin tiam mi aŭskultos nure, nun revas nur pri ĝi la kor'.
 Ĝin tiam mi aŭskultos nure, sed kiam venos tiu hor'!
 En tiu fremda, granda lok', en tiu ŝtona mar',
 apenaŭ flor' por mi allog' dum tuta, tuta jar'.

Ĉe mia patra dom' tri rozoj floras,
 kaj ilin zorge flegis la patrin'.
 Nun en aŭtun' ne plu odoras
 kaj certe velkis ĝis la fin'.
 Sed venos mi, la rozoj estos laŭ la sopir' de mia kor',
 kaj sur genu' ĉe l'rozoj restos,
 regvidos min infan-memor',
 kaj sur genu' ĉe l'rozoj restos, sed kiam venos tiu hor'!
 En tiu fremda, granda lok' apenaŭ estas put',
 murmuras lace en sufok' malgraŭ kolora lud'.

Ĉe mia patra dom' troviĝas puto,
 fluetas akvo ĝia en plaŭdad'.
 Knabinoj iras al la puto, rakontas tie pri l'amat'.
 Nur unu ne, ja ŝi sin bridos, al mi perdiĝis ŝia kor'.
 Hejmiĝos mi, ŝi ĝoje ridos, ĉagren', doloroj estos for.
 Hejmiĝos mi, ŝi ĝoje ridos, sed kiam estos tiu hor'!
 Ja, ja, sed kiam estos tiu hor'!

ĈE RIVERO*Po nábřeží koník běží *** popolkanto slovaká*

Ĉe rivero kuras nigra ĉevaleta.
 Kaj de kie venas vi, ho, junuleto?
 Venas el Slovaki' tre fiero fil' de ĝi, kara mia.
 Du kolomboj renkontiĝas apud lago.
 Slovakino estas vi kaj mi Slovako.
 Amas vin kun inklin', estu mia vi edzin', kara mia.

ĈE VIROJ, KIUJ SENTAS AMON

*Bei Männern, welche Liebe fühlen *** W. A. Mozart: La sorĉa fluto*

Pamina: Ĉe viroj, kiuj sentas amon,
ne mankas ja tenera kor'.

Papageno: Kunsenti tiun ardan flamon,
plej altŝatata invalor'.

Ambaŭ: La amon ĝuu vi kaj mi:
vivas ja nur per amo ni,
vivas ja nur per amo ni!

Pamina: Dolĉigas am' la tutan mondon,
al ĝi oferas la kreaĵ'.

Papageno: Regadas la naturan rondon,
por vivo estas la spicaĵ'.

Ambaŭ: Ekzistas ja laŭ ĉies dir'
pli nobla ne ol in' kaj vir',
pli nobla ne ol in' kaj vir'.
Vir' kaj in' kaj in' kaj vir',
vir' kaj in' kaj in' kaj vir':
preskaŭ estas dia spir'.

ĈIAM RIDETI*Immer nur lächeln *** F. Lehár: La lando de l'rideto*

Eniras la ĉambron mi kun korsopir',
 ejon de sankta seren'.
 Ŝi tie vivas, jen ŝia spir' de mia suno kaj ben'.
 Ne batu sovaĝe, ho, amtrema kor',
 silenti instruis mi vin.
 Ne tuŝas ŝin sci' pri mia dolor' kaj sopir',
 kiuj brulas min.
 Sed se al ni ĉinoj eĉ kreas kor',
 ja restas sekret' l'anima humor'.

Ĉiam rideti pro kvazaŭ plezur',
 ĉiam kontenta ŝajnigi sin nur,
 malgraŭ sufer' kaj mil doloroj.
 Sed la interna sent' ja restas sekret'.
 Nek povas konfesi, nek diras ĝin mi,
 eĉ se min punos la fat'.

Nur estas ludil' mi, fremdulo por ŝi, nura ekzota flirtad'.
 Min sorĉis ŝi dolĉe, ravegis ŝi min,
 laŭ haŝiŝ' kaj sangruĝa vin'.
 Ne amos ŝi min, ne bona la fin',
 estas nur mia sonĝdiin'.
 Ne sentu ŝi ion ja en sia kor',
 ĉar nur en mi mem vivas kordolor'.

Ĉiam rideti pro kvazaŭ plezur',
 ĉiam kontenta ŝajnigi sin nur,
 malgraŭ sufer' kaj mil doloroj,
 neniam montru sin vera vizaĝ'.
 Ĉiam kontenta ŝajnigi sin nur
 malgraŭ sufer' kaj mil doloroj.
 Sed la interna sent' ja restas sekret'.

ĈIUJ DE LA MOND' VIRINOJ*Alle Frauen dieser Erde *** N. Ignatiathis N.: mondkanto*

Insuloj, ni estas du insuloj maraj,
 kuniĝas nur en noktoj raraj en malheleca ŝirmfavor'.
 Min tenu, kapablas sole vi, min tenu,
 brakumu min kaj al vi premu. Ni estas du, sed unu kor'.

Ĉiuj de la mond' virinoj estas mi por vi.
 Ni flugas alten trans la stelojn,
 neniŭ ombro ĉirkaŭ ni.
 Ĉiujn de la mond' virinoj trovas vi en mi.
 Se pro feliĉ' vi preskaŭ kreas,
 mi estas je l'vekiĝ' ĉe vi.

Du manojn, mi havas ilin por vin teni,
 karese ili volas veni kaj kun tenero serĉas vin.
 Kolorojn, la nokt' nun havas mil kolorojn,
 kaj se vi sentis amdolorojn, vi nun ja sentas sole min.

DANCADAS LUN' KAJ STELOJ*Es tanzen Mond und Sterne *** F. Schubert: Gondolisto*

Dancadas lun' kaj steloj fantome sur l'ĉiel'.
 Ĉu fari al si zorgojn pro tera bagatel'?
 Kaj sub la luna arko ondnaĝu mia barko,
 senlime sur l'ondar' luladas vin la mar'.
 Meznokta son' aŭdiĝis de l' alta Markotur'
 dormetas ĉiuj pace, dormetas ĉiuj pace, ja pace,
 ŝipisto gardas nur.

DANCADI EMUS MI*I could have danced all night *** F. Löwe: My Fair Lady*

Lit', lit', ne logas min la lit'!
 Ne dormas, kiu ŝvebas en ĉiel'.
 Dorm', dorm', ne pensas mi pri dorm',
 ne por plej valora kronjuvel'.
 Dancadi emus mi, la tutan nokton mi,
 kaj petus daŭre plu.
 Kun mir' mi sentas nur:
 mi pekus kun plezur' pro la mistera ĝu'.
 Mi ĝis la grund', ĝis la profund' ekscitis,
 kaj mia kor' forkuris ĝi.
 Ĉar dancis li kun mi.
 Laŭ tiu melodi' en sonĝo dancas mi nun pli.

DANCU, DANCU*Tancuj, tancuj *** popolkanto slovaka*

Dancu, dancu, turnu vin, fornon ne forŝovu ĝin,
 ĉar necesas vintre ĝi same, kiel lit' al mi.
 Kaj soldat' gardstaras li, la mantel' - kun truoj ĝi.
 Staras ĝis la nokta fin', kovras jam la roso lin.
 Ciganinon batis li, al surtut' la edz' de ŝi.
 Tamen tuj ŝi venĝis sin, per forkeg' rebatis lin.

DANKON

*Danke *** M. G. Schneider: kanto religia moderna*

Dankon elkore pro l'mateno,
dankon pro ĉiu tag' por mi,
dankon, ke mi kun plag' kaj peno trudu min al Vi.

Dankon pro ĉiuj gekaruloj,
dankon pro ĉiu hom', ho Di',
dankon, ke eĉ al kontraŭuloj ne koleras mi.

Dankon, ke mi laboron havas,
dankon pro ĉiu feliĉig',
dankon, ke min la lumo ravas kaj por la muzik'.

Dankon, eĉ en malĝoj' mi fidas,
dankon pro ĉiu bona vort',
dankon, ke Via mano gvidas min en mia sort'.

Dankon, ĉar Via grac' sen limo,
dankon, ĝin fidas mia kor',
dankon, ke danki kun estimo rajtas mi, Sinjor'.

Dankon elkore pro l'mateno,
dankon pro ĉiu tag' por mi,
dankon, ke mi kun plag' kaj peno trudu min al Vi.

DE ŜIA PACO

*Nur ihrem Frieden *** W. A. Mozart: Don Giovanni*

De ŝia paco mia dependas,
kaj ŝia ĝojo al mi etendas,
se ŝi suferas, mortas mi jam, mortas, mortas mi jam.
Ja ŝiaj ĝemoj por mi doloro
kaj la kolero kaj ŝia ploro; feliĉ' nur ŝia por mi balzam'.

DEVAS MI EL LA URB'*Muss i denn *** popolkanto germana adiaŭa*

Devas mi, devas mi el la urb' migri nun, urb' migri nun,
kaj vi restos tie ĉi.

Sed revenos, revenos, revenos mi ja, venos mi ja,
kaj mi vivos nur por vi.

Ja mi vin forlasi devas nun, sed min tiros am' al vi.

Mi revenos, revenos, revenos mi ja, venos mi ja,
kaj mi vivos nur por vi.

Ploras vi, ploras vi, ĉar mi migros nun for, migros nun for,
kvazaŭ am' ne estus pli.

Eĉ se multaj knabinoj jen vivas en mond', vivas en mond',
mi fidelos nur al vi.

Ho, ne pensu, pro alia in' ne plu amon sentus mi.

Eĉ se multaj knabinoj jen vivas en mond', vivas en mond',
mi fidelas nur al vi.

Pasos jar', pasos jar', pretos vinberoj jam, vinberoj jam,
tempo por reven' al vi.

Kaj se tiam ankoraŭ vi amos min, amos min,
la edziĝon festos ni.

Pasos jar', kaj ree venos mi, apartenos nur al vi.

Kaj se tiam ankoraŭ vi amos min, amos min,
la edziĝon festos ni.

DONAC' DE ROZOJ EN TIROL*Schenkt man sich Rosen *** C. Zeller: La birdovendisto*Adam:

Donac' de rozoj en Tiroł', kion signifas la parol'?
Ne nur la rozojn pro inklin', oni ja mem eĉ donas sin.

Aŭdu la sonojn el la kor', aŭdu la sonojn kun favor',
aŭdu, konsolu dolĉe min, kaj kun la rozoj donu vin.

Donac' de rozoj en Tiroł', kion signifas la parol'?

Ne nur la rozojn pro inklin', oni mem donas eĉ sin.

Kia feliĉ' en spegul' de ŝia ĉarma okul'!

Rozoj por mi kun plezur', sed ne la rozoj nur.

Princelektistino:

Donac' de rozoj en Tiroł', kion signifas la parol'?

Ĝi ne validas ĉie ajn, ĉar ni jen estas ja ĉe l'Rajn.

Portas feliĉon mi por vi, do ne reprenas la rozojn mi.

Prenu la rozojn kun plezur', sed la rozojn sole nur.

DONU MANON, DONU ĜIN*Her die Hand, es muss sein (Werberlied) *** J. Strauß: La ciganbarono*

Donu manon, donu ĝin, for de l'ino kara.
 Trinku nun el varbo-vin' de la trup' husara.
 Jen la ĉako por la kap', sekvu la husarojn,
 kaj la malamikoj, knab', spertu kun tim' viajn farojn.
 Jen vin', jen vin'!
 Jen la vin', prenu ĝin, kaj trinku tuj!
 Trinku el plena glas', vivu! Vivu la arme', vivu la arme'!

Frat', validu via ĵur', donu vian forton,
 ĉar hungaroj konas nur venkon ja aŭ morton.
 Sango nia, fluu ĝi ruĝe en la teron,
 en batalo kreas ni al malamik' senesperon.
 Jen vin', jen vin'!
 Jen la vin', prenu ĝin, kaj trinku tuj!
 Trinku el plena glas', vivu! Vivu la arme', vivu la arme'!

Ĉardas:

Ni estu gajaj nun sen fin' ĉe plena glas' da vin',
 ĉe bona, fajra vino, ĉar ĝin ŝatas la husar', hej!
 Kaj kiam vinon havas ni, montriĝas kun pasi'
 knabinoj ame sen avar', hej, bonvenaj al husar', hej!
 Vi bruna, ne hezitu vi husaron kisi pli kaj pli,
 ĉar li kaj vi ja estas bela par', hej!
 Ja estas am' sen kompromis'
 frandaĵ' kun vin' kaj via kis',
 ja kis'. Prenas ĝin la husar'.
 Kaj ĉiam estu vin' kaj am' de l'vivo fajra flam'.
 Jes, kaj ilin dum la tuta jar', hej, amas la husar'.

DORMU, AMATA*Dobrá noc *** popolkanto slovaka*

Dormu, amata, ho, dormu vi!
 Estu kun vi ĉiam ben' de Di'.
 Dolĉe vi dormu nun, venu en sonĝo al vi fortun'.
 Vidu en sonĝo, ho, vidu min,
 kaj post la dorm' sonĝo diru vin:
 amas vin mia kor', kun vi ĝi estas en ĉiu hor'.

DUM FLUAS KLARAJ FONTOJ

*Wenn alle Brunnlein fließen *** popolkanto germana*

Dum fluas klaraj fontoj, freŝiĝi volas ni.
Knabinon mi ne voku, per manoj gestas mi.
Knabinon mi ne voku, mi ne voku, per manoj gestas mi.

Per frapo de piedo alfluas mia am'.
Jen inter la knabinoj la mia estas jam.
Jen inter la knabinoj, la knabinoj, la mia estas jam.

Kaj ĉu mi ŝin ne amu? Ĉar estas ŝi anĝel'.
Okuloj respegulas bluaĵon de l'ĉiel'.
Okuloj respegulas, respegulas, bluaĵon de l'ĉiel'.

La vangoj esta ruĝaj samkiel ruĝa vin'.
Pli ĉarma ne troviĝas ol tiu belknabin'.
Pli ĉarma ne troviĝas, ne troviĝas, ol tiu belknabin'.

EKDORMU, ANĜELINA

*Schlaf ein, Angelina *** E. Bader: lulkanto moderna*

Ekdormu, Anĝelina, jen luhela bril',
vian manon mi tenas kaj estas trankvil'.
Lunbrilon la nuboj forkovros nun ĝin,
por ke malamikoj la domon ne trovu kaj ne vidu nin.

Ekdormu, Anĝelina, la patr' estas for,
la tero neĝblanka, frostsentas la kor'.
Tra sablo ardvarma marŝadas nun li.
Ekdormu, Anĝelina, ĉar tion kompreni ne povas vi.

Patrin' alilanda kun sia infan',
ŝi ploras, firmtenas ĝin per sia man'.
La patro nin pafas, ĉar devas ja li.
Infan', ili estas de ni malamikoj, komprenas ne vi?

Kaj por la kanonoj de l'pastroj la ben',
ĉe ili kaj ni pastroj venkpreĝas jen.
La patroj forsangas en plena solec'.
Ho, mia infan', kial nur estas tia hororkruelec'?

Vir' skribas al ŝi, "ĝis revid', mia kor'",
sed pasas la jaro, kaj li restas for.
Kaj ŝi sin ornamas per flor' kaj burĝon'.
Ekdormu, Anĝelina, la floroj forvelkas je mortokron'.

Kaj trovos vi viron, kaj amos vi lin,
jen ĉie ja homoj, forgesu ne ĝin!
Ja ĉie nur larmoj, samkiel ĉe mi!
Ne diru: "jen sorto", sed ŝanĝu kaj agu pli bone ol ni!

EKMURMURIS MONTOJ

*Zahučali hory *** popolkanto slovaka*

Ek murmuris montoj, zumis la arbaroj:
kien malaperis miaj junaj jaroj?

Al la junaj jaroj mankis la beleco,
kaj malgaje pasis temp' de la juneco.

Eĉ ŝtoneg' en akvo, fine ĝi sin movas,
sed la junaj jaroj ne reveni povas.

EL ALTA ĈIELO

*Vom Himmel hoch *** M. Luther: kanto germana kristnaska*

El alta ĉielo portas mi novaĵon bonan jen al vi.
Pri dibonec' kaj difavor' kantadas nun l'anĝela ĥor'.

Infan' naskita ja por vi de virgulin' pro grac' de Di'.
Kaj delikate li sen fin' ĝojigu amoplene vin.

Li estas Kristo, la Sinjor', kondukos mondon el dolor'.
Savanto estos li por vi, purigos vin de l'pekaj li.

Ni laŭdu lin per ĝoja son' kaj iru al la dia don'.
Kun la paŝtistoj vidu ni la filon, kiun sendis Di'.

Al Dio glor', honor' kaj grac' pro lia fil', ĉieldonac'.
L'anĝeloj ĝoje kantas nun pri estonteco kaj fortun'.

ELFREĜO*Erlkönig *** F. Schubert*

Rajdadas tra vent' kaj noktnebul'
la patro kun febranta etul'.

La knabon firmitenas sur sia sel',
brakŝirmas varme lin sub mantel'.

"Ho, fil', vi tremas, ŝvitperlas la frunt'?"

"Jen, patro, elforeĝ' en profund',
la elforeĝo kun kron' kaj trenaj'."

"Filet', nebul' nur kaj arbaĵ'."

"Vi ĉarma knab', ho, venu nun,
ni kune ludos en bril' de lun'.

Kaj buntaj floroj ĝojigos vin,
orajn vestojn havas mia patrin'."

"Ho, patro, ho, patro, ĉu aŭdas ne vi?
L'elfreĝo dolĉe promesas al mi."

"Karulo, trankviliĝu, infan',
susuras vento tra seka kan'."

"Vi, ĉarma knab', akompanu min,
la filinoj vartas, dorlotos vin.

La filinoj dancos en nokta rondad',
vin lulos kaj kantos por via dormad'."

"Ho, patro, ho, patro", ĝemegas la fil',
"elfinoj jen kun obskura bril'."

"Filet', filet'" ekkonas mi ĝin,
salikoj la grizaj trompas nur vin."

"Mi amas vin, allogas min via belec',
kaj se vi ne volas, vin venkos fortec'!"

"Ho, patro, li venas, nun sentas mi lin!
Elfreĝo krude perfortas min."

Rapid-horora la patra rajdad' -
en brak' aŭdiĝas singulta ĝemad'.

Kun pen' li venas ĝis la kort',
prenita estas la knab' - de l'mort'.

ELKRESKIS ROZBRANĈETO*kanto kristnaska germana eklezia*

Elkreskis rozbranĉeto el rozarbust' de Di'.

Aŭguro de profeto rakontis jam pri ĝi.

Naskiĝis rozfloreto' meze en vintra nokto
laŭ diro de l'profet'.

Ja naskis tiun rozon, Jesaj' prognozis ĝin,
el sia korpo sproson Mari' la Virgulin'.

Laŭ dipotenca vol' ŝi naskis Di-infanon
por tuta mond' konsol'.

Kaj tiu belfloreto tre hele lumas ĝi.

Obskuron la brileto forprenas nun de ni.

Vi hom' kaj vera Di'el pekoj kaj suferoj
estas savant' por ni.

EN ARBARA GASTEJO*In der Waldschenke *** R. Simon*

Jen tra l'arbar' mildblovas vent'. En arboj centjaraĝaj
 gastej' sin kaŝas en silent' por trinkoj, revoj plaĉaj.
 Trinkaj' sendube gustas, ha, nenie ĝi pli bone, ja,
 ol kie arboj muĝas profunde en l'arbar'.

Kaj tie en trankvila ej', arbara profundeco,
 el man' knabina en gastej' trinkaĵ' de ĉiu speco.
 Okuloj belaj, ĉarma mien' invitas al restado jen,
 ja, kie arboj muĝas profunde en l'arbar'.

De vi servita, ho, knabin', bongustas klara vino.
 Por l'pipo fajron donu min, aŭskultu ĝis la fino.
 Sidiĝu iom apud mi, ĉar nun rakontas mi al vi,
 pri kio arboj muĝas profunde en l'arbar'.

EN KEL' PROFUNDA*Im tiefen Keller *** trinkkanto germana*

En kel' profunda sidas mi ĉe plenbarel' da vino
 kaj antaŭ mi da vino ĝi de bona origino.
 La vinkelist' laŭ oportun', li ĝojas, se mi drinkas,
 Boneghumore fartas mi - kaj trinkas, :trinkas:.

Soif' turmentas, ĉi demon', ĝin devas mi forpeli.
 Kaj tre efikas la propon' per vino tion celi.
 La mond' ŝajnigas nun, ke ĝi sin rozkolore ŝminkas:
 Boneghumore fartas mi - kaj trinkas, :trinkas:.

Sed la soifo kreskas nur post ĉiu freŝa vino,
 la konsekvenc' de la natur' pro trinkofest' sen fino.
 Konsolas min, dum sen konsci' al planko mi nun sinkas:
 Neniun suferigis mi, sed trinkas, :trinkas:.

EN KORNON ĈASISTO BLOVIS*Es blies ein Jäger *** popolkanto germana*

En kornon ĉasisto blovis dum ĉasad', ja dum ĉasad',
sed vana, tute vana estis la blovad'.

Husasa, juĥhajrasa,
sed vana, tute vana estis la blovad'.

Ĉu vere la blovado perdiĝos ĝi? Perdiĝos ĝi?
Ne ŝatus esti plu ĉasisto mi.

Husasa, juĥhajrasa,
ne ŝatus esti plu ĉasisto mi.

Li reton ĵetis ĉirkaŭ la arbust' kun rutin',
arbust' kun rutin'.
Elsaltis nigrebruna belega knabin'.

Husasa, juĥhajrasa,
elsaltis nigrebruna belega knabin'.

Ne fuĝu, mia kara, ho, vi bruna knabin',
vi bruna knabin',
ĉar miaj grandaj hundoj kaptos vin.

Husasa, juĥhajrasa,
ĉar miaj grandaj hundoj kaptos vin.

Li ĵetis la reton ja ĉirkaŭ ŝin, ja ĉirkaŭ ŝin.
Fariĝis ŝi ja nun de l'ĉasist' edzin'.

Husasa, juĥhajrasa,
fariĝis ŝi ja nun de l'ĉasist' edzin'.

EN KVIETA SANKTA NOKTO*An der steller hell'jer Nuecht *** kanto luksemburga*

Mil kandeloj lumas hele, kia lukso, kia bril'!
Mil abioj pompas bele por la Sankta Nokt-jubil'.

Kiom devas ni mediti, ke bonorda ĉiu don',
temp-forĵeton ne heziti, rolon ne plu ludas mon'.

Tute solaj jen olduloj sen konsol' kaj en malsan'.
Kaj por povraj gejunuloj je Kristtag' ne estas pan'.

Larmoj, malriĉec', sufero kaj malam', envi', malbon'
abundegas sur la tero ĝuste nun en ĉi sezon'.

Vunde sangas la homaro pro suferoj sen respond'.
Rev' kristnaska kun amaro: paco estu en la mond'!

EN MARTO*Im Märzen der Bauer *** popolkanto moravia*

En marto ĉevalojn aljungas kampul',
semadas, erpadas la diligentul'.
Preparas la teron per sia plugil',
matene, vespere, sen iu trankvil'.

EN NEĜA LA MONTARO*Und in dem Schneegebirge *** popolkanto silezia*

En neĝa la montaro fontet' fluadas ĝi.
Kaj kiu el ĝi trinkas, ja ne oldiĝos li.

Kaj ofte akvon freŝan el ĝi ja trinkis mi.
Neniam mi oldiĝis, fariĝis juna pli.

"Adiaŭ, ni disiĝas, adiaŭ, karulin'."
"Sed kiam mi revidos, ho, korkarulo, vin?"

"Se neĝos ruĝaj rozoj, se pluvos blanka vin'."
"Adiaŭ, ni disiĝas, adiaŭ, karulin'."

"Neniam pluvos vino, nek neĝos ruĝa flor'.
Revenos vi neniam, karul' de mia kor'."

EN TIU SANKTA HALO*In diesen heil'gen Hallen *** W. A. Mozart: La sorĉa fluto*

En tiu sankta halo de l'bon' nur lumas flam'.
Se homon trafas falo, regvidos lin la am'.
Ĉe man' amika de gvidant' li migras al pli bona land'.

En tiu lok' benita ne malamika nom'.
Ne regas ag' perfida, al ĉiu hom' pardon'.
Honoras hom' ne amon li, meritas ne homecon pli.

EN VILAĜ' VIVAS JEN*A ja v tej vyšnej vsi *** popolkanto slovaka*

En vilaĝ' vivas jen amkonkurantin',
tute ne tuŝas min, se ŝi amas lin.
Amu ŝi, ĉar por mi estas aliul',
multe pli bela li, tiu korkarul'.

Kaj amint' venas jen, staras ĉe la pord',
volas rigardi li ja al mia kort'.
Tie ĉi en la kort' ne restadu vi,
ĉar ne plu estas vi la amant' de mi,
aĥ, la amant' de mi.

ERIKEJAJ BETULOJ*Alle Birken grünen *** popolkanto germana*

Erikejaj betuloj en freŝverda bel',
 la genist' orbrilas kiel flam',
 gaje trilas alaŭdoj sub alta ĉiel',
 ĉiu tetro glugluas pro am'.

La rigardo migradas kun miro kaj ĝu'
 tra la marĉa, blankfloka belec',
 sur l'erika flormar' sub lazura blu',
 kaj ĝi ŝvebas al ĉiela altec'.

Al la blua ĉiel, kie vagas nubet'
 kiel silkmalpeza lanflok'.
 El la koro elsonas etera kantet',
 kiu flugas al ĉielalta lok'.

Delikata kant', tenera kant',
 kiel filigrana arĝent',
 kiel nubo migranta jen super la land',
 kiel lanfloketo en vent'.

ESTIS PLENA MIA ĈARO*Hab' mein Wagen vollgeladen *** popolkanto germana*

Estis plena mia ĉaro de maljunulinoj;
 tra la urbo ili fie sakris tuj sen fino.
 Do sankte mi nun ĵuru, maljunulinoj ne veturu.
 Tiru, tiru ĉeval', tiru ĉeval'!

Estis plena mia ĉaro de maljunaj viroj.
 Dum veturo tra la urbo sonis aĉaj diroj.
 Do sankte mi nun ĵuru, olduloj ne plu kunveturu.
 Tiru, tiru ĉeval', tiru ĉeval'!

Estis plena mia ĉaro nur de junulinoj.
 Tra la urbo ili kantis bele kaj sen fino.
 Do sankte mi nun ĵuru, ke nur knabinoj kunveturu.
 Tiru, tiru ĉeval', tiru ĉeval'!

FERVOJKANTISTA DEVIZO*Eisenbahner Sängerspruch*

Sonu, ho, kant', iĝu agad',
 kiel mondojn kunligas flugilorad'.
 Sonu, ho, kant', iĝu agad'!

FINIĜAS TAG'*S'ist Feierobnd *** vesperkanto el Erzmontaro*

Malantaŭ mont' jam sinkas sun',
 krepusko venas nun.
 Kaj ankaŭ fin' de peza tag'
 kaj fin' de ĉiu plag'.

Finiĝas tag', finiĝas tag', farita la labor'.
 Kaj hejmen ĉiuj iras nun, ŝtelpaŝas nokta hor'.

Ankoraŭ flugas ĉe l'arbar' al sia nest' birdet',
 kaj sonorilo vokas jen: nun dormu en kviet'!

Finbatis multaj koroj jam, forpasis zorg' kaj pen'.
 Aŭdiĝas tra l'arbar' susur', ho, milda noktsolen'.

FLUGIS POR NI BIRDO*Mali sme my vtáka *** popolkanto slovaka*

Flugis por ni birdo, flugis por la glor',
 flugis por la libereco, fine estis plor'.

Fine estis plor', kaj terura ŝok';
 flugis por la libereco, mortis li sur rok'.

Mortis li sur rok' kun rompita al'.
 Nun burĝonas libereco el la ter' post fal'.

Kie tombo via estu en fidel'?'
 Ja sur roko alte kruta mia ĉi kastel'.

FLUGU, FALKO*Zalet', sokol, biely vták *** popolkanto slovaka*

Flugu, falko, kun destin' al amato mia;
 kaj silente petu lin ĉe fenestro lia.

Ke vespere venu li je malfrua horo,
 ĉar atendas arde mi, portas lin en koro.

FLUSTRU MIN PRI AM'

*Parlez-moi d'amour *** I. Lenoir *** kanzono franca*

Vi scias ja, ke ĉio ĉi feliĉ' por mi, kaj ĉiam mi
deziras aŭdi de vi la vortojn sopiratajn.

Se via voĉ' karesas min, tremadas man' en mia sin',
sorĉigas min la vort' amata, ĝin kredi kiel dezirata:

Flustru min pri am', milfoja flustrad' kun adoro.

Dolĉajn vortojn ne laciĝas aŭskulti la koro.

Ho, ripetu arde, vi mian vivon ornamas:

"mi vin amas".

Dolĉa rimed', la malsaĝec' kontraŭ la viva amarec'.

Mia karul' amata, ne lasu min soleca.

Ĉagren', rapide pasas ĝi, donacas al mi kisojn vi.

Feliĉon mia kor' sopiras, la vortojn aŭdi mi deziras:

Flustru min pri am', milfoja flustrad' kun adoro.

Dolĉajn vortojn ne laciĝas aŭskulti la koro.

Ho, ripetu arde, vi mian vivon ornamas:

"mi vin amas".

FORAS VI

*Tu t'en vas *** A. Barriere *** modkanto franca*

Li: Foras vi.

Ŝi: Sed ne, karul', signifas nur atendon etan ja elteni.

Li: Foras vi.

Ŝi: Mi ĝojas, revas nur por vi,
ne eblas tion miskompreni.

Li: Foras vi.

Ŝi: Sed nia amo ligas nin, neniŭ povas ĝin forpreni.

Li: Foras vi.

Ŝi: Disiĝo ofte helpas ja sin forte ami, sin kompreni.

Li: Foras vi, kiel somer' kaj sundimanĉ'
kaj kiel stel' sur firmamento.

Ambaŭ: Timigas min la vintra frost', la peza ŝarĝo de l'atendo.

Li: Foras vi, la birdoj kantos nun ne plu,
min premos nur funebra sento.

Ambaŭ: Ho, timas mi, timegas mi, ke poste venos la silento.

Li: Foras vi.

Ŝi: Sed ne, karul',
signifas nur foriron etan sen graveco.

Li: Foras vi.

Ŝi: Karul', vi scias, estas ja de l'vivo nur kaprica eco.

Li: Foras vi.

Ŝi: La temp', la spac' ne gravas plu,
se restos via fideleco.

Li: Foras vi.

Ŝi: Por geamantoj ĉiu tag' fariĝas nova komuneco.

Li: Foras vi,
mi sentas kiel iam min perdita dum infanlamento.

Ambaŭ: Timigas min la vintra frost', la peza ŝarĝo de l'atendo.

Li: Foras vi, por mi la mond' nigriĝas nun,
la tuta viv' senfina plendo.

Ambaŭ: Ho, timas mi, timegas mi, ke poste venos la silento.

FORPISIS VINTRAJ HOROJ*Der Winter ist vergangen *** popolkanto germana*

Forpasis vintraj horoj, jam venas ĉarma maj'.
 Helbrilas buntaj floroj, en koro kreskas gaj'.
 Sub arboj en la valo - feliĉa amikar'.
 Jubilas najtingalo kaj birdoj de l'arbar'.

GAJA ESTAS MARVOJAĜO*Eine Seefahrt, die ist lustig *** kanto germana marista*

Gaja estas marvojaĝo, bela estas marvojaĝ'.
 Oni ĉiujn homojn vidas sputi kraĉon el vizaĝ'.

GAJE VIVAS CIGAN-VAGULO*Lustig ist das Zigeunerleben *** popolkanto silezia*

Gaje vivas ciganvagulo, farja, farja, ho.
 Vivas li kiel liberulo, farja, farja, ho.
 Zorgojn ja ne konas li, ĉiu tago idili'.
 Farja, farja, farja, farja, farja, farja, ho.

En la poŝo eĉ ne monero, farja, farja, ho.
 sed la kor' batas en libero, farja, farja, ho.
 Nek imposto nek kalkul', vivas kiel feliĉul'.
 Farja, farja, farja, farja, farja, farja, ho.

Pro soifo la gorĝo brulas, farja, farja, ho.
 en rivero la akvo rulas; farja, farja, ho.
 bona pli ol bona vin' brilas akvo en ravin'.
 Farja, farja, farja, farja, farja, farja, ho.

Aŭ sur pajl' aŭ sur kruta tero, ho.
 trovas liton li sen sufero, farja, farja, ho.
 La vagulo sen kusen' ĝuas je la dorma ben'.
 Farja, farja, farja, farja, farja, farja, ho.

GRANADA*Granada *** A. Lara *** fantazio hispana*

Granada, tero revata de mi.
 Mia kant' fariĝas cigana, sopiranta je vi.
 Mia kant' plena de fantazio,
 mia kant', flor' de melankolio,
 mi ĝin donacas al vi.

Granada, vi tero de sangaj bataloj kun taŭroj,
 virinoj sorĉigas el nigraj okuloj de l'maŭroj.
 En sonĝo vin kovras plenĉarme, cigane mil floroj.
 Mi kisas la lipojn sangruĝajn,
 kaj ili rakontas al mi pri amoroj.

Granada, knabin' prikantita per ardaj kantetoj,
 por via beleco jen estas el rozoj bukedoj.
 La rozoj en dolĉa odoro allogas
 la brunan virinon amatan.
 Granada, vi lando de l'ĉarmaj inoj,
 sanga la tero, kaj ora la sun'.

GRATULON KORAN JEN AL VI*Geh' aus mein Herz *** Hardei A.*

Gratulon koran jen al vi, feliĉon nur deziras ni.
 Sukces' kun via mano!
 Vivĝu' kun vi en gaja rond', ĝojigu vin la dia mond'!
 Jen tost' je via sano! Jen tost' je via sano!

GVIDU MIN, DI'*Schaff's mit mir, Gott, nach deinem Willen *** J. S. Bach *** kanto religia*

Gvidu min, Di', laŭ via volo, ĉiam okazu Via decid'.
 Estu por mia anim' konsolo, vivas en mi por vi nur fid'.
 Certe vi zorgos, ho, Sinjor', daŭre por mi en ĉiu hor'.
 Gardas, Sinjor', vi min tre ŝirme, ligas al vi min forta fid'.
 Ĉiam al vi mi sekvas firme, helpas vi kontraŭ ĉiu insid'.
 Di', se nur vi protektas min, estas sekur' ĝis viva fin'.

ĜIM, ĜONI KAJ ĜONAS'*Jim, Jonny und Jonas *** modkanto*

Arĝentas la steloj de l'ĉielo, feliĉe revas la kor'.
 Kaj dolĉe, kiel mielo, sonadas de l'amo la ĥor'.
 Rakontas de rozoj logantaj, florantaj en belo kaj ĉarm',
 la fremdajn maristojn vokantaj al palma insulo de l'am'.
 Ĝim, Ĝoni kaj Ĝonas malgajaj en Javo sur kaj'.
 Ĝim, Ĝoni kaj Ĝonas sopiras havenon Havaj'.
 Ĝim, Ĝoni kaj Ĝonas jam konas de l'mondo la fam' -
 Nenie ĝis nun tiel bele briladis la steloj de l'am'.

** Jim, Jonny kaj Jonas***ĜUE KISIS INOJN MI***Gern hab' ich die Frau'n geküsst *** F. Lehár: Paganini*

Ĝue kisis inojn mi, ne tuŝis min ilia opini'.
 Pensis nur kun plezur' ĝoje mi: ho ilin kisu nur.
 Por mi la amo estas bagatel', ardamas mi,
 ne gravas la fidel'.
 Viro mi, sciu vi: Ankaŭ ja aliajn amas mi.
 Belega estas de l'am' la flam',
 doloras forte la falsa am'.
 Tre feliĉigis min ĝia tener', kaj malgajigis la fina sufer'.
 Kun ĝu' mi amis, kun malfeliĉ', frenez' min kaptis,
 pasidediĉ'.
 Memoras mi kun ridado kaj plor', feliĉon serĉas,
 sed fuĝis ĝi for.
 Ĝue kisis inojn mi, ne tuŝis min ilia opini'.
 Pensis nur kun plezur' ĝoje mi: ho ilin kisu nur!

HANĈJO KAJ GRENJO

*Hänsel und Gretel *** kanto germana infana*

Hanĉjo kaj Grenjo eraris en arbar'.
Estis mallume, timiga la erar'.
Kaj fine ili venis al mielokuka dom',
sed kiu estas de l'posedant' la nom'?

Hu! Elrigardas malbela sorĉistin'.
Logas l'infanojn, ŝajnigas kara sin.
En ŝia kap' minacas danĝer-diabla plan':
volas en forn' Hanĉjon baki nun laŭ pan'.

La sorĉistino al forno klinis sin.
Tuj eta Grenjo en fornon puŝis ŝin.
En forn' ŝi devis rosti, tre ĝusta la destin'.
Jen de l'fabelo pri Hanĉjo, Grenjo fin'.

HANĈJO KAJ LINJO

*Und der Hans schleicht umher *** popolkanto germana*

Hanĉjo ŝteliras jen, kun tre pala vizaĝo,
kaj la kor' sen kuraĝo, dum la kapo klinas sin.
Staras Linjo belvestita, kun korsaĵo orlaĉita,
al ĉielo la okulojn turnas, ne rigardas lin,
al ĉielo la okulojn turnas, ne rigardas lin.

Venu, Linjo, al mi! La ĉiel' ne estas hela,
sed en koro fidela ardas amo al vi!
Ne vin tenu je distanco, donu kison nun al Hanĉjo,
tiam ankaŭ subite heliĝos la ĉiel',
tiam ankaŭ subite heliĝos la ĉiel'.

Kaj li petas jam pli, tiras ŝian harplektaĵon,
Linjo turnas la vizaĝon jam duone al li.
Kaj eĉ nun ŝi ekridetas, dum momento ŝi koketas,
donas kison al Hanĉjo, ĉio bone estas nun,
donas kison al Hanĉjo, ĉio bone estas nun.

HARPO ESTAS MIA ANIMO

*Eine Harfe ist meine Seele *** L. Koster *** kanto el Luksemburgio*

Harpo estas mia animo, kiel eter'.
Kaj mistere ellogas viaj vortoj sorĉsonojn el ĝiaj kordoj,
ordelicajn, kiel ne de tiu ter'.
Mola, karesa kant', tenera trezoro,
kanto por delikata horo.
Harpo estas mia animo,
amik', ho, sonigu vian harpon,
amik', amik'.

HELRUĜAN POMON*Červené jablčko v oblôčku mám *** popolkanto slovaka*

Helruĝan pomon mi havas kun mi,
 kaj por knab' amata estu ja ĝi.

Kaj mian Janiĉkon plej amas mi,
 pomon la helruĝan, donos al li.

HO, ACER'*Javoru, javorník *** popolkanto slovaka*

Ho, acer', acer' vi, estas vojeto sub ĝi.
 Se edziniĝos ŝi, kien do iros mi?

Ho, acer', acer' vi, nun arbustar' sub ĝi.
 Restis vojeto pli, iros tra vepro mi.

HO, BELA REV'*Hör ich die Stimme im Traum *** G. Bizet: La perlfisistoj*

Ho, bela rev', ho, tempo', kiam mi retrovis ŝin.
 Silentis al amik', kuele mi perfidis lin.
 La nokt' jam sinkis ĝi, jen konfesis treme mi
 al ŝi pri mia arda am', brulanta en l'animo, eterna flam'.
 Ĉe l'bril' de l'steloj aŭdis ŝi, ripozis ŝi ĉe mia kor'.
 Mortis por ni la mond', kaj ridis ĉielfavor'.
 Ho, nokt', dolore trompis vi, suferon lasis nur al ni.
 Mi fuĝis for pro mia ĵur'.
 En danĝer' eĉ estus ŝi, troviĝus ia spur'.
 Neniam, bela rev', revenos vi.

HO, BONI**My Bonnie *** kanto marista*

Ho, Boni, li estas tre fore, ja, Boni, li estas sur l'mar'.
 Sopiras mi Boni tutkore, atendo, ho, kia amar'.

Boni, Boni, venigu la Boni de l'mar al mi.
 Boni, Boni, venigu la Boni al mi.

* Bonnie

HO, ĈARMULINOJ*Sagt holde Frauen *** W. A. Mozart: La nupto de Figaro*

Ho, ĉarmulinoj, ho, diru min,
 ĉu min la amo brulas sen fin',
 ĉu min la amo brulas sen fin'?

Al vi mi plendas, inoj, al vi,
 ĉar vi kunsentas samkiel mi.
 Ĉiam la koro spiris sen prem',
 sen amdoloro, sen tima trem'.

Arde nun torentas sentoj tra mi,
 poste min turmentas kvazaŭ glaci'.
 Serĉas fortunon sur iu stel',
 nomas la lunon eĉ mia cel'.

Ĝema amoro daŭre nur pli,
 sopira ploro luktas en mi.
 Malĝoja ĉeno, tiu sufer',
 feliĉa beno tamen laŭ ver'.

Nun, ĉarmulinoj, ho, diru min,
 ĉu min la amo brulas sen fin',
 ĉu min la amo brulas sen fin'?

HO, DOLORIGAS MIN*Ach, wie ist's möglich dann *** amkanto germana malnova*

Ho, dolorigas min, devas forlasi vin,
 amas tutkore vin, kredu al mi!
 Perdis la koron mi, prenis ĝin tute vi,
 tiel mi amas nun sole nur vin.

Flor' blua ravas nin, la "neforgesumin".
 Premu ĝin al la kor', pensu al mi!
 Flor' mortas kaj esper', sed nia am-mister'
 mortos neniam ĝi, kredu al mi!

Estus birdeto mi, venus mi tuj al vi,
 ne timus falkon mi, flugus al vi.
 Pafus ĉasisto min, kuŝus en via sin',
 plore vi tenus min, mortus ĉe vi.

Ne volas la feliĉ', ke mi por vi dediĉ',
 tamen mi amas vin, ho, kredu min!
 Ne plu alia kor' ĝis mia lasta hor'
 min amu. Restos mi ĉiam por vi.

HO, ĜOJIGA VI, HO, BENITA VI*O, Du fröhliche, o du selige*

Ho, ĝojiga vi, ho, benita vi, gracoplena kristnaska temp'!
 Mondo perdiĝis, Kristo naskiĝis,
 ĝoju, ĝoju nun, ho, kristanar'!

Ho, ĝojiga vi, ho, benita vi, gracoplena kristnaska temp'!
 Krist' al ni sin ligis, li nin senpekigis,
 ĝoju, ĝoju nun, ho, kristanar'!

Ho, ĝojiga vi, ho, benita vi, gracoplena kristnaska temp'!
 Ĥoroj ĉielaj gloras, ili lin honoras:
 ĝoju, ĝoju nun, ho, kristanar'!

HO, KIU LIGIS NIN?*Wer uns getraut? *** J. Strauß: La ciganbarono*

Ho, kiu ligis nin? Jes, li. Piro! geedzigis nin
 sub blu', ĉiela blu' sen fin'.
 Nur vidu la gloron en majestec' kaj bril',
 en luma or', en luma or' de l'steloj mil' kaj mil'.
 Ja mildkantis najtingal' tra l'nokt' per voĉa bel':
 la amo, ĝi estas potenco de l'ĉiel'.
 Atestis kiu nin? Jes nin?
 Ja, du cikonioj nur, salutis ili kun plezur'.
 Kapjesis, klakadis por kvazaŭ diri nin:
 Ho, amu nur, ĉar estas vi en amo vir' kaj in'.
 Jam ofte feliĉon portis ni al hom' kun fidel',
 se amo ĉi loĝis, potenco de l'ĉiel'.

HO, MIA BELA NAPOLI*O mia bella Napol *** G. Winkler*

Sonas de l' kantistoj la kantetoj,
 flugas tra la muroj laŭ fantom'
 el ĉiuj la stratetoj al ĉiu eta dom'.
 Se iliaj mandolinoj plendas,
 al kantistoj flugas ĉiu kor'
 kaj en animo sentas, ke estas preskaŭ plor'.

Ho, mia bela Napoli, ja kiu vidis vin,
 ho, mia bela Napoli, restadus li sen fin'.
 Malhela la cipresarbar', Sankta Luĉia,
 odoroj dolĉvastigas sin tra la montar'.

Sentas ni al sudo la sopirojn,
 ŝatus ofte resti tie nun,
 ĉar trovis la feliĉon mi jen en varma sun'.
 De l'kantistoj sorĉas min la sonoj,
 de la vortoj ravas min signif'.
 Perdiĝas multaj tonoj, sed restos dum la viv:

Ho, mia bela Napoli, ĉemara urbo vi,
 ho, mia bela Napoli, sopiron sentas mi.
 Mi scias, ĉiam restos ja al Napoli,
 al mia bela Napoli fidela mi.

HO, MIA KORKARUL'*Dat du min Leevsten bist *** kanto nordgermana*

Ho, mia korkarul' estas ja vi.
 Venu dum nokt', venu dum nokt', venu al mi.

Venu je l'nokta mez', malfrua hor'.
 Dormas patrin' kaj patro jam, solas mia kor'.

Premu la klinkon nur, sed kun atent'.
 Pensas patrin' kaj patro ja, faras la vent'.

Venas matena stel', jam koka kri'.
 Korkarul', iri for devos nun vi.

INFANOJ, HO VENU*Ihr Kinderlein kommet *** kristnaska kanto germana*

Infanoj, ho venu, ho venu nun al
 la krip' en Betleĥem, mizerpovra stal'.
 Rigardu l'miraklon donitan al ni
 de l'patro ĉiela ĉi nokte de Di'.

Jen kuŝas sur pajlo kaj fojn' l'infanet'.
 Ĝin gardas Mari' kaj Jozef' en kviet'.
 Paŝtistoj preĝadas en sankta ador',
 ĉiele anĝeloj jubilas en ĥor'.

Genufleksu same ankoraŭ nun vi,
 kaj levu la manojn kaj danku al Di'.
 Kunkantu infanoj en tuta la land',
 plenĝoje kun supra anĝela glorkant'.

IOM DA PACO*Ein bisschen Frieden *** R. Siegel *** modkanto germana*

Ja kiel floron ĉe l'vintra komenc'
 kaj fajron en venta, glacia potenc',
 ja kiel pupon ŝatatan ne pli min tre ofte sentas mi.

Kaj tiam mi vidas la nubojn sur l'ĉiel'
 mi aŭdas la birdojn flugantajn sen cel'.
 Mi kantas en tim' pro obskura minac',
 esperas, ke estu pac'.

lom da paco, iom da suno
 por nia tero, por nia nuno.
 lom da paco, iom da ĝojo,
 iom da varmo mi petas por ni.
 lom da paco kaj da revado
 kaj por la homoj ne plu plorado.
 lom da paco, iom da amo,
 estu l'espero, ne iluzi'!

Ne pro miaj kantoj ŝanĝiĝas event',
 mi estas knabin' nur, kantanta laŭ sent',
 senhelpa, soleca, birdet' sen potenc'
 kun tim' pro la ŝtorm-komenc'.

JA, JA, LA CHIANTI-VIN'*Chianti-Lied *** G. Winkler*

Vivu glasoj kaj la vino, vivu sano, tralalala!
 Je la suno, je la vitoj, je la amo, tralalala!
 Kaj ni ridas, kaj ni kisas, kaj ni trinkas, tralalala!
 Tiaj oraj sorĉaj horoj nin konvinkas, tralalala!

Ja, ja, la Chianti-vin',
 ĝi tuj invitas nin al la feliĉ' sen fin'.
 La vivon, ĝuu ĝin ĉe l'ora Chianti-vin'!
 Ja, ĉe la Chianti-vin' neniam neas in',
 per vin' regalu nin,
 feliĉ' por ni destin' ĉe l'Chianti-vin'.

Jesas via kor' en la stela nokta blu',
 ho, favora hor', delikata amo-ĝu'.
 Flugas kanto-son', tuŝas nin la rava ton',
 kaj aŭskultas nun ni al la sorĉ-melodi' en feliĉa ebri'.

Dolĉe revas ni tra la temp' kaj spaco pli,
 funde dronas la kor', dum la kant' ŝvebas for,
 ĝis nin vekas la ĥor:

Vivu glasoj ...

JA MIA KOR' EN HAJDELBERGĜ' PERDIĜIS*Ich hab mein Herz in Heidelberg verloren *** F. Raymond*

Okazis dum vesper' en dudeka mia jar',
 mi kisis ruĝajn lipojn, ho, kia blonda har'!
 Beata nokt' briligis Nekarono laŭ arĝent'.
 Jen kaptis min, jen kaptis min en kor' feliĉa sent'.

Ja mia kor' en Hajdelberg perdiĝis,
 en varma nokt' okazis ĝi.
 Ĝis la orel' mi tiam enamiĝis
 alloge kaj aminde ridis ŝi.
 Kaj kiam antaŭ l'urbo ni disiĝis,
 la lasta kiso montris ĝin al mi:
 ke mia kor' en Hajdelberg perdiĝis,
 ĉe l'Nekarstrando batas ĝi.

Denove ĉe l'Nekaro ekfloras nun la vin',
 De tiam pasis jaroj, mi estas sen virin'.
 Kaj se vi min demandas, pro kio sola mi?
 Aŭskultu nun, aŭskultu nun, la kaŭzon diras mi:

Ŝanĝiĝis vi, de kiam ne plu mi vidis vin,
 al vi min tiras ĉio, vi urb' de korinklin'.
 Mi lasis vin, rezignis je vino kaj feliĉ'
 sopiras vin, sopiras vin, vi urb' por mi dediĉ'.

* Hajdelberg = Heidelberg

JAM ŜVEBAS NI

*Funiculi funicula *** L. Denzo *** kanto itala*

Vespere ni ascendis al la monto, ĉu diri ĝin?
Ne povis la afliktoj de la mondo plu ĝeni min.
Fajrego tie brulas, sed permesas ja gardi vin.
Ne sekvas ĝi, sed ankaŭ ĝi ne ĉesas, forgesu ĝin.

Alten, supren,
jam ascendas ni, ascendas plu, ascendas ja,
jam ascendas per Funikuli, Funikula.

De l'tero ĝis la pinto de la monto ne longa kur'.
Mi povus vidi ĝis la horizonto, vin vidas nur.
Ŝnurego tiras vin nun senprokraste al la ĉiel',
ĝi tiras vin facile, vente, haste jam ĝis la cel'.

Alten, supren,
jam ascendas ni, ascendas plu, ascendas ja,
jam ascendas per Funikuli, Funikula.

Ascendis monten, alten ŝi ĝis fino, atingis ĝin.
sed tamen ŝi revenis pro inklino por preni min.
La amo ŝvebas, ŝvebas kaj estiĝas nur ĉirkaŭ ni.
La koroj kantas, ĉar ŝi edziniĝas ja nun kun mi.

Alten, supren,
jam ascendas ni, ascendas plu, ascendas ja,
jam ascendas per Funikuli, Funikula.

JE L' FERVOJO EN ŜVABIO

*Auf der schwäb'schen Eisenbahne *** kanto ŝerca ŝvaba*

Je l'fervojo en ŝvabio jen stacio post stacio:
Ŝtutgart, Ulm kaj Biberaĥ, Mekenbojren, Durlesbaĥ.

Per la ŝvaba fervojeto kamparan' por vojaĝeto
ĉe l'giceto petis li tuj bileton nun por si.

Virokapron li aĉetis kaj fervore li ĝin metis
tuj ĉe la trajneta fin', fiksas per ŝnurego ĝin.

"Virkapreto, vi nun saltos, ĝis la trajn' denove haltos."
Vir' sidiĝis ĉe l'edzin', tabakpip' ĝojigas lin.

Trajn' atingis stacieton, serĉis li la virkapreton,
trovis tamen kapon nur, pendis ĉe la dika ŝnur'.

Tuj li ĵetis pro kolero kaprokapon tra l'aero
al la kap' de l'konduktor'. Tiu kriis pro dolor'.

"Pro kruela best-torturo kulpas la rapid-veturo.
Kiel punon nun al mi pagu la virkapron vi!"

JEN ĈE LUSEN*Hinterm Lusen *** popolkanto el Bavara Arbaro*

Jen ĉe Lusen lumas l'arbar' kaj briletas abiar',
 kaj jam venas vento mem,
 ĉar ĉiam estas Lusen ja de l'vent la hejm'.

Super Lusen nokta bel', brilas jam la stela hel',
 lumigas la monton mem,
 ĉar ĉiam estas Lusen ja de l'steloj hejm'.

JEN, JEN, JEN KAJ JEN*Es, es, es und es *** popolkanto germana*

Jen, jen, jen kaj jen, jen firma la decid',
 ke, ke, ke kaj ke mi iros sen revid'.
 Frankfurton nun rezignas mi, alian lokon serĉas mi.
 La ŝancon mi provados, marŝados.

Li, li, li kaj li; bonfartu majstro li.
 Sincere diras mi al li,
 labor' ĉe li ne plu por mi.
 La ŝancon mi provados, marŝados.

Ŝi, ŝi, ŝi kaj ŝi; mastrin' bonfartu vi.
 Sincere nun mi diras vin
 kuro via naŭzas min.
 La ŝancon mi provados, marŝados.

Vi, vi, vi kaj vi; knabinoj ĉiuj vi.
 Sincere ja deziras mi,
 karulon novan serĉu vi.
 La ŝancon mi provados, marŝados.

JEN KRESKIS DU BELAJ FLORETOJ*Es haben zwei Blümlein geblühet *** H. Schrader *** kanto germana*

Jen kreskis du belaj floretoj en valo sub betul'.
 Dum nokt' ili ambaŭ velkis, ne vidis ilin okul'.

Aperis du brilaj steloj sur alta nokta ĉiel'.
 Neniam flugis saluto al tiu ĉiela bel'.

Silente kaj arde du homoj sekrete sin ligis en am'.
 Sed mortis ili en larmoj. Ho, kial ĉesbrulis la flam'?

JEN MIA HEJM' SUR L'MONT'*Wisst's, wo mei Hoamat is *** popolkanto bavara*

Jen mia hejm' sur l'mont', mi tre aspiras,
 staras tri bienoj ja, mi alsopiras.
 Pendas potet' sur l'mur' ĉe la deklivo,
 estas la patra dom', lok' de mia vivo.

Estis infanoj sep en nia grego,
 entute tamen ja estis ni deko.
 Ĉambroj nur estis kvar, malvasta ejo,
 kaproj, bovino nur en la bovejo.

Gluglas la akvofont', fringoj ĝojtrilas,
 kaj la parua kant' - birdoj jubilas.
 Por mi konata ja ĉiu ŝtoneto,
 kie petolis mi kiel bubeto.

Amo al hejma ter' ĉiam vin tiras,
 kiam en fora sfer' fremda vi spiras.
 Trovas trankvilon ne, ĝenas vin premo.
 Ĉie bellokoj, sed nur unu hejmo.

JEN MIA LANDO*Landerkennung *** E. Grieg *** sagao pri reĝo Olav Trygvason*

Jen velis Olav Trygvason tra la nordmar' kun destin'
 al sia juna reĝolando, kiu ne atendis lin.
 Miris li pri rokmuro, ŝokis lin tiu kruda naturo.

Kaj jen por Olav Trygvason ŝajne estis ferma land'.
 Reĝo-sopiroj fordegelis pro tiu rokgigant'.
 Ĝis vidis li surmonte blankajn turojn, kupolojn horizonte.

Ŝajnis al Olav Trygvason, ke subite vidis li
 malnovajn templojn, blankajn volbojn.
 Kaptis lin forta pi'.
 Kun sia juna kredo povi stari interne - lia peto.

Printempa lando malfermiĝis, akvoj bruis de la mont'.
 Stranga susur' en praarbaroj, altŝaŭmis mara ond'.
 Sonis orgen', sonoriloj. Sonoj de l'ĉiel'. Reĝ' ensorĉita.

Solo:

Jen la fundo, kaj la grundo, templo spitas al infero.
 Tremas koro kaj animo, al plej Alta jen estimo!
 Kredo mia kiel fero, estu firma kiel tero,
 levu sin al granda Dio; glor' al Li, kreint' de ĉio.

Horo:

Kaj de Olav, granda reĝo, ĉie sonu lia preĝo!
 Tremas koro kaj animo, al plej Alta jen estimo.
 Kredo mia kiel fero, estu firma kiel tero,
 levu sin al granda Dio; glor' al Li, kreint' de ĉio.
 Glor' al Li, glor' al Li!

JEN MUELEJ' EN ARBARO

*Dort nieden in jenem Holze *** popolkanto germana*

Jen muelej' en arbaro muelas horon post hor',
kaj estas ĉiutage arĝent' kaj ruĝa or'.

Malsupre en tiu valo sin banas bela cervet'.
En ĝia buŝ' troviĝas el pura oro ringet'.

Se pecon de l'oro mi havus, tuj ringon farus mi.
Sendus ja al amatino, ĝin portu sur fingro ŝi.

Kaj kion ŝi resendas? Perlĉenon pro kora inklin'.
"Ho, kara kavaliro, memoru ĉiam min!"

JESU', MIA ĜOJO

*J. S. Bach *** kanto germana religia*

Jesu', mia ĝojo, por la koro vojo, gvidu min, ho, Di'.
Sentas mi kortremon, prenu tiun premon, Di-sinjur', de mi.
Ĉenojn for de mia kor', prenu vi nun malproksima
kaj konsol' anima.

For kun zorg', sufero. Venos nun espero: Jesu' gardas min.
Ja kun Di' en koro kreskas el doloro ĝoj' en Lia sin'.
En mizer' kaj malesper' kantos mi sur vivovojo:
Jesu', mia ĝojo.

JUNULET' SVELTA

*Šuhajko Ĥalia *** popolkanto slovaka*

Junulet' svelta vi, nur ĉe vi kuŝu mi.
Kuŝos vi eĉ en ŝlim', estos mi en proksim'.

Junulet' restu vi, sen vi ne vivas mi;
iru nek al arbar', dronu nek en akvar'.

KALUMNIO ESTAS VENTETO

*Die Verleumdung, sie ist *** G. Rossini: La barbiro de Sevilla*

Kalumnio estas venteto ne aŭdebla en la komenco
 kaj trankvila ĝia blovo.
 Komenciĝas nun susuri,
 proksimiĝas, proksimiĝas pli kaj pli,
 tutmallaŭte, nevidite ĝi alrampas, jam obtuzas.
 Pintavidas la oreloj, por ne perdi malbonfamon.
 La siblado kaj flustrado etendiĝas malamike kaj suspekto.
 La saĝuloj kaj simpluloj, la saĝuloj kaj simpluloj
 kaj la miloj da stultuloj perpleksiĝas pro la fam'.
 Flugas nun de buŝ' al buŝo, babilaĉ' kaj fia fuŝo.
 Flugas primitive, stulte, ŝvelas brue kaj tumulte.
 De la langoj la siblado disvastiĝas sen kompatato,
 kaj naskiĝas la hororo de l'venena kalumni'.
 Furiozas la vetero nun terure tra l'aero,
 kirlas tra aerregionoj,
 tondras kiel mil kanonoj, tondras kiel mil kanonoj,
 kaj freneze puŝas, premas, ĝis la tuta tero tremas
 pro la fulmoj de l'infer', ja, pro la fulmoj de l'infer'.
 Por la hom' jen tragedio, kiun trafis kalumnio,
 kiel honestul' senkulpa, sen estim' pereos li.
 Senkulpe nun pereos li, pereos li.

KANTADAS, SONADAS

*Frühling am Rhein *** S. Breu*

Kantadas, sonadas tra ĉarma la land'.
 Ornamas sekrete sin kvazaŭ amant'
 montetoj, arbaroj, kasteloj
 sub blankaj vagantaj nubveloj.

Printempon, printempon jubilas la kant'.
 Prezentu glaseton da vin', ĝojkantu vi, koroj,
 en tuta la land',
 ĉe l'koroj en tuta la land', la land' ĉe l'Rajno,
 ĉe l'Rajno,
 printempo salutas nin, salutas printempo ĉe l'Rajn,
 printempo ĉe l'Rajn, suno ĉe l'Rajn.

Preĝejsonoriloj tintadas por ben'.
 Amindaj vilaĝoj briletas kaj jen:
 kolomboj rondvagas ĉe l'turo,
 rukulas sub suna lazuro.

En bukla orharo kolora ruband'.
 Knabino ĝin plektas por sia amant'.
 Li portas bukedon da floroj,
 ĝojkrias feliĉe la koroj.

KANTAS EN LA BOSK' ALAŬD'*Horch die Lerche singt *** O. Nicolai: La gajaj virinoj*

Kantas en la bosk' alaŭd', amatino, kun plezur'.
 Kion diras ŝia laŭd'? Aŭdu ŝian voĉon nur.
 Kantas pri sekreta am', amatin' komprenas jam.

Kaj la milda son' al vi nun leviĝas, amatin'.
 Ĉu vi sentas, kiel ĝi plen-sopire serĉas vin?
 Kantas pri sekreta am', amatin' komprenas jam.

KANTO DE LIBERECO*Lied der Freiheit *** G. Verdi*

Kant' libera, neniam forpasos ĝi,
 ĉiam vivas sopir' en nia sento.
 Kant' libera, ja ĉie aŭdiĝos vi,
 eĉ se glutas vin morto-silento.
 Nek potenc', nek malpermes' vin katenos,
 kaj nek mur', nek baraĵ' la vojon ĝenos.
 Kant' libera - por multaj esper' estas vi,
 kiuj arde, sufere atendas vin.
 Donu forton, kuraĝon por fier-sintenad',
 ke ni ne niajn revojn perfidu.
 Montru lumon dum nokt', kiam obskuras la fat',
 montru vojon al ni el nia tim'.
 Kaj la ondo fariĝos ondego,
 kaj la cindro flamiĝos je fajro.
 Kant' libera - ja ĉie aŭdiĝos vi,
 eĉ se glutos vin morto-silento.
 Vin, ho, kanto, ja neniu de ni prenos for.
 Kaj estiĝu io ajn, vivos vi en nia kor',
 vivos vi en nia kor'.

KANTO DE L'TURGARDISTO*Türmerlied*

Por vidi naskita, la viv' por rigard'
 al turo ligita, ho, kia bonfart'!
 Mi vidas tra l'lando sub brilo de l'sun',
 jen maro kaj strando, jen steloj kaj lun'.
 En ĉio l'eterno montriĝas al ni,
 min plaĉis ja ĉio, mi mem eĉ al mi.
 Feliĉaj okuloj, kion ajn vidis vi,
 ne ĉiam nur ĝoj', sed belec' estis ĝi.

KANTOJ VI*Spievanky, spievanky *** popolkanto slovaká*

Kantoj vi, de kie iam vi devenis?
 Ĉu el ĉielo falis, ĉu l'arbaron plenis?

Nek el ĉiel' ni falis, nek arbar' hejmlando,
 el animoj junaj kreskis ĉiu kanto.

Kantu nun jubile, kantu vi, birdeto,
 kun plezur' ni kantos kune sur vojeto.

KARUL', MI NE PLU VIDOS VIN*Soll ich dich, Teurer *** W. A. Mozart: La sorĉa fluto*

Karul', mi ne plu vidos vin. Bonŝance vi revidos lin.
 Danĝeroj mortaj vin atendos. La dioj certe min defendos.
 Ho, kara, trovos vin la morto, teruron antaŭvidas mi.
 La vol' de l'dioj estu sorto, la diajn signojn sekvos mi.

Se amus vi, kiel mi amas, trankvil' ne povus regi vin.
 En mi la samaj sentoj flamas, fidele amos vin sen fin'.
 Disiĝ' amara ja fariĝas. Tamino fori devos nun.
 Venis la hor', ke vi disiĝas. Tamino fori devos nun.
 Tamino - Tamino, foriri tuj vi devas nun.
 Rapidu pli, ĉar ĵuris vi.
 Tamino, ĝis reven', ĝis reven', restu mia, ĝis reven'!
 Trankvilo ora, trankvilo ora, ho, revenu.
 Venis la hor'. Ni revidiĝos.

KIAL VI, JUNULET'*Škoda t'a, šuhajko *** popolkanto slovaká*

Kial vi, junulet', loĝas trans rivero?
 Akvo ponton prenis, estas nun danĝero.

Se al vi irus mi, havus vi nur ploron,
 larmojn forviŝus vi, sentus kordoloron.

Venu, nur, junulet' je dimanĉmateno:
 por ĉapel' majoran' estos ĉe la veno.

Kun plezur' irus mi al vi, koranĝelo,
 se vi nur vekus min je l'krepuska helo.

KIEL VAGABOND'*Als flottes Geist *** J. Strauß: La ciganbarono*

Kiel vagabond', jen la rakont', vojaĝis mi tra l'tuta mond'.
 Faktoto longe estis mi en granda bestmenaĝeri'.
 De l'orfazano ĝis balen regadis bestojn mi sen pen'.
 Flatadis min la sonserpento, goril' karesis min kun sento.
 Leon' kondutis laŭ infan', manĝegis tigro el la man'.
 Mi diris "ci" al la hieno, kun ŝarko naĝis en baseno.
 Per rostro miksis elefanto por mi salaton, granda kvanto.

Ja, pro mia honor' kun la man' sur la kor'
 estas mi matador' kun furor', kun furor'.

Raraĵojn vendis kun persvad', mi poste estis akrobat',
 fariĝis fine eĉ helpist' ĉe iu majstra magiist'.
 Per mia nigra sorĉmagi' alvokas cent demonojn mi,
 kaj estas lerta flam-manĝanto, en paŭzoj eĉ tranĉilglutanto.
 Kaj ĉion balancadas mi, ĉevalojn regas kun graci'.
 Mi en la art' de l'kartolud' superas ĉiun sen diskut'.
 Sorĉist' mi estas sen komparo kaj ĉio tute sen preparo.

KIOM DA MONO ELSPEZAS LA MOND'?*How many roads must a man walk down? *** B. Dylan *** kanto porpaca*

Kiom da mono elspezas la mond'
 por bomboj, raketoj kaj mort'?

Multaj sin gloras, paradas per buŝ',
 sufer' nek mildiĝas nek sort'.
 Kiom okazu ankoraŭ mizer'
 ĝis venos por savo la vort'?
 Respondas, amik', tutsole nur la vent',
 respondas tutsole nur la vent'.

Kiom da vojoj en tuta la mond'
 abundas per larmoj, sufer'?
 Kaj oceanoj ĝis mara profund'
 plenplenas per trista mizer'!
 Kiom da inoj dum tutsola viv'
 atendas en vea toler'?
 Respondas, amik', tutsole nur la vent',
 respondas tutsole nur la vent'.

Kiom da homoj en malliberec'
 sopiras la ŝanĝon de l'stat'?
 Kaj geinfanoj milionoj dum nokt'
 ne dormas pro morda malsat'!
 Kiom da homoj noktpetas en rev':
 „Ho venu al ni bona fat'!“
 Respondas, amik', tutsole nur la vent',
 respondas tutsole nur la vent'.

KION FARI?

*Ich weiß nicht, wo ich bin (Cherubino) *** W. A. Mozart: La nupto de Figaro*

Kion fari, mi jam ne plu scias,
 jen frostsentas, jen fajre ebrias,
 ĉiu ino min arde ruĝigas,
 ĉiu ino tremigas min tuj.

Kiam aŭdas mi vortojn de amo,
 en la koro min brulas la flamo,
 verve paroli de l'amo min pelas sopirado,
 sopirado tute por mi mister'.

Parolas pri am' vekiĝante,
 parolas pri am' sonĝante,
 al akvo, ombro, montoj, al floroj, herbo, fontoj.
 Mi vokas eĥon, ventojn, kaj ĉiujn dolĉajn plendojn
 portas l'aer' kun si, portas l'aer' kun si.

Parolas pri am' vekiĝante, parolas pri am' sonĝante
 al akvo, ombro, al montoj, al floroj, al herbo, al fontoj.
 Mi vokas eĥon, ventojn, kaj ĉiujn dolĉajn plendojn
 portas l'aer' kun si, portas l'aer' kun si.

Se oni ne aŭskultas, se oni ne aŭskultas,
 parolas pri am' kun mi, kun mi.

KISIS MI SIMPLE NUR

*Ach, ich hab' sie ja nur *** K. Millöcker: Der Bettelstudent*

Ĉu mi estu galantulo kontraŭ ĉiu bela in'?
 Hipokrita flatemulo nur lakee montru min?
 Bonkonata en Polio kaj Saksio estas mi,
 ĉiu eĉ en Podolio nomas min herogeni'.
 Kiu ĉe Vistul' kaj Pruto, ĉe la Elbo venkis nur,

kaj ĉe Grodno, Baŭcen^{*} estis por la malamik' terur'?
 Ha... la heroon ne venkitan en milit' kaj batal'
 in' kuraĝis frape bati, jam l'ide' estas skandal'.
 La memor' longe min turmentos pro la vangofrapa insulto.
 Sed ŝi tre baldaŭ l'aferon pentos, venĝo la rezulto.
 Ĉu mi hontigis ŝin, humiligis ŝin, ke ŝi tiel punis min?
 Ha... kisis mi simple nur sur la ŝultron ja ŝin,
 kisis mi simple nur sur la ŝultron ja ŝin.
 Jen mi sentis en vizaĝ' frapon ventumilan tre.
 Multon jam travivis mi,
 tamen tion, tion ne, tamen tion, tion ne!
 Multon jam travivis mi, tamen tion ne, tion ne, tion ne!

Tiu trofiera damo ofendiĝis pro la kis',
 kiu estis ja reklamo, flat' por ŝi sen kompromis'.
 Post insult' mi ĉiam venĝis tuj per sango kaj kruel',
 brakojn, gambojn mi fortranĉis dudek fojojn en duel'.
 Freneziĝas mi kolere, pensas pri satisfakci',
 ĵuras mi - kaj tre sincere - ŝian punon havos ŝi.
 Ha, tia honto kaj doloro, tamen ridis ja mi.
 Furiozis mia koro pro la sorta ironi'.
 Plende do mi grimacojn faris, ŝiris min la honta mizer',
 amuziĝis ŝajne, kvankam amaris, ardis la sufer'.
 Kaj kial do la kverel? Nura bagatel' estis, kion faris mi.
 Ha... kisis mi simple nur sur la ŝultron ja ŝin.
 Ridindigis min la dam', ĉiu scias ĝin, ho ve!
 Multon jam travivis mi,
 tamen tion, tion ne, tamen tion, tion ne!
 Multon jam travivis mi, tamen tion ne, tion ne, tion ne!

** Baŭcen - Bautzen, urbo en Saksio*

KIU AL BETLEĤEM ŜATAS FLUGI

*Wer nach Bethlehem fliegen will *** kanto kristnaska moderna*

Kiu al Betleĥem ŝatas flugi al stal',
 pensas eĉ, jen povus en total'
 akiri li pacon sen peno, lin gvidu alien promeno.

Kiu al Betleĥem ŝatas vojaĝi al fil',
 kredas eĉ, jen estas finazil'
 por l'anim' kun plena pensiono, lin logu alia regiono.

Kiu al Betleĥem iras al la etul' kun la sci',
 jen trafos lin la postul'
 infanojn ami senfine; ekzercu li tuj pleninkline.

KIU TRINKAS

*Und keiner soll sagen *** H. Weber *** trinkkanto germana*

"Kiu trinkas, aĉa estas", ja ne diru tion ni,
 ĉar por ili, kiuj trinkas, la vinber' kreskas des pli.
 Jen por unu la ĉampano la ĉiela sendaĵ'.
 Por alia estas brandglutetoj ĉarma tera donacaĵ'.

Diru, diru, diru ne ni, ili, ili, ili des pli
 kara la ĉiela sendaĵ', jen la ĉarma tera donacaĵ'.

"Kiu manĝas, aĉa estas", ja ne diru tion ni,
 ĉar por ili, kiuj manĝas, la tritik' kreskas des pli.

Jen por unu tort' bongusta la ĉiela sendaĵ',
por alia estas la paneroj ĉarma tera donacaĵ'.

"Kiu fumas, aĉa estas", ja ne diru tion ni,
ĉar por ili, kiuj fumas, la tabak' kreskas des pli.
Jen por unu la Havano la ĉiela sendaĵ',
por alia estas la stumpetoj ĉarma tera donacaĵ'.

"Kiu amas, aĉa estas", ja ne diru tion ni,
ĉar por ili, kiuj amas, vivoĝu' kreskas des pli.
Jen por unu la unika la ĉiela sendaĵ',
por alia etaj ravulinoj ĉarma tera donacaĵ'.

KNABET' ESTIS MI

*Als Büblein klein *** O. Nicolai: La gajaj virinoj*

Knabet' estis mi je l'patrina mam'.
hop hajsas, dum pluvo kaj vent'.
Ĉampan' jam estis mia am',
kaj la pluvo, ĝi falas tagon post tag'.
Hanjo, enverŝu nun, el vinpokalo nun fluu balzam'.
Donu el kela font', trinki ne estas hont'!
Baĥo trinkis jam, Baĥo trinkis jam.

Ne logis min plu la patrino sin',
hop hajsas, dum pluvo kaj vent'.
La junaj knabinoj ne ŝatis min
kaj la pluvo, ĝi falas tagon post tag'.
Mon' ĉe la fino ja kaj ne plu vino ja, eĉ mankas am'.
Kuru post la fortun', kiu ĝin ĉasas nun,
kaptas ĝin jam, ja, kaptas ĝin jam.

KNABINO ĈE DANCADO*Das Mädchen beim Tanz *** kanto germana malnova*

Fratinet', fratinet', kiam iros ni?
 Frue je la kokokri', hejmen nur iros ni.
 Ja, fratet', ja, fratet', tiam iros ni.

Fratinet', fratinet', iru ni nun for.
 Korkarul', li dancas kun mi, iros mi, li dancos kun ŝi.
 Ho, fratet', ho, fratet', estus ja dolor'.

Fratinet', fratinet', palas laŭ ebur'.
 Faras la matena sun', estas miaj vangoj nun,
 ho, fratet', ho fratet', roshumidaj nur.

Fratinet', fratinet', lace paŝas vi.
 Serĉas nun sen hezit' vojon al mia lit'.
 Frato vi, estos mi sub la herb' en ĝi.

KNAB' ROZETON VIDIS LI*Sah ein Knab' ein Röslein steh'n *** H. Werner / J. W. von Goethe*

Knab' rozeton vidis li; erikeja floro.
 Juna, bela estis ĝi. Por admiri kuris li ĝoje kun adoro.

Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.

Diris knab': „Mi rompos vin, vi rozeta floro“.
 Diris roz': „Mi pikos vin, ke vi ne forgesos min,
 premas min doloro.“

Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.

Knab' sovaĝa romp'is ĝin; erikeja floro.
 Rozo ja defendis sin kaj sufere pikis lin,
 ne utilis ploro.

Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.

KOMPRENAS MI LA ARTON JA

*Auch ich versteh' die feine Kunst *** G. Donizetti: Don Pasquale*

Venke la ardaj vidoj lin ĝis la kor' penetris
"mi kavalir' via estos" ĵuris li sur genu',
kaj lin el ĉiela okulo sorĉis mistera brilo.
Fajris lin dolĉa brulo, ŝvebis en kor-jubilo.
Dum tuta vivo, li ĵuris, volis nur servi al ŝi, ha-ha, ha-ha!
Komprenas mi la arton ja kaj venkas ĉiujn virojn.
Senĝene ilin traktas mi, la karajn kavalirojn.
Mi kaptas per rideto la virojn en la reto,
kaj poste hipokrita larm' kun revsopira vid',
Milspeca la agado, kruelo, delikato,
forfrandas virajn korojn mi kun granda apetit'.
Mi kaptas per rideto la virojn en la reto,
ho, kredu, efikas la revsopira vid'.
Komprenas mi la arton ja ĉe viroj per insid'.
Ruzajojn aplikas, ah, ah, ĉe viroj mi per insid'.
Kaprica mi estas dum ŝercplenaj horoj,
mi ludas per koroj, ha, laŭ mia plaĉ'.
Ne konas mi mem min en mia kolero,
sed estas la vero, kvietiĝas mi tuj.
En kapo kapricoj, bonec' en la koro. Ah ...
Senĝene ilin traktas mi, la karajn kavalirojn.
Mi kaptas per rideto la virojn en la reto,
kaj poste hipokrita larm' kun revsopira vid'.
Milspeca la agado, kruelo, delikato,
forfrandas virajn korojn mi kun granda apetit'.
Mi kaptas per rideto la virojn en la reto.
Ho, kredu, efikas la revsopira vid'.
Komprenas mi la arton ja ĉe viroj per insid',
ruzaĵojn aplikas, ah, ah, ĉe viroj mi per insid'.
Kaprica mi estas dum ŝercplenaj horoj,
mi ludas per koroj, ha, laŭ mia plaĉ', ah.

KRIMINAL-TANGO*Kriminal-tango *** modkanto*

Kriminal-tango, en la taverno viroj obskuraj kaj ruĝa lum'.
 Kaj nun dancis ili tangon: Ĝeki Braun* kaj Bejbi Miler*.
 Kaj li frustras al ŝi: "Bejbi, post eltrinko lumon for."
 Mendas li du akrajn brandojn. Jen sinjoro kun nazumo.
 Ĝek eltrinkas, Bejbi tremas, sed estingas lumon tuj.
 Kriminal-tango, en la taverno viroj obskuraj, ruĝa lanterno.
 Ĉiun vesperon ardas la meĉo, premega streĉo en la aer'.

Kriminal-tango, en la taverno viroj obskuraj kaj ruĝa lum'.
 Kaj nun dancis ili tangon: ja malbonan ne suspektas.
 Kaj orkestron ili petas: tre pasian ludu nun.
 Kaj li ja ne povas scii, kio nokte ĝis matene
 en malhel' de la taverno dum dancad' okazis jam.
 Kriminal-tango, en la taverno viroj obskuraj, ruĝa lanterno.
 Ardaj rigardoj, streĉo kreskegas,
 en tiu streĉo krakegas paŝ'.

Kriminal-tango, en la taverno viroj obskuraj kaj ruĝa lum'.
 Kaj nun dancis ili tangon: Ĝeki Braun* kaj Bejbi Miler*.
 Kaj polic' nenion trovas, kio donus spuron nur.
 La sinjor' kun la nazumo, kiun trafis tiu pafo,
 eble povus ion diri, sed li ne parolas plu.
 Kriminal-tango, en la taverno viroj obskuraj, ruĝa lanterno.
 Ĉiun vesperon ĉiam la sama, ĉar tiu tango estos sen fin'.

Jackie Brown, Baby Miller*KRIST', ŜAFID' DE DI'***Agnus Dei *** W. A. Mozart: Kronad-meso*

Krist', ŝafid' de Di',
 vi portas, vi portas la pekon de la mondo -
 kompatu nin.

Krist', ŝafid' de Di',
 vi portas, vi portas la pekon de la mondo -
 kompatu nin.

Krist', ŝafid' de Di',
 vi portas, vi portas la pekon de la mondo -
 donu al ni pacon.

KUKU*Kukuck *** kanto germana infana*

Kuku, kuku, bird' vokas ĝi.
 Kaj ni kantetu, dancu, saltetu!
 Nun printempo venos al ni.

La kukolo vokas sen fin'.
 Ek al kamparo kaj al arbaro.
 Ho, printempo nun ravu nin.

KUŜU EN HERBO*Liege im Gras *** B. Kohl*

Kuŝu en herbo, rigardu ĉielon,
 forgesu, ke l'temp' flugas for.
 Floron rikoltu - la dian anĝelon,
 kaj zumu kanteton via kor'.

Nur bagatel', sed tia moment'
 ja estas konsol' kaj aspiro.
 Fariĝas de pac' kaj feliĉo prezent',
 jen nia ĉiama deziro.

KVIN, JA - DEK, JA*Fünfe, zehne *** W. A. Mozart: La nupto de Figaro*

Figaro: Kvin, ja - dek, ja - dudek - tridek -
 tridekses, ja jes, taŭgas ĝi.

Susanna: Jes, mi estas tre kontenta,
 taŭgas sole ĝi por mi, taŭgas sole ĝi por mi.

Figaro: kvin, ja

Susanna: Vidu, mia kara Figaro!

Figaro: dek, ja

Susanna: vidu, mia kara Figaro!

Figaro: dudek

Susanna: vidu nur!

Figaro: tridek

Susanna: laŭdu ĝin, mian belan ĉapeleton!

Figaro: tridekses, ja

Susanna: Laŭdu mian ĉapeleton!

Figaro: Tre taŭgas ĝi.

Susanna: Laŭdu ĝin, ho, kara Figaro,
 laŭdu mian ĉapeleton, ĉapeleton, ĉapeleton!

Figaro: Jes, karega, mi ja vidas,
 ke l'ĉapel' ĉarmigas vin, ke l'ĉapel' ĉarmigas vin.

Susanna: Vidu nur!

Figaro: Jes, mi vidas.

Susanna: Vidu nur!

Figaro: Ĝi estas bela.

Susanna: Jes, mi estas tre kontenta, jes mi estas tre kontenta,

Figaro: jes, karega, ĝi vin ravas.

Susanna: Taŭgas sole ĝi por mi - por mi - por mi

Figaro: Taŭgas sole ĝi por vi - por vi - por vi

Susanna+Figaro: Kiam nin feliĉigos la nupto,
 kaj tenere al vi mi konfesos,
 kaj tenere al vi mi konfesos:
 "Ĉiam mi estos kaj restos kun vi,
 ĉiam mi estos kaj restos kun vi".

Figaro: Susanna,

Susanna: amato,

Figaro: ĉiam estos,

Susanna: ĉiam estos

Figaro+Susanna: ĉiam mi estos kaj restos kun vi -
 restos kun vi - restos kun vi.

KVINMIL TALEROJ*Fünftausend Taler *** A. Lortzing: La rabĉasisto*

Kvinmil taleroj! Kvinmil taleroj!
 Ĉu nun revadi, time tremadi, plori, ridadi?
 Dioj, kion fari?
 Jam ĉiam la feliĉ' globronda kiel bul'.
 Hieraŭ estis mi kompleta sentaŭgul',
 nur simpla hom' kaj an' de Krist',
 kaj nun, jes ja, nun kapitalist'.
 Dank' vin, eterna fato, feliĉ' nun mia stato.
 Sed se Grenjo petus min kaj pro Dio arde plorus,
 ke mi ne forpelu ŝin',
 ke mi ne forpelu ŝin'?

Se ŝi flamus, karesamus, ĝin ĝis nun ne spertis mi.
 Se ŝi emus kaj min premus,
 Dio, kion farus mi - ho, farus mi - ho, farus mi?
 Bonvolu, estimataj, afable konsili, kion - nur farus mi?
 Nenio ŝin helpos, sen ia admon', sen ia admon',
 Ĉar kvinmil taleroj tro loga demon', tro loga demon'.
 Kion fari per la mono, la bonvena dia dono,
 per la kapitalo nun?
 Kion fari per la mono, la bonvena dia dono,
 per la kapitalo nun?

Ĉu mi restu sciencisto, aŭ fariĝu budikisto?
 Ĉu palacon faros mi aŭ drinkejon ŝatos pli?
 Ĉu akciojn nun aĉeti aŭ bieron forvendeti?
 Riĉa per ekonomi' aŭ ĉu estos Tivoli?
 Kial vane fari planon, daŭre turmentadi min?
 Nur la monon en la manon; nur la monon en la manon:
 poste solvo trovos sin, poste solvo trovos sin!
 Kvinmil taleroj! Kvinmil taleroj! Ha, kia vort'!
 kun kia gravec' kaj numeralec' kaj bankierec'
 kaj famegec'!

Decidis jam la kosma rond', decidis jam la kosma rond':
 famiĝos mi tra l'tuta mond', famiĝos mi tra l'tuta mond'!
 Susuras, murmuras, rukulas, ululas,
 briletas, tikletas, taktakte, barakte
 en korpo, okuloj, oreloj eĉ'.

L'AER' ALLOGA ESTAS NUN*Wohlauf die Luft geht frisch und rein *** V. E. Becker *** kanto frankonia*

L'aer' alloga estas nun, sidado nur rustigas.
 Kaj sur l'ĉiel' la varma sun', ĝin Di' por ni briligas.
 Por la migrad' pretigu vin, sur lipoj gaja kanto,
 somera tempo logas nin al frankonia lando.

Ho, inter la arbaroj jen flaviĝas peza greno.
 En majnoŝipojn nur kun pen' ŝarĝiĝas tiu beno.
 Ja baldaŭ ĉiu kamparan' rikoltos dolĉan vinon,
 kaj la patrono Kilian' prizorgos bonan finon.

Al Sankta Fajt' de l'ŝtafelŝtajn' ni gaje supreniĝas.
 Kaj jen la landoj ĉirkaŭ l'Majn' vastvaste etendiĝas.
 De Bamberg ĝis malproksimec' l'okul' ravite iras.
 Sorĉigas tiom da belec'. Flugilojn mi sopiras.

LA CEL' DE LA VIV'*Ich bin auf der Welt um glücklich zu sein *** el filmo Knabino en blanko*

La cel' de la viv' feliĉo kaj ĝu',
 pro tio mi vivas sur ter'.
 Kaj brilas la sun' por mi el la blu',
 ne ĝenos min tim' kaj sufer'.
 Eĉ se mia voj' ne estas idili',
 por ĉiam firmkredas ja mi:
 Estas cel' de la viv' feliĉo kaj ĝu'
 de la mond' kaj de l'sennuba blu'!

Tiom da homoj vivas sur la mond'
 laŭ sia propra moral',
 kredas je l'viv' kaj ĝia respond',
 kvazaŭ ĝi estus la ideal'.
 Ne estas senco viva, hasti sen halt' kaj ripoz'.
 Ĉar esti tro aktiva, nur gvidas al forta neŭroz'.

LA DOM' "JE LEVIĜANTA SUN'"*The house of the rising sun*

Jen estas dom' en Nju Orlinŝ^l, "Je leviĝanta Sun".
 Kaj mizer' por multaj viroj estas ĝi, kaj tia estas mi nun.

Patrin' vestaĵojn kudris, ĉemizojn kaj bluĝins
 la patro kartojn ludis li en dom' en Nju Orlinŝ^l.

Kontenta estas ludemul' en firestoraci',
 kaj kiam tage-nokte nur ebria estas li.

Ho, panjo, kion faris mi, al gefratoj diru nun,
 ke ili ne pereu en mizer' en la dom' "Je leviĝanta Sun".

Mi estis hejme tagon nur, sed tiris min io for.
 Reiras mi al Nju Orlinŝ^l, atendos min dolor'.

Ĉar jen estas dom' en Nju Orlinŝ^l, "Je leviĝanta Sun".
 Kaj mizer' por multaj viroj estas ĝi, kaj tia estas mi nun.

'New Orleans

LA ETAJ FLOROJ DORMAS

*Die Blümelein sie schlafen *** J. Brahms *** lulkanto germana*

La etaj floroj dormas jam en la bril' de l'lun'.
La kapoj ondluliĝas sur siaj tigoj nun.
Floranta arb' skuetas sin, en sonĝo flustras vin:
"Dormu, dormu nun, infaneto dormu vi."

La birdoj kantis dolĉe dum varma sunobril'.
En nesto nun ripozas ŝirmataj en trankvil'.
La grilo nur en herb' kaj gren', ĝi sola ĉirpas jen:
"Dormu, dormu nun, infaneto dormu vi."

Viret' kun sablo venas, kaj ĉie serĉas li,
ĉu infanet' ankoraŭ en lit' ne kuŝas ĝi.
Maldormas ie ajn etul', jen sablo por l'okul':
"Dormu, dormu nun, infaneto dormu vi."

Kaj for viret' kun sablo, jam dormas la karul'.
fermita firme estas l' okulo de l'etul'.
Matene morgaŭ brilos ĝi bonvenon ja por mi.
"Dormu, dormu nun, infaneto dormu vi."

LA ETERNULON LA ĈIELOJ HONORAS

*Die Himmel rühmen *** L. van Beethoven *** kanto religia*

La eternulon la ĉielo honoras,
vastiĝas ĉien Lia nom'.
La ter' Lin gloras, la mar' Lin adoras, ho, Dia vort' -
aŭskultu, hom'!
Sennombrajn stelojn Li kreis sur l'ĉielo,
far Li moviĝas nia sun'.
Jen ĝi! Ĝi venas, lumas en ardo kaj helo,
heroe ja, la Dia lum',
heroe ja, la Dia lum'.

Sonadas, lumas mirakla akordo, belega Dia harmoni'!
Ĉu ne aperas el ordo kaj forto al ni l'Sinjor',
de l'mond' la Di'?
Kreint' Li estas, kaj saĝo kaj gloro,
la Ĉiupovo kaj la pac'.
Nur Lin, nur Lin ni amu el tuta la koro,
kaj petu Lin pri Lia grac',
kaj petu Lin pri Lia grac'.

LA ĜOJON SERĈU, MIA KOR'*Geh aus, mein Herz *** A. Harder *** kanto religia*

La ĝojon serĉu, mia kor',
 en tempo de l'somera or', de l'kara Di' donaco.
 Ĝardenoj pompas en la sun',
 por ni sin ornamadas nun el Lia granda graco,
 el Lia granda graco.

Alaŭd' svingiĝas en l'eter',
 kolombo flugas tra l'aer' al verdaj la arbaroj.
 La dolĉa kant' de l'najtingal'
 ĝojigas nin tra mont' kaj val', herbejoj kaj kamparoj,
 herbejoj kaj kamparoj.

Ne povas nun ripozi mi,
 pro l'faroj de la granda Di' vekiĝas la animo.
 Kun ĉiuj sonas mia kant',
 el ĝi aŭdiĝas tra la land' por l'Eternul' estimo,
 por l'Eternul' estimo.

LA HORLOĜO*Die Uhr *** C. Löwe*

Mi portas ĉiuloke horloĝon jen kun mi.
 La tempon ĉiumomente ekzakte montras ĝi.
 Ĝin kreis grandega majstro mirige por longa ir',
 eĉ kvankam ne ĉiam tiktakas ĝi firme laŭ nia dezir'.

Se ĝi nur rapide marŝus dum sentis mi prema plag',
 se ĝi nur prokrastus, kiam feliĉon donacis la tag'!
 Ĉu venis ĝoj' aŭ sufero, ĉu skuis min barakt',
 dum tuta la longa vivo ĝi frapis en sama takt'.

Ĝi taktis ĉe l'ĉerko de l'patro
 kaj ĉe l'katafalk de l'amik',
 dum juna amo ĝi frapis kaj dum la fest' de l'edzig'.
 Kaj ĉe la lulil' de l'infano aŭdebla estis ĝi,
 kaj ofte ĝi batu ankoraŭ, kun fid' esperas mi.

Ĝi foje fariĝis inerta, minacis haltig' de l'kurad',
 Dank' al la help' de l'majstro denove funkciis taktad'.
 Sed kiam ĝi ĉesos marŝi, nenio helpos min,
 Ĉar sole la man' de l'majstro ja povus eksavi ĝin.

Mi devos al majstro migri, al fora malproksimec',
 li loĝas trans nia tero, for, for en la eternec'.
 Redonos ĝin al kreinto kun dankoplena ĝem':
 Sinjor', mi bone ĝin gardis, ĝi ĉesis el si mem.

LA, LA, LA*La, la, la *** kanto origina itala*

Nin vokas frumatene la sun' al freŝa ag'.
 La vivon ĝi donacas por ĉiu nova tag'.
 Per ĝi ja kreskas floroj, varmigas ĉiu ŝton',
 kaj batas ĉiuj koroj, ekĝermas la burĝon'.

Malhela igas mondon vespersinkanta sun',
 donacas al ni sonĝojn sub noktobrila lun'.
 Kaj se vi iras foren, kaj restas sola mi,
 ja same kiel suno revenos certe vi.

LA LASTAJ SEP TAGOJ DE LA TERO*Die letzten sieben Tage *** Möring-Raschek *** kanto religia moderna*

La unuan el la sep lastaj tagoj parolis Li al mond':
 "Donu florojn kaj arbojn al Mi,
 ĉar ja ne indas vi por ĝui ties belon!"

Homar' ne aŭdis ĝi, ne venis preĝ' al Li,
 nur ĉie aĉa ag'. Kaj venis nova tag'.

Kaj la duan el la sep lastaj tagoj parolis Li al mond':
 "Nun redonu la bestojn al Mi,
 vi ŝatas ilin nur ludil' por la kapricoj!"

Kaj la trian el la sep lastaj tagoj parolis Li al mond':
 "Kial steloj kaj luno por vi?
 Detruos ilin vi, neniam ĝi okazu!"

Homar' ne aŭdis ĝi, ne venis preĝ' al Li,
 nur ĉie aĉa ag'. Kaj venis nova tag'.

Kaj la kvaran el la sep lastaj tagoj parolis Li al mond':
 "Donu amon, feliĉon al Mi,
 ĉar ne meritas vi la plej belajn el la donoj!"

Kaj la kvinan el la sep lastaj tagoj ne restis plu la lum'.
 Kaj la suno kreita de Li perdiĝis de l'ĉiel'.
 Mallum' la teron regis.

Eĉ nun atendis Di', ne venis preĝ' al Li,
 blasfem' nur, aĉa ag'. Forpasis tiu tag'.

Kaj la sesan el la sep lastaj tagoj pezkore agis Li.
 Kaj forbrulis la ter', Lia mond',
 kaj ankaŭ la homar', kiu ne al Li obeis.
 Kaj venis la lastlasta tag', mortdezerto estis la ter'.

Kaj tiam ploris Li.

LA LUNO JAM LEVIĜIS*Der Mond ist aufgegangen *** popolkanto germana*

La luno jam leviĝis,
 steletoj ekheliĝis ravante homojn, nin.
 Silentas la arbaro
 kaj super la kamparo nebulo pala levas sin.

Nenia vento blovas.
 La mond' ne plu sin movas sub paca, klara lun'.
 Nun petu noktan benon,
 de l'tago la ĉagrenon, dormantoj, vi forgesu nun.

Jen luno sur ĉielo
 en brila ronda belo, duonvidebla nur.
 Ĉar multon ni ne vidas,
 ni tial ĝin priridas, malsaĝe juĝas kun plezur'.

Ĉe l'fino de la tago
 kuŝigu vin sen plago, silentas la anim'.
 Ne punu nian faron,
 sed nin kaj la najbaron dormigu, Dio, nun sen tim'.

LA PATRO MIGRIS TRA NATUR'*Mein Vater war ein Wandersmann *** popolkanto germana*

La patro migris tra natur' - ĝi same logas min.
 Mi gaje migros kun plezur' ĝis venos viva fin'.
 Faleri, falera, faleri, falera hahahahaha, faleri, falera,
 ĝis venos viva fin'.

Migrado, vi ĝojigas nin, saniĝas nia kor'.
 Libera spir', plezur sen fin', kantadas nia ĥor'!
 Faleri, falera, faleri, falera hahahahaha, faleri, falera,
 kantadas nia ĥor'.

Birdet' jubilas laŭte ĝi, aŭdiĝas gaja kant'.
 Kaj migras ĝoj' kun vi kaj mi tra sunobriila land'.
 Faleri, falera, faleri, falera hahahahaha, faleri, falera,
 tra sunobriila land'.

Plaŭdetas blua riveret' per dolĉa melodi'
 tra kan' kaj verda arbaret'; ravite aŭdas mi.
 Faleri, falera, faleri, falera hahahahaha, faleri, falera,
 ravite aŭdas mi.

LA RABOTILA KANTO

*Hobellied *** K. Kreutzer: La elspezemulo*

Kverelas homoj pri l'feliĉ' de sia tera viv',
aliajn nomas stultaj, mem el stulta perspektiv'.
Eĉ por kelkiuj malriĉul' tro riĉa estas li,
sed ĉiujn samrabotas sort', tutvana la envi'.

Junuloj strebas nepre ja al feliĉiga ĝu',
Olduloj kontentiĝas jam kaj ne tro serĉas plu.
Sed kiam grumblas la edzin', ne ekscitiĝas mi.
La rabotilon prenas mi kaj pensas: "Grumblu vi"!

Kaj kiam diros mort' al mi: "Frateto, sekvu min!"
Komence preteraŭdos mi, neglektos simple lin.
Sed diros li: "Ho, Valentin, jen fino nun por vi!"
Fordonos rabotilon tuj kaj adiaŭos mi.

LASTA PRINTEMPO

*Letzter Frühling *** E. Grieg*

Ree okazis miraklo al mi, feliĉo belega:
vidi printempon en plenharmonii', ho, ĝuo ravega!
Rajtis rigardi kun forta sopir' la vintron perdiĝi,
lagojn mi vidis bluiĝi kun mir', la valojn verdiĝi.
Aŭdis matene post nokta trankvil' la ŝalmojn sonadi.
De l'najtingal' en vesper' la jubil', la kant' por dormadi.
Multe pli belajn ol iam ĝis nun la florojn mi sentas.
Arde subiras la orbrila sun', zefiro ekventas,
min ebriigas per dolĉa odor', per softmilda ondo,
kvazaŭ ĝi spirus el tutfora for', de transe de l'mondo.
Sentas min jam preskaŭ ne plu sur ter', anim' forprenita,
kiel en flugo tra l'nuba eter', ho, ombro benita.

LA VINON, LA BRILAN, ELTRINKU NUN NI*Wohlauf noch getrunken *** migradkanto germana*

La vinon, la brilan, eltrinku nun ni,
 adiaŭ, karuloj, adiaŭ al vi,
 al domo gepatra, al valo kaj mont'!
 Per forto min pelas sopir' al la mond'.

La suno ne restas staranta sur ĉiel',
 sed flugas tra kosmo, lumanta juvel'.
 La ond' ne gluiĝas sur mara la bord',
 la ŝtormoj muĝegas laŭ plej alta ord'.

Kun nuboj jen flugas la bird' tra la land',
 ĝojigas per sia hejmeca belkant'.
 Kaj same fariĝas la knab' vagabond',
 ja kiel ĝin montras migrado de l'mond'.

Salutas lin birdoj ĉe l'bordo de l'mar',
 de kampoj hejmecaj konata birdar'.
 Kaj flatas la knabon dolĉega odor',
 ho, tiel odoras nur hejmlanda flor'.

La domon gepatran sopiras li jam,
 la florojn li plantas memore al am'.
 Kaj amo samkiel tenera ruband'
 sentigas lin hejme en plej fora land'.

La vinon, la brilan, eltrinku nun ni!
 Adiaŭ karuloj, adiaŭ al vi,
 al domo gepatra, al valo kaj mont'.
 Per forto min pelas sopir' al la mond'.

LA VOJO AL FELIĈO*Der Weg zum Glück *** L. van Beethoven*

Unuec', justec', libero por la homoj alta cel'.
 Kiu volas vivi pace, vivu nur laŭ ĉi-apel'.
 For militojn, for la venkojn, ĝin kuraĝ' ebligas nur.
 Pac', justec', liber' ja estas gravaj signoj de l'kultur'.

Kial do necesas gloro? Tiu voj' - malĝusta voj'.
 Iru rekte ni al lum' la vojon al feliĉ' kaj ĝoj'.
 For l'armilojn, for rabadon, per milito nur mizer'.
 Ĉiuj homoj estu fratoj sur la vasta bela ter'.

LEPORET' EN KAVO*Häschen in der Grube *** kanto germana infana*

Leporet' en kavo sidis en dorm'.
 Ĉu lepor' malsana vi kaj ne povas salti pli?
 Hop lepor'! Hop lepor'! Hop lepor'!

LILLI MARLEN*Lilli Marlen *** modkanto*

Antaŭ la kaserno, ĉe la granda pord'
 staris jen lanterno, estiĝis lok' de sort'.
 Volas ni revidiĝi jen
 ĉe la lantern' feliĉ-reven'
 kun vi, Lilli Marlen.

Ho, la ombro nia estis unu nur,
 kaj la amo nia vidiĝis kun plezur'.
 Homoj ja vidu nin sen ĝen'
 brakumi ĉe lanterno jen
 kun vi, Lilli Marlen.

Vokis jam trumpeto: Tuj envenu nun,
 ne utilas peto, minacas grava pun'.
 Do, ĝis revido kun ĉagren',
 mi emus resti ĝis maten'
 kun vi, Lilli Marlen.

Vin ĝi bone konas kaj memoras vin.
 Min ĝi ne bezonas, kaj ĝi forgesis min.
 Sed trafus min de l'mort' malben',
 ho, kiu staros ĉe ĝi jen
 kun vi, Lilli Marlen?

El la spac' trankvila kiel ama tuŝ'
 venas sonĝ' jubila, via ruĝa buŝ'.
 Sed kiu staros en solen'
 ĉe la lanterno iam jen
 kun vi, Lilli Marlen?

LI PAŜTAS SIAN GREGON*Er weidet seine Herde *** G. F. Händel: La Mesio*

Li paŝtas sian gregon samkiel paŝtist',
 ŝafidojn Siajn vartas en delikata brak'.

Akceptas ilin kun kompat' en Sia sin'.
 Mildgvidas, kiuj dronas en sufer'.

Kaj venu al Li, ho troŝargitaj vi,
 nun venu al Li, ŝarĝitaj per doloro, konsolas dolĉe Li.

Lian jugon prenu kaj lernu de Li,
 ĉar delikata, humila estas Li,
 ke pacon vi trovos en kor' kaj anim',
 ke pacon vi trovos en kor' kaj anim'.

MALANTAŬ MAR' SUBIĜIS SUN'*Es löscht das Meer die Sonne aus *** kanto ŝipista el Provenco*

Malantaŭ mar' subiĝis sun',
 migras jam lun' en brila bel'.
 Al ora aglo sekvas nun cigno argenta sur ĉiel'.
 Flustras ĉe l'barko plaŭdkaresa ond',
 kordojn tuŝetas dolĉa vent'.
 Sekure remon tra la mond' gvidas sopir' kaj ama sent'.

Ripozu nun ĉe mia kor', amatinet', sur ondlazur'.
 Por vi dormkantas kun ador' muĝdelikate la natur'.
 Nukon de l'ond' tuŝetas venta kis',
 revu nun mia karulin',
 ke gvidas mi la barkon ĝis venos por ni la viva fin'.

La barko sur la akva sin' konkon simila glitas ĝi,
 en kiu svelta karulin', perlo feina, kuŝas vi.
 Ho, estus mia brak' la konka ŝel',
 vin ĉirkaŭanta nokt' kaj tag'!
 Venteto ludas kun la vel', preta por vi jen mia brak'.

MALGAJON MI SENTAS EN KORO*Ich weiß nicht, was soll es bedeuten *** F. Silcher*

Malgajon mi sentas en koro, sed kial tia tim'?
 Legendo el pratempa foro vagadas tra mia anim'.
 Jam fluas la Rajn' en malhelo, kaj malvarmetas l'aer'.
 Sed brilas la mont' en orbelo pro suna lum' de l'vesper'.

Jen supre knabino provokas per ora juvelar',
 kaj ŝia beleco allogas kaj ŝia ora harar'.
 Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige, sirene kantas ŝi
 per neimagebla, mirige potenca melodi'.

Ŝipiston en eta boato turmentas koremovi'.
 Ne ĝenas lin rifo-kaskado, rigardas nur supren al ŝi!
 Ĝis tiras kun si al Rajn-fundo la ondoj lin kun boat'.
 Nun kuŝas li en la profundo pro Lorelaja kantad'.

MALGRANDA DOM'*Ein kleines Haus *** J. Haydn*

Malgranda dom' en nuksa arbetar'
 Dum brilas tra l'fenestro suna radiar'.
 Alaŭda kant' jam frue vekas min,
 Alaŭda kant' jam frue vekas min.

Malgranda tablo, kiun primetas am',
 Malgranda kamp' kun tuta kreskaĵar',
 Kaj la sincera amo de najbar'.
 Ĉielo klara, honesta pura kor',
 Gajanimeco por labor'.

Ho, vi feliĉ'! Ĉu vi envias min?
 Se mi havus ĝin! Se mi havus ĝin!
 Volonte mi dividus ĝin kun vi.
 Ho, vi feliĉ', se mi havus ĝin!
 Volonte mi dividus ĝin kun vi!
 Ho, vi feliĉ', se mi havus ĝin!
 Volonte mi dividus ĝin kun vi!

MALHELROĜAJN ROZOJN*Dunkelrote Rosen *** K. Millöcker: Gasparone*

Malhelruĝajn rozojn, jen, vi bela in'!
 Kaj vi scias, kion rozoj diras vin.
 Delikataj sentoj, amoplena kor',
 kun diskret' alludas malhelruĝa flor'!

Kaŝe en florprofund' kuŝas la senc' sur grund',
 kion amatoj farus, parolus ne florabund'?
 Se en konvena hor' mankas la vort' al kor',
 ho, kion ne kuraĝas ĝi, per floroj diras ni.

MARIA, PLENA DE L'GRACO*Ave Maria *** G. Bach *** popolkanto germana*

Maria, plena de l'graco, kun vi estas Dio.
 Di-beata vi ja inter la virinoj,
 kaj estas beata de la ventro via la frukto Jesu', la Sinjor'.
 Sankta Maria, Sankta Maria, Maria,
 petu por ni, petu por ni pekuloj
 nun kaj en la horo, la horo de nia morto. Amen. Amen.

MATENE AL MONT'*Im Frühtau zu Berge *** melodio sveda*

Matene al mont' migras ni, falera,
 senzorga, kantanta soci' falera.
 Ni migras tra montaro kaj kantas en arbaro
 jam antaŭ en val' sonas koka kri'.

Oldulojn ja ĝenas la son', falera,
 por ili nur estas stulta ton', falera.
 Sed kiu ĝojon sentus, se ni senkaŭze plendus
 en tiu belega printempa sezon'?

Forgesu la zorgojn de l'mond', falera,
 kaj migru kun ni al la mont', falera.
 Ni migras kun jubilo, nin logas suna brilo,
 kunvenu en nia plenĝoja rond'.

MELODIO D'AMOR'*Melodie d'amour *** modkanto*

Melodio d'amor', serenado de l'amo, ho, kolibro vi,
 vin memoras mi.
 Amomelodi', mi ja sentas sopiron, dum aŭskultas mi.
 Kolibreto vi, kantu pri la jar' ĉe la blua mar',
 kiam ŝi kaj mi estis unu par'.
 Ho, kolibreto vi, vin ne forgesos mi, ĉar via eta kant'
 triladas tra la land',
 sorĉas la koron ĝi per dolĉa melodi'.
 Melodio d'amor', mi ja sentas sopiron, dum sonadas vi,
 amomelodi'.

MEMORO

*Memory *** A. L. Webber: Cats (muzikteatraĵo)*

Meznokt', eĉ ne son' en la strato
kaj la lun' sur l'ĉielo kun ridanta lumad'.
Kaj folioj kirliĝas ĉirkaŭ mi en dancad'
kaj aŭdiĝas ventzumad'.
Reen pensas mi sub la luno
pri la tempo pasinta, ne forgesas mi ĝin.
Mi memoras, ke vivo estis plena feliĉ',
ke nur estu ĝi sen fin'.
Ĉiu stratlamp' memorigas pri la sortmalbeno.
Viro sakras, stratlanterno flagras,
kaj venas jam mateno.

Taglum', mi atendas la sunon,
kaj kun ĝi novan vivon, kaj rekreskas l'esper'.
La vespera krepusko nur memoro por mi,
venos nova vivsomer'.
Fine de malhela nokt' sentita kiel plago,
lampo mortas, kaj la nokt' malfortas,
kaj venas nova tago.
Venu kaj ne lasu min sola kun memoroj pri amfeliĉ',
kaj pri amplena brak'.
Min karesu, kaj tuŝos nin feliĉo sen fin'.
Komenciĝos nova tag'.

MESO DE GREISING*Greisinger Messe *** H. Gärtner*Peto:

Di', kulpuloj estas ni, Di', kompatu nin.
 Ni konfesas nun al vi, Di, kompatu nin.
 Pekis ofte kaj sen fin', Krist', kompatu nin.
 Eternul', pardonu nin, Krist', kompatu nin.
 Savu nin el ĉiu kulp', Di', kompatu nin.

Gloro:

Ho, Di', vi potenca mister', savas el ĉiu mizer'.
 La ter' vin adoras, la ĉielo' vin glor'as, ja
 sole al Di' estu glor', ja sole al Di' estu glor'!
 Vi gardas en am' sen mezur', patro, kreint' del'natur:
 Herbejojn, arbarojn, la valojn, montarojn, ja
 sole al Di' estu glor', ja sole al Di' estu glor'!

Kredo:

Honor' al vi, Maria, en grac' favorita,
 Di' estas kun vi. Al vi nur estas glor' inter la inoj,
 same estas glor' al la frukt' el via korpo, Jesuo.
 Sankta Maria, Dipatrino, petu por ni pekuloj
 nun kaj kiam venos nia lasta horo. Amen.
 Nun kaj kiam venos nia lasta horo. Amen.

Laŭdo:

Sankta, sankta. Laŭdon ni volas nun diri,
 al nia Dio honor'.
 Igas nin homojn vi spiri, por vin adori, Sinjor'.
 Ĉion vi regas, ho, Vi granda Di',
 al vi, eterna Di-patro, venas estime nun ni.
 Sankta, sankta!

Post konsekro:

Ĵus la miraklo okazis per vi, nia Sinjoro nun estas ĉe ni.
 Am' tia estas la perfekta grac',
 sin donas sen kondiĉ', dia donac'.
 Petojn submetas ni al vi sen fin',
 filo de l'eternul' aŭskultu nin.
 Morton, insultojn vi portis por ni.
 Iam akceptu nin, grac'dona Di'!

Fino:

En fort' per via grac' ni hejmen iros kun
 la kred' al la Sinjor' en nia kor'.
 Kaj kio povos jam al ni okazi nun?
 Kuraĝe paŝas ni en difavor'.

Refreno:

Ni havas grandan peton jen al Vi:
 Sekure gardu, Di', popolon, landon nun
 per milda, forta man'.
 Neniu konas ja la estontecon jam,
 ni forte fidas vin, Sinjor', nur vin.
 Kuraĝ' kaj fid' al Di' ordigas ĉion tuj,

ĉar mem vi diris ja: vi amas nin.
Amen.

Ĝis revid':

Nun fratoj iros ni, jen ĝis revid' al vi!

MIA LANDO ĈARMA

*Aká si mi krásna *** E. Suchoň *** kanto nacia slovaká*

Mia lando ĉarma, valoj kaj montaroj;
kie mi naskiĝis, ravas min arbaroj.
Bela la ĉielo, alta jen super ĝi.
Amas vin kore mi, benas vin larme mi.

Ho, arbaro verda, zumas viaj plantoj,
kvazaŭ sorĉe ŝvebus delikataj kantoj.
Rozoj vi sovaĝaj, floras jen rave vi.
Amas vin kore mi, benas vin larme mi.

Kaj popolo kara sian landon vartu.
Kalojn de laboro dia mano gardu.
Kaj li donu ĝojon, ĉiam nur ĝin al vi.
Benas vin varme kaj kore per larmoj mi.

MI DONOS MIN

*Ich schenk mein Herz *** K. Millöcker: La Dubarry*

Jam ofte mi la amon ĝuis, aŭ kun fortun' aŭ sufereg'.
Kaj kvankam larmoj miaj fluis, eĉ dronis mi en feliĉeg'.
Kaj mian korinklinon, ĝin mi donacis ja sen pent',
sed restis mi virino, kun la princip' kaj daŭra sent':

Mi donos min al vir' nur for',
kiu min amos kun ador',
privenkos min, konkeros min,
donos en plena amo sin.
Mi donos min al vir' nur for,
por kiu brulos mia kor',
plaĉos al mi, volos lin mi,
estu servisto aŭ reĝo li.

Parolas vir' pri arda amo, kaj tamen estas nur flatad'.
Por juna kor' fariĝas dramo, disrompas ĝin la dura bat'.
Ĉu ĵuri fidfervoron, se l'vort' rompiĝas baldaŭ jam?
Mi donos mian koron, se el okul' parolos am'.

MIGRULO MALRIĈA

*Ich bin nur ein armer Wandergesell *** E. Künnecke: La kuzo el Dingsda*

Migrulo malriĉa nur estas ja mi,
bonan nokton al vi, korknabin'.
Maldika la jak', vivas mi kun pasi',
bonan nokton al vi, korknabin'.
Jam pensis, ke kaptis feliĉon mi ĝin,
sed ĉiam retiris kruise ĝi sin.
Nur rido kaj plor' konsolis min.

En lit' bele mola mi kuŝas kun ĝu',
bonan nokton al vi, korknabin'.
Hodiaŭ mi dormas kaj sonĝas sen bru',
bonan nokton al vi, korknabin'.
Kaj iros matene denove mi for,
kunvenos por ĉiam belega memor'.
Ja devos migradi mi sen fin'.

Migrulo malriĉa nur estas ja mi,
bonan nokton al vi, korknabin'.
Bona nokt', bona nokt' estu nun,
korknabino, por vi!

MI IRAS AL MAKSIM'*Da geh' ich ins Maxim *** F. Lehár: La gaja vidvino*

Ho patroland', dum ĉiu tag' pro vi estiĝas granda plag'.
 La nokton ĉiu diplomat' bezonas por privata ŝat'.
 Tagmeze venas al buro, sed restas ja ne longe tro.
 En oficej' dum tuta tag', terura estas ĉi imag'.
 Por ĉefraport' ne estas em', malofte faras ĝin mi mem.
 Publikon ne informas mi, ĉar diplomat' silentu li.
 Aktmontoj kreskas sen esper', tro multe estas da paper'.
 Malofte uzas inkon mi, labor' min tamen premas ĝi.
 Tutklare tiu daŭra ag' lacigas ĝis la fin' de l'tag'.
 Necesas nokta kompensad' por tiu taga turmentad':

Mi iras al Maksim', intima dom' sen lim',
 la damoj ruze logas, mi ilin karesvokas:
 Lo Lo, Do Do, Ĵu Ĵu, Klo Klo, Margot, Fru Fru.
 Ne pensas plu ĉe ili pri l'kara patroland'.
 Jen fluas la ĉampan', ĝojigas la Kan-Kan,
 kaj kisoj, karesado dum nokta amuzado.
 Lo Lo, Do Do, Ĵu Ĵu, Klo Klo, Margot, Fru Fru.
 Ĉe ili mi ne pensas pri l'kara patroland'.

Jen venas en matena fru' bilet' al mi por rendevu',
 tre akurata estas mi, atendas ĝis alvenas ŝi.
 Jen ŝi, vualo kaŝas ŝin, tenere mi fortiras ĝin.
 Tuj fajro estingiĝas ĝi, rapide hejmen fuĝas mi.
 Se inon tre avidas vi, sed jam edzino estas ŝi,
 kaj ĵus dum dolĉfrandad' de kis' aperas edzo kun surpriz'.
 Kaj eĉ postulas li, terur! Transprenu vi la inon nur.
 Se tio eble trafos vin, eskapu tuj por bona fin'.
 Do longa ofte estas tag' eĉ malgraŭ mia daŭra plag'.
 Kaj ĝis alvenas la vesper' ofertas sin nur ĉi afer':

Tuj iri al Maksim', intima dom' sen fin',
 kun sendanĝeraj faroj kaj belaj damo-aroj.
 Lo Lo, Do Do, Ĵu Ĵu, Klo Klo, Margot, Fru Fru.
 Ne pensas mi ĉe ili pri mia streĉa tag'.
 Jen fluas la ĉampan', ĝojigas la Kan-Kan
 kaj kisoj, karesado dum nokta amuzado.
 Lo Lo, Do Do, Ĵu Ĵu, Klo Klo, Margot, Fru Fru.
 Forflugas ĉiuj pensoj pri tagaj zorg' kaj plag'.

MIN FELIĈIGAS*Lass es mich hören *** G. Donizetti: Don Pasquale*

Min feliĉigas la vorto, ofte nur diru ĝin vi,
 ke nin firmligas la sorto, restos fidela al mi.
 La vort' de viaj lipoj - ĝi estas por mi balzamo.
 Sanigas min via amo. Mortos mi fora de vi.

MISTEROKULOJ

*Zwei Märchenaugen *** E. Kálmán: La cirkoprincino*

Ek al scenej', al lumradiad',
al la maneĝ' kun gaja ridad'.
Blanka vizaĝ' laŭ cirkomastra ordon',
montru vin nun, li ja pagas per mon'.
Klaŭn' nur vi estas, ludil' de la sort',
montru la artojn per tuta fort'.

Se al publik' vi plaĉas, venas aplaŭd',
se malsukces', estas mallaŭd'.
Vivos mi kun favor', mi prenos,
devos mi for, eltenos.
Se feliĉ' venos jen, prenu tuj, arleken',
prenu tuj, arleken'! Prenu!

El sangoruĝa vin' radias la fortuno, la idealo.
El vinpokalo vekigás en imag' de l'viv' iama suno.
Du blankaj brakoj kaj buŝ' sur grund'
de l'glaso lumas en la vinprofund':

Misterokuloj, kiel steloj la bel',
misterokuloj de amata anĝel'.
Ĉu mi forgesu la okulojn de ŝi?
La ĝoj' iama nun perdiĝis por mi.
Vi rev' de l'amo, ho, maltrafis mi vin,
feliĉsopiro, nur prisonĝis mi ĝin.
Vi iluzio kaj ĝu' kaj turment', ho, vi fabelo, perdita sent'.

Ke oni de la klaŭn' detruis la feliĉon,
li devas preni kaj ĝin elteni.
Ek al maneĝo nun! Plenumu la dediĉon!
Vizaĝon masku, ne pensu plu pri ĝu' kaj am'
kaj kion perdis vi:

Misterokuloj, kiel steloj la bel' ...

MUELA RAD' TURNIĜAS

*In einem kühlen Grunde *** popolkanto germana*

Muela rad' turniĝas en val' dum nokt' kaj tag',
foriris amatino loĝinta ĉe la lag'.

Donante ringon ĵuris fidelon ŝi al mi,
sed nun ringeto krevis, fidelon rompís ŝi.

Mi volus formigradi kantante tra la mond',
de dom' al dom' kantadi, eterna vagabond'.

Mi volus nun kun glavo galopi al batal',
ripozi en varma kavo en nigra nokta val'.

Se mi la radon aŭdas de tiu muelil',
vin, morto, mi sopiras, ho fonto de trankvil'!

NAPOLI

*Napoli *** W. Scharfenberger *** modkanto*

Napoli, ho, vi fabela urb' ĉe l'mar',
Napoli, faris vi nin feliĉa par'.

Ĉu la karajn stratojn revidos iam mi,
 vagados tra la urb' kun vi?
 Aĥ, Napoli, ĉarma fabel' ĉe l'palma strand',
 Napoli, kie nin ligis amruband'!
 Vent' kaj ondoj kantas addio ĉe la bord',
 forpasis bela rev' - sen ama vort'.
 Adriano - bela memor',
 Adriano - mia amor'!

Napoli, sonas nur via melodi'.
 Napoli, arde sopiras mi al vi.
 Super ni briladis arĝenta diamant',
 ĉiela ornamaĵ - la stelruband'.
 Napoli, al Adriano diru nun,
 Napoli, ke baldaŭ ridos la fortun'.
 Venos mi, revenos al mia Napoli,
 kaj lia arda kis' - estu por mi.
 Adriano - bela memor',
 Adriano - mia amor'!

NASKIĜOFEST'

*Geburtstag *** S. Bimberg*

Naskiĝofest' hodiaŭ jen, pro tio venas ni,
 por kanti festkanteton nun, ĉar estas ĝoj' por vi.

Kaj buntajn florojn portas ni por tre ĝojigi vin.
 En akvon metu ilin tuj, konservos longe sin.

Se ankaŭ kukon havas vi, grandegan, donu ĝin
 kaj ĉokoladon krome ja. Invitu ĉiujn nin!

NEK DIMANĈO ĈIAM ESTAS

*Alle Tage ist kein Sonntag *** C. Clewing *** kanto germana*

Nek dimanĉo ĉiam estas, nek vin' dum ĉiu tag',
 sed vi tenu ĉiutage min en via brak'.
 Kaj post mia morto vi repensu pri mi
 ja vespere antaŭ dormo; sed neniam ploru vi.

Verdiĝu kaj floru, maturiĝu la gren',
 folioj forvelkas, la viv' estas pen'
 kaj venos eĉ neĝo, atendos ni, kaj
 kredos firme baldaŭ venos nia nokto de l'maj'.

Kaj venos malhelpo, peza viv' kaj griza har',
 por ni briletos lumo en ĉiu ajn far'.
 Sed post mia morto vi repensu pri mi
 ja vespere antaŭ dormo; sed neniam ploru vi.

NEK FAJRO, NEK LA KARB'

*Kein Feuer, keine Kohle *** popolkanto germana*

Nek fajro, nek la karb' brulas per tia arda flam'
 kiel amo sekreta, enŝlosita kora am'.

Nek rozo, nek diant' floras en tia belegec'
 kiel du geamantoj kunstarantaj en solec'.

Ho, mia tuta koro ja estas spegul'.
Ĝi montras, ke mi vin amas, ĉiam restos fidelul'.

NIGRAJ OKULOJ

*Schwarz wie dö Kerschn *** popolkanto bavara*

Nigraj okuloj de l'kor-knabin',
nigraj laŭ ĉerizoj, delectas min.
Dentoj eburblanka la kolor', ŝtondura tamen la kor',
dentoj eburblanka la kolor', ŝtondura tamen la kor'.

Tial la homoj envias min,
sed ili devas kulpigi ŝin.
Ĵetis ja siajn okulojn ŝi ĝuste kaj rekte al mi,
ĵetis ja siajn okulojn ŝi ĝuste kaj rekte al mi.

Ĝojo por mi estas tiu in'
kaj nur por ŝi mia kor-inklin'.
Pli ol min mem ŝin ja amas mi, estas la plej kara ŝi,
pli ol min mem ŝin ja amas mi, estas la plej kara ŝi.

NI VIDAS ARON BLANKAN JEN

*Den store, hvide Flok *** kanto norvega*

Ni vidas aron blankan jen samkiel neĝa montoĉen'.
El palm-arbar' la foliar' susuras en seren'.

Jen de l'herooj la mister', eskapis ili el mizer'.
Sang' de l'ŝafid' por ili gvid' al ĉiela sankta sfer'.

Plenvoĉe nun en adorad' aŭdiĝas ĝoja jublad'
je l'Di-favor' kaj Di-honor', admira Di-laŭdad'.

NOKTIĜAS EN ERIKEJO

*Es dunkelt schon in der Heide *** popolkanto germana*

Noktiĝas en erikejo, hejmvokas la sonoril'.
Rikoltis ni grenon tuttage per nia brila falĉil'.

Mi aŭdis susuri falĉilon, zumadis tra greno kaj flor'.
Perditan amaton sopiras karinjo la mia kun plor'.

"Ĉu vere vi perdis karulon? La mia ne estas for.
Do faru ni ambaŭ florkronon, knabino de mia kor'."

Kroneto belega el rozoj, signifus feliĉon ĝi.
Profunde en Frankfurt sur ponto la neĝon travadas mi.

La neĝo fariĝas akvo, fluadas tra land' al mar'.
Perdiĝos okuloj la karaj kaj sento de via belhar'.

NUN ADIAŬ, BELFLANDRINO

*Lebe wohl, mein flandrisch Mädchen *** A. Lortzing: Caro kaj ĉarpentisto*

Nun adiaŭ, belflandrino, forvojaĝi devas mi,
sed mi amas vin elkore, mian vorton havas vi.
Vivas amo en l'animo por vi, mia amata, nun.

Certe neniam perdiĝos la koro,
ne apartenos al iu knabin'.

Vi ja fariĝis nun mia trezoro,
estos por vi plensincera inklin'.

Ĉiam fidelo, kora inklino,
ho, amata, al vi nun eterna inklino.
Ĉiam fidelo, mia inklino,
estus ĉiam fidel' al vi kaj inklino,
ĉiam fidel' kaj korinklino!

Donu al mi tiun buklon, ĝi ripozu sur la kor'.
Mian flandran amatinon devos mi nun lasi for.
Ŝin sopire mi memoros en la brua, terura batal'.
Sed ĉu vi iam pri mi rememoros,
mi apartenas plenkore al vi,
kaj en tener' kaj malĝojo vi ploros,
kiam el vivo pereis jam mi?
Ĉu vi tenere min rememoros,
kies kor' apartenas en daŭra inklino al vi?
Ja apartenas kore al vi.
Ĉu tenere memoros vi mian amon,
fidela kor', inklino al vi?

NUN ĜIS REVID', AMIKOJ VI

Auf Wiedersehn, ihr Freunde mein

Nun ĝis revid', amikoj, vi, la jar' jam pasis for.
Mi dankas vin pro ĉiu tag', pro ĉiu bela hor'.
Ho, ĝis revid', vin, kara urb', mi lasas kun dolor'.
En vi mi sentis hejme min kaj restos mia kor'.

Ho, ĝis revid', vi, bela temp', favoris riĉe min.
Kaj forton al mi donis am', ĝis venis nun la fin'.
La kant' de nia amikec' postsonas nun en mi,
memoros min dum tuta viv' pri vi, kaj nur pri vi.

NUN IRAS MI AL PUTO*Jetzt gang i ans Brünnele *** popolkanto ŝvaba*

Nun iras mi al puto, sed trinkas ne mi.
Amata mia korkarulin', kie estas vi?

Ho ve, ho, ĉu mi kredu al mia okul'?
Jen staras mia korb belulin' apud aliul'.

Ŝi staras ĉe alia knab', kia dolor'!
Vin benu Dio, koramatin', iros mi nun for.

Sur tablo kuŝas inko kaj plum' kaj paper'.
Skribiĝas por la korkarulin' lasta veleter'.

Sur fojno kaj sur pajl' mi kuŝigas nun min.
Tri ruĝajn rozojn trovas mi jen en mia sin'.

La rozoj ne rakontas pri vivo kaj sort'.
Ho, ĉu amata, vivas vi, aŭ vin trafis mort'?

NUN SOMER'*Summertime – Lullaby *** G. Gerschwin: Porgy kaj Bess*

Nun somer' kaj senpena la vivo,
fiŝoj saltas, alte kreskas koton'.
Riĉa paĉjo ja, ho, kaj ĉarma la panjo,
neniel minacas vin malbon'.

Iam matene kantante vi leviĝos,
kaj feliĉon ja serĉos vi sen fin'.
Tamen ĝis tiam vin doloros nenio,
Ĉar paĉjo kaj panjo gardos vin.

NUN VENAS VESPERA KVIET'*Der Abend kommt ganz staad *** popolkanto bavara*

Nun venas vespera kviet',
blovetas la vent' de l'montet'.
De l'val' supren tiras nebulo sin nun,
la florojn dormlulas la sun'.

Ni sidas sub ĉielo kun vi,
krepuskon rigardas ni.
Lin dankas, fariĝis ja per Lia brak'
la mont' kaj la nokt' kaj la tag'.

NUR LA AM'*Only love *** V. Cosma *** modkanto*

Nur la am', memoron donas ĝi,
 nur la am' vivigas ĝin en ni.
 Kaj ĉirkaŭas nin mirakla mond',
 de nia am' respond'.
 Kaj mi memoras, ke ĉio estis am'.
 Vi donis ĝin al mi, kaj brulis en la kor' la flam'.

Nur la am', memoron donas ĝi,
 nur la am' vivigas ĝin en ni.
 Ho, la viv'! Valoris ĉiu tag' en via mola brak'.
 Kaj mi memoras, ke ĉio estis am'.
 Vi donis ĝin al mi, kaj brulis en la kor' la flam'.

Sentis mi nur vin en mia kor',
 vivis ankaŭ vi en mi dum ĉiu hor'.
 Belaj la tagoj kaj noktoj kaj sort',
 lumis pli hele ol brilo de l'sun'.
 Kaj ĉiu rev', ĉiu larm', ĉiu vort' en memor' vivas nun.

PACA NOKT', SANKTA HOR'*Stille Nacht *** X. Gruber *** kanto germana kristnaska*

Paca nokt', sankta hor', mondo nun sen sonor'.
 Nur maldormas la sankta par'. Knabo eta kun bukla harar'
 dormu nun en trankvil'.

Paca nokt', sankta hor', paŝtistar' en ador'.
 Tra l'anĝela haleluja al la mondo sonegas ja:
 "Venis Krist' la savant'."

Paca nokt', sankta hor', dia fil', via kor'
 donas amon dian sen fin', de l'malbono vi savis ja nin,
 Krist', per via naskiĝ'.

PALOMA*La Paloma *** kanto marista*

Ho, vi, kial estas vi en tutfremda lok'?
 Al vi ĉiunokte flugas soleca vok'.
 Belega la viv', ne rajtas mi ĝui ĝin.
 Sed kiel mi iam povos revidi vin?

Ekflugu, Paloma, montru al sud' la vojon.
 Tie, Paloma, trovos mi pacon, ĝojon.
 Ekflugu, Paloma, flugu al oraj landoj,
 jen en la mar' insulo de la amantoj.

Nur fidelon al mi lastan fojon mi petas,
 por lastfoje revadi pri amo, ĉar ne revenos ĝi.
 Ho, am', kial fuĝas vi al la monda fin'?
 Ho, kial neniam povos mi trovi vin?

PASTRA ĤORO*Priesterchor *** W. A. Mozart: La sorĉa fluto*

Genio, ho, ŝirmanto, proksimiĝu!
 Per via ben' la kantoj nun sanktiĝu,
 ke ĝoje ili flugas al ĉielo,
 ŝvebas de kor' al kor' en glora helo.
 Ho, brusta trem', ĉar via spir'
 nin, nin, nin supren levas kun aspir'.

Pacigu ĉiujn homojn kaj kunigu,
 per l'harmoni' de l'sonoj ĝojigu.
 Kompens' plej bela jen al nobla homo,
 se kantas li en via sankta nomo.
 Volupt' de l'ter', ĝi restu for,
 pur', pur', pur' estu en kantista kor'.

Oziris' kaj vi, Izis', ĝojebria
 la nokton pelis for la suno dia.
 Junul', ho, nova vivo estos lia,
 ĉar li submetos sin al servo nia
 en pur-aŭdac'. Al li promes':
 nun, nun, nun baldaŭ li en nia mez'.

PENSADO MIA*All mein Gedanken *** germana popola kanto*

Pensado mia ĉiam estas nur ĉe vi,
 konsolo elektita, restu do ĉe mi!
 Vi, vi, vi ĉiam min memoru!
 Ĉiun horon vin sopiru mi kaj vin adoru!

Konsolo vi unika, ho, forgesu ne,
 Ke apartenas ĉio mia al vi tre.
 Mi, mi, mi ĉiam restos via;
 venas ĝojo ja per vi, foriĝas peno mia.

PLUVAS, PLUVAS*Prší, prší *** slovaka popolokanto*

Pluvas, pluvas kun plenforto, kaj mi staras antaŭ pordo.
 Kara, malfermu ĝin, lasu nun eniri min.

Kiam iris mi de Anjo, sen ke vidis ŝia panjo,
 ploris ŝi, tenis min - mi ne rajtas ami ŝin.

Sankta Ĵano, mi vin petas, ke Anjeto por mi pretas.
 Tamen suferigas min, ke patrin' ne donos ŝin.

Okuletoj grizaj ploras, ĉar de Anjo mi nun foras.
 Prenos ŝin aliul', sed ne vera korkarul'.

PRENU MIN*Prevez, prevez, prievozniĉku *** popolkanto slovaka*

Prenu min, pramist', kun forto
transen al alia bordo,
kie loĝas amatino,
amas mi ŝin kun inklino.

Ne plu havas mian pramon,
mi bedaŭras vian amon.
Pro tempesto el montaro
prenis ĉion for akvaro.

PROMENAS MI TRA LA ĜARDENO*Da draussen im duftigen Garten *** O. Straus: Valsrevado*

Promenas mi tra la ĝardeno, odoras siring' kaj jasmien'.
Min ĉarmas sonadoj allogaj, ravanta muziko de Vien'.
Sonadas al mi melodioj, kantadas, jubilas pro ĝoj'.
Ho, valso, vi dolĉa el Vieno, vi estas al amo la voj'.
Aŭdiĝas samtempe ĝemado kaj rido, sopiro kaj plor'.
En tia belharmonio feliĉon nur trovas la kor'...

Dolĉe, tutdolĉe flugas la ton',
valsa revad', amata son'.
Vi doloriga kara akord',
en niaj koroj sonas kun fort'.
Ho, vi printemp', feliĉo sen fin',
vekas sopiron al amatin'.
Vivi kaj ami kun ĉiu spir',
ami en majo, korodezir',
vivi kaj ami kun ĉiu spir',
ami en majo, korodezir'!

Aŭskultu ni tie kaj kantu! Malpeza fariĝas l'anim'.
Ĝin flate karesas la valsoj, mistere ĝi revas sen lim'.
Ho, fermu ni niajn okulojn, revenas pasinta la temp'.
Beataj ni estas, nin ravas la amo, feliĉo, printemp'.
Nur for el la pompaj salonoj al lok' pli agrabla por ni.
Rakontas ĝoje la sonoj pri Vieno en valsmelodi'!

RAVIGU MIN VIA AMO*Hab' ich nur deine Liebe *** F. Suppé: Boccaccio*

Ravigu min via amo, eĉ sen la fidelec',
Ĉar el la am' burĝonas ja por ni fidelbelec'.
Ĉar eĉ sen fideleco ja ofte ravas am',
sed fidelec' sen vera am' ne estas varma flam'.

Do, ŝirmu la burĝonon en plena perfektec',
ke ĝi prosperu flore nun en bril' de nia amosun',
ĉu kun, ĉu sen fidelec', ĉu kun, ĉu sen fidelec'.

REGANT' FARIĜU EN L'ANIM' DE MI*Du sollst der Kaiser meiner Seele sein *** R. Stolz: La favorato*

Jen land' kun sorĉa melodio,
jen land' kun kora emocio,

kun pensoj plenaj de magio pri mia kortenera am'.
 La land' de mia vivozono, al vi nun estos ĝia krono,
 kaj sidos vi sur ĝia trono en land' de arda ama flam'.

Vi, vi, regant' fariĝu en l'anim' de mi,
 vi, vi, purpuron regnan portu sole vi.
 Vi, vi, la sceptron gvidu sole, vi, vi,
 kaj regu vi laŭvole.
 Vi, vi, venkinto estos vi.

Por via am', por tiu dono en mia kor' por vi la krono.
 Libere regu sur la trono al vi donita nun de mi.
 Regant' vi estos de l'sopiroj, ordonoj viaj kordeziroj.
 Obeos mi al viaj diroj, animon fidis mi al vi.

REGENSBURGON NI VIZITIS

*Als wir jüngst in Regensburg waren *** popolkanto germana bavara*

Regensburgon ni vizitis, trans la akvokirlon glitis.
 Ĉarmulinoj multaj jen transis akvon sen ĉagren'.

Ŝvabajn, bavarajn knabinojn, juĥhajrasa,
 la pramist' veturigas.

Sur ĉeval' de l'mont' kastela Kunigund', fraŭlin' nobela,
 rajdis al la ŝipo ŝi, transi kirlon nun kun ni.

"Kio estas do la vero, ho, pramist', pri l'kirl-danĝero?
 Tutsincere diru min, ĉu mi devas timi ĝin?"

"Al fraŭlin' kun mirto-krono ne minacas la malbono.
 Sen ĝi - nepra morto estos ŝia sorto!"

En la mezo, ho, mizero, venis niks' el la rivero.
 Nobelinon Kunigund' tiris li al kirl-profund'.

Dekdujara knabineto transis kirlon en kvieto.
 Estis ŝi sen amosci', sen danĝer' la kirl' por ŝi.

RESPONDAS LA VENT'*Blowin' in the wind *** B. Dylan *** kanto porpaca angla*

Kiom da mono elspezas la mond'
 por bomboj, raketoj kaj mort!
 Multaj sin gloras, paradas per buŝ',
 sufer' nek mildiĝas, nek sort'.
 Kiom okazu ankoraŭ mizer',
 ĝis venos por savo la vort'?

Respondas, amik', tutsole nur la vent',
 respondas tutsole nur la vent'.

Kiom da vojoj en tuta la mond'
 abundas per larmoj, sufer',
 kaj oceanoj ĝis mara profund'
 plenplenas per trista mizer'!
 Kiom da inoj dum tutsola viv'
 atendas en vea toler'?

Kiom da homoj en malliberec'
 sopiras ŝanĝiĝon de l'stat',
 kaj geinfanoj milionoj dum nokt'
 ne dormas pro morda malsat'!
 Kiom da homoj noktpetas en rev':
 ho, venu al ni, bona fat'!

REVAS LA GAŬĈO*Der Gaucho träumt *** modkanto*

Sidas ĉe l'put' la gaŭĉo, revas la juna kor'
 dum sur ĉiel' vespera sinkas la suna or'.
 Liaj ĉevaloj trinkas, paŝtas en verda land',
 sonas de liaj lipoj dolĉe sopira kant':

Vin gardas bela lun' dum nokte nun salutas stela bril'.
 Al amfeliĉo ĝi estas por vi ĉielŝlosil'.
 Knabin', eta knabin', ho, karulin', mi ja sopiras vin!
 Knabin', eta knabin', ho, karulin', atentu min!

REVENU AĜ' DUDEK AL MI*Man müsste nochmal zwanzig sein *** G. Jusenhoven *** kanto moderna*

Sidas hom' ĉe l'vino, revas li sen fino
 pri la longe fora pasintec'.
 Gvidas lin la koro reen al memoro,
 al deziroj de la beljunec'.
 Se iama tempo povus nun reveni!
 Se juneca aĝo reen venus ĝi!

Revenu aĝ' dudek al mi kaj amo kiel tiam
 kaj sur herbej' forgesi pri la vivo kaj temp'!
 Kaj se la koro povus nun decidi kiel tiam,
 tutcerte estus kordecid' denove nur por vi.
 Vi nur estas la in', kiu pardonas min,
 kion ĵus mi revis, mi revis ĉe l'vin',
 kion ĵus mi revis, mi revis ĉe l'vin'.

Kelka drinkemulo vidas en spegulo
 tempon de la propra junulec'.
 Pro la vin' en glaso kaj la ruĝa nazo
 vualiĝas lia pasintec'.
 Se li nun nur povus ĉion rekomenci,
 novan kaj pli saĝan vivon kreus li.

REVIDO NUN!*Auf Wiedersehen! *** modkanto*

Revido nun, revido nun, ne restu longe for!
 Sen vi la vivo estas pun', premiĝas mia kor',
 Revido nun, revido nun, karulo, kredu vi:
 Brilados hele nia sun', revenos vi al mi!

ROZO KAJ NAJTINGALO*Rose und Nachtigall *** N. A. Rimski-Korsakoff*

Por rozo kantas najtingal'
 dum tag' kaj nokt' en am' tra l'val'.
 La roz' ignoras la adoron.
 Al belulin' en amsufer' junulo kantas en tener',
 ŝi ne atentis la doloron.
 Do, kial ĝemoj pro amor'
 kaj kant' pri ama ve' kaj plor'?

ROZO-MARI'*Rosemarie *** F. Jöde *** kanto germana*

Rozo-Mari', Rozo-Mari',
 sonis sep jarojn el kor' mia kri'.
 Rozo-Mari', Rozo-Mari', sed ne aŭskultis min vi.
 Dum nokta hor', dum nokta hor'
 sonĝis pri via ridet' mia kor'.
 Venis la tag', venis la tag', kuŝis mi sen via brak'.
 Olda mi nun, olda mi nun,
 sed mi sopiras je amofortun'.
 Ama inklin', ama inklin' vivas en mi ĝis la fin'.

RUĜIĜAS MATENA HEL'*Ay, ay, ay *** O. P. Freire *** serenado kreola*

Ruĝiĝas matena hel', por vi, mia korfortuno.
 Aŭror' vekigigas en belo, vin kisas briloj de l'suno.
 Paliĝas aŭrora jam hel', karesas vin bril' de l'suno.
 Turmentas min sort-malbon', la am' mortas en doloro.
 Pro via koro el ŝtono por mi estiĝas nur ploro.
 Jes, pro via koro el ŝton' por mi nur estiĝas ploro.

SABLO-VIRET'*Der Sandmann ist da*

Jen sablo-viret', jen sablo-viret'!
 Kunportas blankan sablon li, lin ĉiuj bone konas vi.
 Jen sablo-viret'!

SALUTAS LA ZEFIRO*Nun will der Lenz uns grüssen *** N. von Reuenthal *** poemo mezepoka*

Salutas la zefiro, printempon portas ĝi.
 Per ĝia varma spiro jen floroj pli kaj pli.
 El ili erikejo sin garnas per florad'
 kaj sub ĉielo suna invitas al dancad'.
 Kaj birdkantado gaja jubile vokas ĝi:
 Ek al la danco maja! La vokon sekvu ni.
 Kaj logas sub tilio rob' blanka de knabin'
 al ama idilio, al vera vintra fin'.

SALUTATA VERA KORPO*Ave verum corpus natum *** W. A. Mozart *** kanto religia*

Salutata vera korpo, venis el Maria virgulin'.
 Krucumita, oferita je l'kruco por homoj ni.
 El la flanko traborita akvo fluis kaj sango jen.
 Estas antaŭsento nia pri l'morto-ekzameno,
 pri l'morto-ekzameno.

SANKTA*Heilig, heilig *** F. Schubert: Germana meso*

Sankta, sankta, sankta, sankta estas Di'.
 Sankta, sankta, sankta, sankta estas Li.
 Estas sen komenco, universa sin'
 restos en eterno Li sen temp' kaj fin'.

Sankta, sankta, sankta, sankta estas Di'.
 Sankta, sankta, sankta, sankta estas Li.
 Ĉionpov', miraklo, amo estas Li,
 sankta, sankta, sankta, sankta estas Di'.

SANKTA LUCIA*Schon glänzt das Mondenlicht *** itala melodio*

Super mar' brilas luna arĝento,
 dolĉe blovetas zefira vento.
 Venu rapide al barko mia.
 Sankta Lucia, Sankta Lucia.

Bone vi fartos en la barketo.
 Ravas agrabla, milda venteto,
 logas al revoj sur mar' magia.
 Sankta Lucia, Sankta Lucia.

Ne restu hejme, venu por esti
 sur mia barko, ĝui kaj festi.
 Vin akompanas rido la dia.
 Sankta Lucia, Sankta Lucia.

Sur mia barko en ŝirma tendo
 vin ja atentos nokta silento.
 Pasos sekure dormo la via.
 Sankta Lucia, Sankta Lucia.

Napolo ĉarma, ter' sen ĉagreno,
 ĉiam alridas vin dia beno.
 Vi estas lando plenharmunia.
 Sankta Lucia, Sankta Lucia.

Kial heziti? Bela vespero!
 Freŝa, varmeta jen aero.
 Venu nun, venu, al barko mia.
 Sankta Lucia, Sankta Lucia.

SARI MAREJS*Sari Marejs *** kanto sudafrika*

Mia Sari estas for de malgaja mia kor',
 ŝin revidi por mi esper'.
 Ŝi ja loĝas en kvartal' en belega verda val',
 proksime de la granda river'.

Regvidu min al Malnov-Transval',
 kie loĝas Sari nun.
 Jen apud maizkampoj, ĉe la verda dornoarb',
 tie loĝas Sari Marejs.

Tre turmentis min la tim', ke jam antaŭ landa lim'
 Khakis kaptos min al la mar'.
 Mi do fuĝis tra la land' de la Upintonse-Zand,
 laŭlonge de la granda arbar'.

Fine estas mi sen ĉen', ho, feliĉa la reven',
 la reven' al Malnov-Transval'!
 Mia kara korknabin' venas tuj renkonti min,
 por kisi min en hejma la val'.

SARLANDA KANTISTA DEVIZO*Saarländischer Sängerspruch*

Frate firme nin kunligas, kion nia kant' sciigas:
 Nia kor' de jar' al jar' batos ĉiam, patruj', por vi,
 land' ĉe la Saar.

SENHEJMA*Heimatlos *** modkanto*

Staras mi dum vesper' sur scenaĵ' en la lum',
 migras mi jar' post jar' tra la mond'.
 Kaj mi montras vizaĝon ridantan eĉ dum
 ĉagrenas min viva la ond'.
 Mi trapasis la landojn de tuta la glob'
 en ĉemizo sen kol' aŭ en frak'.
 La sopir' kaj solec' ja konataj al mi,
 sed min pelas de l'sorto la brak'.

Mian hejmon trovadas mi ĉie,
 sed neniam kunloĝas kun frat',
 ĉar artisto ja scias, ke restas por li
 nur scenaĵo kaj tend' kaj la strat'.
 Mian hejmon trovadas mi ĉie.
 Ofte estas amika la rond'.
 Sed denove fortiras min forta sopir'
 al la senfinaj stratoj de la mond',
 al la senfinaj stratoj de la mond'.

La kialo nur estas la kor' sen ripoz',
 ĝi migradas, sed kie la cel'?
 Kaj fortun' estas ronda, similas al glob',
 rulas ĉiam al nigra malhel'.
 Diras ino: "Mi daŭre deziras nur vin",
 ho, mi ridas: "Mi estas migrul!"
 Nek mi indas la ridon, la amon de vi,
 nek la larmojn el via okul".

Mian hejmon trovadas mi ĉie,
 ed neniam kunloĝas kun frat',
 ĉar artisto ja scias, ke restas por li
 nur scenaĵo kaj tend' kaj la strat'.
 Mian hejmon trovadas mi ĉie.
 Ofte estas amika la rond'.
 Sed denove fortiras min forta sopir'
 al la senfinaj stratoj de la mond', al la senfinaj stratoj de la mond',
 min fortiras... min fortiras... min fortiras... min fortiras.

SEN LA ORO APUD AMO*Hat man nicht auch Gold beineben *** L. van Beethoven: Fidelio*

Sen la oro apud amo al feliĉo mankas ben'.
 Kaj la viv' fariĝas dramo, ĉiutage kun ĉagren'.
 Sed kiam tintadas en poŝ' la trezor',
 jam pelas vi for ĉiujn plagojn.
 Potenc' kaj amo prosperas el or',
 plenumas plej ardajn imagojn.
 Feliĉon logas la valor',
 ĝi estas bela, bela aĵ', la or', ja ora, ora aĵ', la or'.

Se ligiĝas nul' kun nulo, restos eta sumo nur.
 Eĉ dum daŭra amobrulo ne kompleta la plezur'.
 Ridetu hazard' por vi ĉiam kun bon',
 direktu favore la farojn.
 Karulo en brako, en sako la mon',
 kun ĝuo travivu la jarojn.
 Feliĉon logas la valor', ĝi estas pova, pova aĵ',
 la or', la or'.

SIDAS SUR L'FLAVA ĈARO*Hoch auf dem gelben Wagen *** popolkanto germana*

Sidas sur l'flava ĉaro mi ĉe la postiljon'.
 Kuras la ĉevalaro, gaje fanfaras la korn'.
 Suntago flirtas kaj ardas, or-lumas grenkampar'.
 Ho, mi volonte rigardas, sed pluruliĝas la ĉar',
 ho, mi volonte rigardas, sed pluruliĝas la ĉar'.

Flutoj kaj violonoj, knab' brak' en brak' kun ŝi
 dancas laŭ tiuj sonoj gaje ĉirkaŭ la tili'.
 Por la someron festfesti vivĝuas ĉiu par'.
 Se mi nur povus nun resti! Sed pluruliĝas la ĉar',
 se mi nur povus nun resti! Sed pluruliĝas la ĉar'.

Mastro jen kun afablo zorgas pri ni dum vesper'.
 Staras por ni sur l'tablo kruĉ' kun ŝaŭmanta bier'.
 El la fenestro ridetas bela okulopar'.
 Resti, nur resti, mi petas! Sed pluruliĝas la ĉar',
 resti, nur resti, mi petas! Sed pluruliĝas la ĉar'.

Kiam sur l'veturilo apud la postiljon'
 sidos skelet' kun falĉilo, ne plu sonados la korn'.
 Al vi "adiaŭ" mi vokas, iras mi sen amar',
 kvankam la mondo min logas, sed forruliĝas la ĉar',
 kvankam la mondo min logas, sed forruliĝas la ĉar'.

SIDU, SUNO*Sadaj, slnko, sadaj *** popolkanto slovaka*

Sidu, suno, sidu, post frambujo nia;
diru bonan nokton al amato mia.

Se la suno konus penon de laboro,
tuj malsupren sinkus en montara foro.

Sidu sun' post montoj, aŭdu mian flaton:
se vi ne tuj sekvos, riskos piedbaton.

SIN AMIS DU JUNAJ REĜIDOJ*Es waren zwei Königskinder *** popolkanto germana*

Sin amis du junaj reĝidoj, sopiris jam jaron post jar',
sed povis kunveni neniam, malhelpis profunda mar',
malhelpis profunda mar'.

„Amato, se povus vi naĝi, ho naĝu trans akvon al mi.
Bruligos mi tri kandletojn por montri la vojon al vi,
por montri la vojon al vi.“

Monaĥino perfida ŝajnigis, ke dormis profunde ŝi;
estingis la brilajn kandelojn, l'amato kruele dronis li,
l'amato kruele dronis li.

Princino serĉadis fiŝiston, kaj oron promesis al li.
„La reton nun ĵetu en akvon, kaj kaptu la princon por mi,
kaj kaptu la princon por mi.“

Li tuj nun pretigis la reton, ĝis grundo sinkigis ĝin.
Li serĉis kaj serĉis la princon, ĝis fine li trovis lin,
ĝis fine li trovis lin.

Ŝi prenis lin en siajn brakojn kun kisoj, turmenta dolor'.
„Aĥ, se vi paroli nur povus, en ĝojo saniĝus mia kor',
en ĝojo saniĝus mia kor'.“

Malgaje en maron profundan sin ĵetis la juna princlin'.
„Ho patro kaj kara patrino, vi ne plu revidos min,
vi ne plu revidos min.“

SINJOR' MARQUIS*Mein Herr Marquis *** J. Strauß: La vesperto*

SinJOR' Marquis, vir' kiel vi en stulta komedi!
 Tial la konsil', ke per saĝ-subtil' observu la homojn vi!
 Videblas de l'man' delikat', ah,
 de l'piedo gracia format', ah.
 Kaj mian lingvo-scion, korseton kaj talion
 ne trovas tion-ĉi ĉe ĉambristino vi;
 ne trovas tion-ĉi ĉe ĉambristino vi.
 Konfesu, stranga via far' kaj kurioza ĉi erar'.

Stranga estas, ha, ha, ha, la afero ha, ha, ha
 mi ridegas, ha, ha, ha pri la vero ha, ha, ha...
 tre stranga estas vi, Marquis.

Per la profil' en greka stil' provizis min kara natur'.
 Jen vizaĝa bel' kiel de anĝel', alloga la svelt-figur'.
 Kaj ĉu la tualetto al vi okulojn sorĉigas ne ĝi?
 Pro am' via okulo blindiĝas en nebulo,
 pri ŝia glata brak' vi revas eĉ dum tag';
 pri ŝia glata brak' vi revas eĉ dum tag'.
 Vin plene kaptas ĉi mister', tre stranga estas la afer'!

Stranga estas, ha, ha, ha, la afero ha, ha, ha
 mi ridegas, ha, ha, ha pri la vero ha, ha, ha...
 tre stranga estas vi, Marquis.

SOLENA LA HORO*In dieser heil'gen Stunde *** G. Verdi: Die Macht des Schicksals*

Don Alvaro: Solena la horo,
 do ĵuru plenumi nun mian deziron.

Don Carlos: Mi ĵuras, mi ĵuras.

Don Alvaro: Sur la kor' mia serĉu.

Don Carlos: Ŝlosilo!

Don Alvaro: Per ĝi vi jen trovos kun leteroj
 pakajon kun firma sigelo,
 entenas sekreton, ĝi mortu kun mi.
 Forbrulu ĝin tute!

Don Carlos: Mi ĵuras je Di'.

Don Alvaro: En pac' mi nun mortos
 en brak' de la amiko.

Don Carlos: Ho, fidu al ĉielo, ho, fidu al ĉielo,
 ho, fidu al Di'!
 Ho, fidu al Di', li fortigos, konsolos vin.

Don Alvaro: En via brak', en pac' mi nun mortos,
 en brak' de l'amiko.
 En pac' mi nun mortos, en brak' de la amiko.

Don Carlos: Ho, fidu al ĉielo, ho, fidu al ĉielo,
 ho, fidu al Di'!
 Ho, fidu al Di', li fortigos, konsolos vin.

Don Alvaro: En lia brak' en pac' mi nun mortos,
 en brak' de l'amiko.
 Adiaŭ, amik'!

Don Carlos: Adiaŭ, amik'!

Ambaŭ: Adiaŭ, adiaŭ!

SONORILETO KLINGELING*Kling, Glöckchen, klingelingeling *** kanto germana kristnaska*

Sonorileto klingeling, sonorilet'.
 Aŭdu min, infanoj, frostas miaj manoj.
 Ho, malfermu l'pordon, timas mi frostmorton.
 Sonorileto klingeling, sonorilet'.

Sonorileto klingeling, sonorilet'.
 Al vi nun mi venas, mia sako plenas.
 Portas multajn aĵojn, kukojn kaj ludaĵojn.
 Sonorileto klingeling, sonorilet'.

Sonorileto klingeling, sonorilet'.
 Ardas la kandeloj kiel brilaj steloj.
 Kaj en via koro loĝu Kristsinjoro.
 Sonorileto klingeling, sonorilet'.

SUB VIAN ŜIRMON*Sub tuum praesidium *** malnova preĝo*

Sub Vian ŝirmon ni fuĝas nun,
 sankta Dipatrino, sankta Dipatrino.
 Niajn vokojn, niajn petojn
 en la mizero malfeliĉa nia ne rifuzu,
 sed el danĝeroj, el ĉiuj,
 liberigu nin, virgulin' gloroplana,
 Sinjorino nia, kiu por ni petas,
 kaj vi beata perantino nia.
 Al la filo nin rekomendu, kun via filo nin repacigu,
 al via filo, ho, nin konduku.

SUR HARCAJ MONTJOJ*Köhlerliesel *** popolkanto germana el Harzmontaro*

Sur harcaj montoj staras jen de karbfarist' domet'.
 El ĝi rigardas je l'maten' la ĉarma filinet'.
 Okuloj brunaj, brunharar' kaj rozkolora buŝ'.
 Ridas ŝi, dek-ok, dek-ok ŝi estas nur - juvivalerallala,
 ĉiuj birdoj gaje kantas pro plezur' - juvivaleralla -
 vallerallala.

Linjo mia, Linjo mia, ho kara, vi, haj, ho bela vi!
 Linjo mia, Linjo mia, kune promenu ni.
 Ĉe l'arbara rand', kie la viol',
 kie verdas musk', vokas la kukol',
 ĉe la aveluj' feliĉigu min,
 baldaŭ mia estos vi edzin'.

Vi, Harc-montar', vi hejma land', vin kore amas mi;
 kaj estas mi en fora land', mi amas vin des pli.
 Fidela al vi restos mi, eĉ se min trafos mort'.
 De karbist' dometon konas, konas mi - juvivalerallala,
 ridas mia bruna Linjo ja el ĝi - juvivaleralla -
 vallerallala.

SUR L'ARB' KRISTNASKA*Am Weihnachtsbaum die Lichter brennen *** kanto germana kristnaska*

Sur l'arb' kristnaska kandela lumo
 en festa brilo, varma mild'.

Ĝi kvazaŭ diras: "Jen mi spegulo,
 de la esper' serena bild'."

Infanoj kun rigardo hela,
 okuloj ridas kaj la kor'.
 Olduloj turnas en rav' ĉiela
 l'okulojn supren kun ador'.

Kaj du anĝeloj senbrue venas,
 neniŭ vidis ilin jen;
 al tablo paŝas kaj preĝas, benas
 kaj foren iras kun solen'.

Ja ne aŭdiĝis l'anĝela diro,
 sekreto restis ir' kaj ven'.
 Sed en la ĉambro sentiĝas miro,
 por ĉiuj restis dia ben'.

SUR ŜIP' ESTAS NI*Heut' geht es an Bord *** kanto germana marista*

Sur ŝip' estas ni, morgaŭ foros pli, ŝip' sur mara blu'.
 Konsistas la mond' el mar' nur kaj ond',
 ho, kia bela ĝu'!

Glaskoj tintas hele, kaj kantoj sonas bele.
 Verŝu nur, knabin', ja, vivu am' kaj vin'!
 Adiaŭ, ĝis revid'.

ŜVEBAS NEĜ' EL AER'*Leise rieselt der Schnee *** kanto germana kristnaska*

Ŝvebas neĝ' el aer', nun ripozas la ter'.
 Mondo en briblanka vest'. Ĝoju, ja venos kristfest'.

Varma lum' en la kor', for ĉagreno kaj plor'.
 Ĉesas de l'viv' la molest'. Ĝoju, ja venos kristfest'.

Baldaŭ nokto de l'glor'. Kaj el ĉielo la ĥor'
 sonos en dolĉa majest': ĝoju, ja venos kristfest'.

TEMP' LIBERA, BRILA SUN'*Wochenend' und Sonnenschein *** modkanto*

Temp' libera, brila sun', promeni en arbaro kun
 karulino al feliĉo nun - temp' libera, brila sun'.

Alte jen alaŭda kant' jubilas super suna land'.
 Ĉiuj birdoj gaje kantas kun. Temp' libera, brila sun'.

Murmuras vigle la font', ni estas solaj en mond'.

En arbar' nur vi kaj mi, ridetas Dio super ni.
 Por ni estas pro feliĉo nun temp' libera, brila sun'.

TIA TAG'*So ein Tag *** Freddy *** modkanto*

Tia tago, kiun ni travivis, tia tag', neniam pasu ĝi.
 Tia tag', je kiu mi soifis. Diru do, ĉu vin revidos mi.
 Aĥ, rapide pasas belaj horoj, ja forflugas kiel nub'.
 Tiu tago, kiun ni travivas, tiu tag', neniam pasu ĝi.

TOM, LA RIMULO*Tom, der Reimer *** C. Löwe *** balado skota*

Revadis Tom ĉe riveret', ĉe Huntlej apud kastelet'.
 Alrajdis blonda sinjorin', aspektis kiel el ĉiel'.
 Neĝblanka estis la ĉeval', plektita la kolhara bel'.
 Kaj pendis en plektaĵ' de l'har' kun hela tint' sonorilar'.

Tom la rimul' salutis ŝin, genuis tuj kaj diris li:
 "Vi estas de l'ĉiel' reĝin'! Ne de la tero venas vi."

Sed diras nun la blondulin': "Jen, tio mia origin',
 ne estas mi la ĉielvirgin', sed de la elfoj la reĝin'.
 Ludu per harp', kaj kantu vi, ĝojigu min, aŭskultos mi.
 Sed sciu, se vi kisos min, sep jarojn mi posedos vin!"
 "Sep jarojn servi vin, reĝin', neniel ja timigos min."

Li kisis ŝin, ŝi kisis lin, birdet' jubilis en fraksen'.

"Mi kaptis vin, kunvenu vi sep jarojn
 nun al hejm' de mi."

Rajdadis ili tra l'arbar', feliĉa Tom, feliĉa par'.
 Rajdadis ili tra l'arbar' kun sun' kaj kantoj de l'birdar'.
 Kolhara sonorilokant'

TRA L'MONDO FLUGAS KANT'*Ein Lied geht um die Welt *** H. May*

Ĉu pri l'feliĉ' vi revis jam, kiam vintro kuris for?
 Ne faris rimojn vi pro am' glorie al printempa flor'?
 Burĝonas ja en ni sopir' je tiu io,
 je l'iluzio de la feliĉ', la granda amo.
 Kaj iam ja komprenos ni: vivo, belega vi!

Tra l'mondo flugas kant' de land' al ĉiu land'.
 Nin tuŝas tiu melodio, aŭskultas ni kun emocio.
 Ĝi kantas pri la am', ĝi kantas pri fidel',
 ne ĉesos ĝiaj sonoj, eterne tiuj tonoj,
 tra temp' kaj land', ĝi sonos, ĉiama kant'.

Ankoraŭ ni kun juna vang', jen la mond' en brila hel'.
 Kuraĝon nur, jam bolas sang', petolado nia cel'.
 Laŭ tiu melodi' ni ja sentadas sane.
 Ni vivus vane, se fuĝus ni de l'kant' de l'amo.
 Ni estas sur la ĝusta spur' al la feliĉo nur.

TRANKVIL', SEKUR'*Du bist die Ruh' *** F. Schubert*

Trankvil', sekur' kaj paca mild',
 sopiro nur - jen via bild'.
 Okul' kaj kor' dediĉ' por vi,
 en ĝoj' kaj plor' kaj emoci'.
 Kaj fermu vi por dolĉa ĝu'
 la pordon ĉi post vi sen bru'.
 Ne viv-dolor', sed arda flam'
 en mia kor' pro via am'.
 Ho, sorĉu ĝi, ke en l'okul'
 nur brilas vi kaj amo-brul'!

TRANS LA PRERION*Über die Prärie *** amkanto indiana*

Flustras en printemp' blua lagun',
 cignoj revenas, varma la sun'.
 Kaj la juna lun' ĝis nokta fin'
 gardas la sonĝojn de l'amatin'.

Kaj mi vokas ŝin! oo oo oo oo oo
 Ĉu vi aŭdos min? oo oo oo oo oo
 Ĉar arde serĉas vin mia am', mia anim'.
 Se vi rifuzos, ho, kia trist'! Atendas mi kun tim'.
 Sed se mia kant' kaj sopir' trovos vin,
 atingos respond' kaj la eĥo nun min:
 Amo la nia veros ja ĝi,
 Mia estos vi - estos via mi.

TRE KUTIMA HISTORIETO*Eine sehr gewöhnliche Geschichte *** J. Haydn*

Philint' frapegis al la pord' de Babet', vokis ŝin per fort'
 kaj laŭte vokis ŝin per fort', per granda fort'.
 "Enlasu min", petegis li. - "Ne, ne", respondis ŝi.
 Ĝemegis kaj petegis li. "Ne", diris ŝi, "vin timas mi".
 "Vin timas mi."
 "Jam estas nokt', kaj sola mi, Philint', ne eblas pli."
 Ĉagrene pretas iri li, sed la ŝlosilon turnas ŝi.
 "Nur por momento", aŭdas li, "kaj tuj foriru vi."
 Najbaroj scivolemigis tre, ĉu venos li? Ne, ne, ho, ne!
 Matene iris li sen bru' - najbaroj gapis plu.

TRI CIGANOJ

*Drei Zigeneur *** popolkanto germana*

Tri ciganoj en plena trankvil' kuŝis sub arbo salika,
dum mia ĉaro en malfacil' spuris tra sablo erika.

Unu jen meditis en si, tenis en man' violonon,
en la suna vesper-idili' ludis ciganan kanzonon.

Dua en la buŝ' sia pip', fumon li postrigardis.
Tio por li estis gaja princip', kaj li feliĉe bonfartis.

Dormis agrable la tria cigan', pendis je branĉ' lia harpo.
Sonis en kordoj zefirfiligran', sonĝis li dolĉe sub arbo.

Venis trioble al mi la klarig', kiam la vivo doloras:
kiel per fum' kaj per dorm' kaj muzik' trioble ĝin mi ignoras.

VALENCIO

*Valencia *** J. Padilla *** modkanto*

Valencio, ho, vi tero de la floroj,
de la lum' kaj de l'amor'.
Valencio, la virinoj viaj estas belaj kiel rozoflor'.
Valencio, dolĉe de l'oranĝo-floroj ja sentebas la odor'.
Estiĝu tie sub valencia ĉielo iam por mi ama kor'.
Jen blankaj kabanaj, odor' de l'ĝardenoj,
migdaloj kaj rozoj, florar-pompa flam'.
La Turia arĝenta kaj la ĉielo turkisa
kaj la sun' de Valencio, ili kantas pri am'.

VELADIS DE HAMBURGO

*De Hamburger Veermaster *** kanto germana marista*

Veladis de Hamburgo kvarmasta ŝip'.
Ja min kredu, ja min kredu!
Kun mastoj similaj al kurba rip'.
Ja min kredu, kredu min!

Ho, knaboj, ho, al Kalifornio!
Jen sen multa labor' troviĝas or'
ĉe la bord' de l'Sakramento.

El fero la plankoj kun kota malpur'.
Ja min kredu, ja min kredu!
Purigi por ni estis granda plezur'.
Ja min kredu, kredu min!

Tutverda la lardo, kun larvoj la viand'.
Ja min kredu, ja min kredu!
Por ni nur Kristnaskon fluadis la brand'.
Ja min kredu, kredu min!

Samspeca ja estis la ŝipkapitan'.
Ja min kredu, ja min kredu!
Varbita per brand' de la ŝip' ĉiu an'.
Ja min kredu, kredu min!

VENU AL TAGMANĜO*ĉenkanto*

Venu, venu al tagmanĝo! Sonis jam sonoril'.
 Venu kun afablo, venu al la tablo! Venu tuj! Venu tuj!

VENU DO*J'attendrai (Komm zurück) *** D. Olivieri *** modkanto*

Mi sentas froston, forvelkas flor',
 kaj ombroj glitas tra mia kor'.
 Tiktak' horloĝa ŝajntrompas min, ke aŭdas mi paŝi vin.
 Per vent' alflugas el foro bru',
 ĝi min ekscitas, sed vana sku'.
 Nenio plu, nenio plu.

Revenu baldaŭ; sen lum' la tag',
 sen vi la noktoj senlima plag'.
 Adiaŭ estas anim-ĉagren', sed dolĉa, ho, la reven'.
 Kaj pensoj miaj nun tra l'aer'
 vin vokas: venu! En kor-tener'
 revenos ja la am-mister'.

Venu do, dum tago kaj nokt'
 mi atendas vin, ĉiam vin.
 Venu nun, mia kor' vokas pli,
 ho, revenu vi nun al mi.
 Temp' ja kuras for', kaŭzas triston,
 malgajon en mia kor'.
 Estu nun de l'revido la hor'!

VENU, VENU*Pime, pime *** popolkanto slovak*

Venu, venu kun mi trinki, kune en amuzon sinki.
 Ŝerce kanti, multe brui, esti gajaj, ĝojon ĝui.

Kion ĉio ĉi utilas, se ne amo al mi brilas?
 Eĉ birdet' kun bela kanto ja ne restas sen amanto.

Triston sentas mi sen fino, mankas al mi karulino.
 Jam de tagoj mi suferas, ne eltenos ĝis vesperas.

VERDERIKEJO*Ja, grün ist die Heide *** K. Blume *** modkanto germana*

Paŝis mi sur erikej' plena de soleca trist'.
 En vestaĵo verda jen venis juna belĉasist'.

Ja verderikejo, alloga verdaĵ',
 sed ruĝfloras la rozoj, kia belaĵ'.

Sub abioj kreskas musk', logas mole ĝi sen fin'.
 Tie li amkisis min, kuŝis mi en lia sin'.

Kiam venis mi al hejm', la patrin' demandis min,
 kie longe estis mi, sed mi ne malkaŝis ĝin.

Kion scias erikej', al patrin' ne diras mi.
 La ĉasist' nur, krom mi mem, la sekreton konas li.

VERONIKA, PRINTEMPAS JA*Veronika, der Lenz ist da *** W. Jurmann *** modkanto*

Ridas ŝi, diras li: "Ĉu ne volas kanti vi?"

Ĉar jen printempo.

Kaj poet' kun fervor' skribas por printempa hor'
versojn el plena kor':

Veronika, printempas ja, knabinoj kantas tra la la.
 Sorĉita estas tuta mond',
 kaj ĉiuj kantas en la rond':
 "Veronika, printempa sun', ni iru al arbaro nun."
 Eĉ avo diras ja al la avino:
 "Ha, Veronika, printempas ja."

Patro, fil', ambaŭ ja revas pri Veronika,
ĉar jen printempo.Petas ŝin kun pasi' kiam, kie kantos vi
pri printempo por mi?Serĉas edz' nun kun pen' kanton por la kantfesten',
ĉar jen printempo.Kaj knabin' fine ŝi gaje kantas nun por li
pri printemp' nur por li.**VESPERKANTO EL LA SVISAJ ALPOJ***Schweizerisches Abendlied *** vesperkanto el la svisaj Alpoj*

Jam el la val' kaj montar' fuĝas la sunradiar'.

Sur la paŝtejoj, la belaj kreskas la ombroj malhelaj.

Montoj en suna vesper', ruĝlumas ĉiu glaĉer'.

Supre finiĝas ĉe l'lag' ankaŭ por gregoj la tag'.

Per la bovin-sonoriloj tintas vesperaj jubiloj.

Ho, vi paŝteja sonad', kia vespera beat'!

Nokt', ĉie sinkas nun ĝi, ŝirmos nin beno de Di'.

Vidu, jen sur la ĉielo lumas por ni eta stelo.

Apud nebul' brilas ĝi, kiel, stelet', fartas vi?

"Bone", respondas la stel', "gardas min Di' en ĉiel',

ĉar ĉies patro min benas, certe min ĉiam firmtenas.

Fidu al Dia fidel'!" Jen, bonan nokton, ho, stel'!

VI BELA AM'*Ich bin verliebt *** N. Dostal: Clivia*

Strange gvidis min la sortfervor'.
 Kial estas peza mia kor'?'
 En animo ardsopiro, same tim' kaj amdeliro,
 kiel dolĉa ĉi-dolor'!

Vi bela am', profunda am'! Kio okazis al mi?
 La am', subite venis ĝi.
 Vi bela am', profunda am', vi plenama melodi'
 ja feliĉega estas mi.

Kion ajn al mi donacos nun la sort',
 sonas nur en mi de l'feliĉeg' akord:
 Vi bela am', profunda am'!
 Feliĉ' ne estis ĉe mi, nun venis ĝi.

VI DIRIS, VI NE EMAS AMON*Du hast gesagt, du willst nicht lieben *** kanto germana*

Vi diris, vi ne emas amon,
 pro vir' ne volos havi dramon.
 Ankoraŭ juna estas vi,
 plej bela temp' rapidas ĝi.

Sur piroarb' la florkoloro
 ne estas nur okuldekoro.
 Se venos temp' kaj maturec',
 abundos ĝi per plendolĉec'.

Do, belknabin', permesu amon,
 por ke la kor' ne spertu dramon.
 Ĉar iam sola pli kaj pli,
 plej belan tempon pentos vi.

VI INFANOJ DO ATENTU*Morgen Kinder *** K. G. Hering *** kanto germana kristnaska*

Vi infanoj do atentu, morgaŭ ege ĝojos ni,
 kaj jubilo, rido, gajo estos morgaŭ tie ĉi.
 Post nur unu tag', ho ĝoj', estos kristanĝel' sur voj'.

Kiel do la ĉambro brilos de la kandelara hel',
 pli belege ol ĉe danco en palaca, lustra bel'!
 Pensu pri l' pasinta jar' kaj pri l' sanktvespera far'!

Mi ricevis du ĉevalojn, paŝtistinon havis Manj'.
 Kuirejon, fornon, vazojn trovis nia bona Franj'.
 Harlekeno por Mari', kiel bela estas ĝi!

Grandioza veturilo, bela plumba ĉasbestar',
 multaj varmaj, ĉarmaj vestoj kaj bongusta frandaĵar'
 krom la bunta baraktul' estis donoj de karul'.

Kiel bele estos morgaŭ, reesperos ĝojon ni.
 Niaj bonaj du gepatroj longe zorgis jam pri ĝi.
 Amu per la tuta kor' ilin tre en ĉiu hor'!

VILJA-KANTO*Vilja-Lied *** F. Lehár: La gaja vidvino*

Jen vivas la Vilja, arbara fein',
 ĉasisto en rokklifoj mirvidas ŝin.
 Li tremas; doloras l'animo en li,
 l'okulojn ne povas forturni de ŝi.
 Nekonata skuo kaptas la ĉasiston ĝis la fund',
 en sopir' ĝemas li kun korovund:

Vilja, ho, Vilja, arbara fein',
 kisu min, estu al mi amatin'.
 Vilja, ho, Vilja, mistera la hor',
 tiru min al via kor'!

Firmprenas la knabon ŝi tuj per la man'
 kaj tiras lin for al la roka kaban'.
 Koscion li perdas en brak' de l'fein',
 ĉar tiel ne amas de l'tero knabin'.
 Sed post amfeliĉo fuĝas for ŝi kvazaŭ nur fantom'.
 Plendas, ve, korrumpita juna hom':

Vilja, ho, Vilja, arbara fein',
 kisu min, estu al mi amatin'.
 Vilja, ho, Vilja, mistera la hor',
 tiru min al via kor'!

VIN AMAS MI*Ich liebe dich so, wie du mich *** L. van Beethoven*

Vin amas mi, min amas vi, vesperojn kaj matenojn.
 Kaj ĉiutage kune ni dividis la ĉagrenojn.
 Komune ilin portis ni facile, la dolorojn.
 Mildigis miajn zorgojn vi, mi same viajn plorojn,
 ja viajn plorojn.

Do estu ben' de Di' kun vi, ho, mia vivoĝojo.
 Di' ŝirmu, gardu vin por mi kaj nin por nia vojo.

VIN, HEJMLANDON*Teure Heimat *** G. Verdi: Nabucco*

Vin, hejmlandon ni arde sopiras.
 Forte ni vin kun larmoj aspiras,
 sed ni daŭre nur vane deziras
 kaj trankvilon ne trovas la kor'.

Kiam sonos al ĉiel' nia kanto
 sur la kampoj de l'fora karhejmlando?
 Dio granda, ho, aŭdu la peton
 kaj regvidu nin al nia land'.

Ja l'espero radias en plej glora bril',
 kvankam nun la dolor' nin vundigas.
 Aĥ, sonadas ne jam ja de l'ĝoj' jubil',
 ne sonadas de l'ĝoj' jubil'.

Vidu, Dio, suferojn la niajn,
 nin turmentas amara ĉagren'. Sed ne!
 Ja vanas ne plu la deziro,
 kiu brulas jam tra nia kor'.
 Arde petas ni de vi, kompatu nin,
 Gvidu nin al la hejml'!

VIOLON' ACERA*Javorové husle *** popolkanto slovaka*

Violon' acera tre belsone ludas,
 kiam al la amatin' dolĉe ĝi salutas.

Ludu por mi, ludu, violon' acera,
 por ke ŝi ekdormu nun pro muzik' tenera.

VIOLONO ACERA*Zahrajte mi tichúčko *** popolkanto slovaka*

Violono acera tutmallaŭte sonu
 por la fileto mia; al li dormon donu.

Dormu, dormu, Janíčko.

Panjo jen venas ŝi, venas el arbaro,
 en la man' bukedo, dono por fileto.

Dormu nun en trankvil' mia koranĝelo,
 mi ne donos vin for, eĉ ne por juvelo.

Haju, haju, haju, haju.

Kaj kial violonon?
 Por ludi dormsonon.

Haju, haju, haju, haju.

VIRETO EN ARBARO*Ein Männlein steht im Walde *** kanto germana infana*

Vireto en arbaro tutmute li.
 Purpuran mateleton ja portas ĝi.
 Kiu estas la viret' sola en la arbaret'
 kun la purpurruĝa mantelet'?

Vireto en arbaro sur unu krur'
 kun ĉapo nigra kiel el silk-velur'.
 Kiu estas la viret' sola en la arbaret'
 kun la eta nigra ĉapelet'?

VOLGO-KANTO*Wolga-Lied *** F. Lehár: La Carido*

Solec'! Kaj nur solec'! Sola, tutsola!
 Forkuras mia beljunec' en longa, tima malgajec'.
 Min premas mia peza kor', forlasis min la bonhumor'.

Jen staras soldat' ĉe l'Volgostrand',
 gardstaras por la patroland'
 dum nokt' obskura en fidel',
 nek lumas lun' por li, nek stel'.
 Kaj la step' en plensilent'.
 Larmoj fluas pro malgaja sent'.
 Lin turmentas anima tragedi',
 forlasita ĝemas li, plendas li, petas pli:

Ho, ĉu jen supre forgesis vi min?
 Sopiras al am' mi, al kor' de in'.
 Multas anĝeloj en ĉielo ĉe vi,
 Sendu unu el ili al mi.

WIEN'*, WIEN', HO ĈARMA VI*Wien, Wien, nur du allein *** R. Siczynski *** valskanto*

Plenkora inklin' min kaptis por Wien',
 por Wien', urb' de plor' kaj ridad'.
 La hejmo de mi, vagadas tra ĝi dum taga kaj nokt-promenad'.
 Ĉu vigla junul' aŭ griza oldul', revadas ja ili pri Wien'.
 Sed devus mi for, min sekvus memor',
 sopir' min turmentus sen fin'.

En ĉiu amuz' sen ia rifuz' mi estas kun granda plezur.
 Kun gaja humor' ĝis malfrua hor' mi restas en nokt-aventur'.
 Ĉe fajro de vin' de kara knabin' sopire ĉirkaŭas min brak',
 se viena mistik' per valsa muzik' sorĉigas dum nokto kaj tag'.

Kaj venos moment', ke en plena silent' adiaŭi al mond' devos mi.
 De l'vivo la flam', la vino kaj am', finiĝas de l'viv' la ebri'.
 Tre bela la fin', ĉar mia destin' ja rekta flugad' al ĉiel'.
 Sidigos jen min, kaj la Steffel el Wien' salutos al mia orel'.

Aŭdiĝas el fora sfer' dolĉa kant'
 sonadas kaj logas al hejma land':
 Wien', Wien', ho ĉarma vi, ĉiam pri vi nur revadas mi.
 Oldaj dometoj ravas min, kaj ankaŭ kelkiu belknabin'.
 Wien', Wien', ho ĉarma vi, ĉiam pri vi nur revadas mi.
 Kie feliĉo favoras min, jen Wien', jen Wien', nur Wien'.

* *Wien* - prononcu *Vin* = *Vieno*